


*Jorge Rafael Noguera*



*Kyril Shukh*

---

# LITERATURA VIVO



Numero 012

[www.literaturavivo.com](http://www.literaturavivo.com)

Junio 2026

# Enhavlisto

Alklakante la koncernan bluan titolon, oni povas salti al ĝia responda paĝo.

Titolo	Ĝenro	Aŭtoro / Tradukinto	Paĝoj
<a href="#">Vortoj por niaj legantoj</a>	redakcia	Erika Godó / John Huang / Lilaketo	4-5
<a href="#">Intervjuo al Jorge Rafael Nogueras</a>	intervjuo	Erika Godó / Jorge Rafael Nogueras	6-9
<a href="#">Mikronoveloj</a>	rakonto	Jorge Rafael Nogueras	10
<a href="#">Verksesio kun Rafa Nogueras</a>	raporto	Erika Godó	11-12
<a href="#">Kuraĝo kaj Fortuno</a>	poemo	Moissey Bronshteyn	13
<a href="#">Intervjuo al Kiryl Shukh</a>	intervjuo	Erika Godó / Kiryl Shukh	14-18
<a href="#">Ilona</a>	rakonto	Julian Modest	19-22
<a href="#">La vojo de nevenkebla homo</a>	eseo	Lilia Nikolova	23
<a href="#">Fuŝa lernanto de la angla fine atingis Esperanton</a>	romano	KOZAŬA Mami	24-28
<a href="#">Poemoj el la albana</a>	poemo	Arjana Fetahu Gaba / Bardhyl Adem Selimi (trad.)	29-30
<a href="#">Informoj pri Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay</a>	anonco	Erika Godó	31
<a href="#">Kiam la kaŝtanoj floras</a>	poemo	Marianna Pilas / Ryszarda Kwiatkowska (trad.)	32
<a href="#">La Malagasa Skolo</a>	eseo	Ulrich Matthias	33-36
<a href="#">Miaj poemoj</a>	poemo	Erika Godó	37-38
<a href="#">Tradukoj de Kirilo Brosch</a>	poemo	Konstantinos Kavafis / Henriko Hejno / Kirilo Brosch (trad.)	39-40
<a href="#">La burĝonaĝo</a>	rakonto	Muriel Spark / Detlef Karthaus (trad.)	41-45
<a href="#">Vento orienta - Vento okcidenta (12)</a>	romano	Pearl S. Buck / Detlef Karthaus (trad.)	46-49
<a href="#">Printempa poemo</a>	poemo	Jadranka Mirić	50
<a href="#">Ne povas, frato</a>	poemo	Roki Vulović	51
<a href="#">Ferumigita rivero</a>	poemo	Jadranka Mirić	52
<a href="#">covid 19</a>	poemo	Jadranka Mirić	53
<a href="#">Mi jam aŭdas printempon en la aero</a>	poemo	Julian Tuwim / Jaek Lisowski (trad.)	54
<a href="#">Vi, kiu faris maljustaĵ</a>	poemo	Czesław Miłosz / Jaek Lisowski (trad.)	55
<a href="#">KATFRAŬLOJ</a>	rakonto	Bożena Gniazdowska / Ryszarda Kwiatkowska (trad.)	56
<a href="#">La Sagao de la Eterna Spiralo</a>	rakonto	Lázaro Noel Coto	57-62
<a href="#">Tristeco</a>	poemo	Elena Popova	63
<a href="#">LA VIVO ESTAS...</a>	poemo	Elena Popova	64
<a href="#">Stranga konsilo</a>	rakonto	Laimundas Abromas	65-66
<a href="#">Esperantismo?</a>	eseo	Lenke Szász	67
<a href="#">Traduko de Cristina Bollini</a>	poemo	Cristina Bollini	68
<a href="#">KIEN FORFLUGAS LA NUBO?</a>	poemo	Luiza CAROL	69
<a href="#">DE KIE VENAS</a>	poemo	Luiza CAROL	70
<a href="#">La vulpo pravis</a>	rakonto	Stanislao M Esposito	71-73
<a href="#">Neandertalaj homoj eble plu vivas</a>	eseo	Roland Platteau	74-80
<a href="#">Vi venas kiel maja nokto</a>	poemo	Bolesław Leśmian / Ryszarda Kwiatkowska (trad.)	81
<a href="#">Filino kaj ŝia patro</a>	romano	Yin Jiaxin	82-86
<a href="#">Ario de juneco</a>	romano	Yin Jiaxin	87-90

Titolo	Ĝenro	Aŭtoro / Tradukinto	Paĝoj
<a href="#">Posteuloj de la Drako</a>	kanto	Hou Dejian / John Huang (trad.)	91
<a href="#">Patrin'</a>	kanto	Che Xing / John Huang (trad.)	92
<a href="#">Ni laboristoj fortas</a>	kanto	Ma Ke / John Huang (trad.)	93
<a href="#">Kulpa vivsavinto</a>	romano	Longarko	94-97
<a href="#">Vespera Promeno en la Okcidenta Korto</a>	poemo	Fan Chengda / Ardo (trad.)	98
<a href="#">Pordo al Ĉinio malfermita de bombono!</a>	raporto	Shenzhen Fasbu / Sheng Min (trad.)	99-100
<a href="#">AŬTUNA PENSO</a>	kanto	Ma Zhiyuan / Batalanto (trad.)	101
<a href="#">La Ŝanhaja Kajo</a>	kanto	Wong Jim / Joseph Koo / Batalanto (trad.)	102
<a href="#">REMEMORA KANTO</a>	kanto	Batalanto (trad.)	103
<a href="#">Kanto pri la Amo</a>	kanto	Dolando / Batalanto (trad.)	104
<a href="#">Ĉe Ekzameno</a>	poemo	Ĉiamĝoja	105
<a href="#">Post Leciono</a>	poemo	Ĉiamĝoja	105
<a href="#">Belaj Kolzfloroj</a>	poemo	Ĉiamĝoja	106
<a href="#">Al mia filo</a>	poemo	Gajo	107
<a href="#">La homa vivo</a>	poemo	Gajo	108
<a href="#">Hejmveo</a>	poemo	Gajo	109
<a href="#">Kato · Lumo</a>	poemo	Viktoria	110
<a href="#">Memorkunveno okaze de la unua datreveno de la forpaso de Vejdo okazis en Chongqing</a>	raporto	Zhao Dezhi	111-113
<a href="#">Momenteto</a>	rememoro	Luo Shuigen	114-117
<a href="#">AFRIKAJ VIRINOJ NE UZAS ESPERANTON EFIKE</a>	eseo	Honoré Sebuĥoro	118-119
<a href="#">Hundo</a>	poemo	Morteza Mirbaghian	120
<a href="#">Vidpunktoj de la mondo</a>	poemo	Morteza Mirbaghian	121
<a href="#">Poemoj de Musoro Benjamin Ciza</a>	poemo	Musoro Benjamin Ciza	122-123
<a href="#">Erika Godó: Lumo en Literaturo</a>	poemo	Benjamin Ciza Musoro	124
<a href="#">Vendisto kun du vizaĝoj</a>	rakonto	Jeroubbaal Banyanga	125
<a href="#">Majo</a>	poemo	Jeroubbaal Banyanga	126
<a href="#">Al miaj legantoj</a>	poemo	Jeroubbaal Banyanga	127
<a href="#">Omaĝo al la Malnovaj Esperantistoj</a>	poemo	Jeroubbaal Banyanga	128
<a href="#">La Pardono</a>	poemo	Jeroubbaal Banyanga	129
<a href="#">Ĝi ploras en mia koro</a>	poemo	Bibon Justin el Kongo	130
<a href="#">Ŝirita espero</a>	poemo	Nasandratra Patrick	131
<a href="#">Taglibro de Pipi</a>	romano / taglibro	Pipi	132-134
<a href="#">Fotografia rubriko: Interspaco de Krepusko</a>	fotografia rubriko	Shu Deping / John Huang (trad.)	135
<a href="#">Fotografia rubriko: Boatado sur Aŭtuna Lago</a>	fotografia rubriko	Shu Deping / John Huang (trad.)	136
<a href="#">La temo: "Proksime al la celo"</a>	anonco	Interkultura Novelo-Konkurso	137-138
<a href="#">Kie vojoj renkontiĝas</a>	recenzo	Bobelarto	139
<a href="#">Bobelarto VerSe</a>	anonco	Bobelarto	140
<a href="#">ILEF fotokonkurso 2026</a>	anonco	ILEF	141
<a href="#">Regularo de la Internacia Traduk-Konkurso "Vejdo" (2026)</a>	anonco	Literatura Vivo / UEA	142

Ĉiuj ilustraĵoj en ĉi tiu numero, kiuj ne estas kreitaj de la originaj aŭtoroj, estis generitaj de John Huang per AI-arta kreado.

## Vortoj por niaj legantoj



Karaj legantoj de Literatura Vivo,

Kiel rapide flugas la tempo! Preskaŭ nerimarkite, la revuo *Literatura Vivo* jam fariĝis unujara! Dum la pasinta jaro, ni tutkore dankas la subtenon de niaj multnombraj legantoj kaj amikaj aŭtoroj. Sen via subteno, ni neniel povus atingi la hodiaŭan tagon. Kun granda ĝojo kaj fiero, ni bonvenigas vin al la dek-dua numero de nia revuo.

En ĉi tiu numero, ni havas la honoron prezenti al vi du elstarajn intervjuojn. Unue, vi konatiĝos kun Jorge Rafael Nogueras, nova membro de la Akademio de Esperanto, kiu dividas siajn pensojn pri verkado, pri sia ege interesa mikronovelaro "Centvorte", pri Bobelarto, kaj pri la podkasto "Usonne Persone". Due, la juna kaj talenta Kiryl Shukh malkaŝas la filozofiajn profundojn de sia nova romano "Himnoj de Asteora: Volo de la Fatalo". Ambaŭ intervjuoj estas akompanataj de fascinaj eltiraĵoj el iliaj verkoj. Nia proza sekcio estas precipe riĉa ĉi-foje. Vi povos ĝui la misteran rakonton "Ilona" de la majstro Julian Modest, la kortuŝan familian historion "Filino kaj ŝia patro" kaj "Ario de juneco" de Yin Jiabin, same kiel la ekscitan rakonton "Kulpa vivsavinto" de Longarko. Ni ankaŭ daŭrigas la ŝatatajn felietonojn tradukitajn de Detlef Karthaus: "La burĝonaĝo de fraŭlino Johana Brodi" de Muriel Spark kaj "Vento orienta - Vento okcidenta" de Pearl S. Buck, kune kun la epopea "La Sagao de la Eterna Spiralo" de Lázaro Noel Coto.

Specialan atenton ni dediĉas al la novaj voĉoj en nia movado. La artikolo de Ulrich Matthias pri "La Malagasa Skolo" prezentas al ni inspiran novan generacion de verkistoj el Madagaskaro. Same kortuŝa estas la membiografia rakonto de la japana aŭtorino KOZAŬA Mami, "Fuŝa lernanto de la angla fine atingis Esperanton", kiu forte pravas kiel nia lingvo kapablas transpontigi eĉ la plej grandajn obstaklojn en la vivo. Ni ankaŭ memoras la pasintecon per la nostalgia rememoro "Momenteto" de Luo Shuigen.

Poezio, eseoj kaj tradukarto brile elstaras per diversaj kontribuoj en ĉi tiu numero. De la afrikaj poetoj kiel Jeroubbaal Banyanga, Bibon Justin, kaj Benjamin Ciza Musoro, ĝis eŭropaj kaj aziaj tradukoj – inkluzive de ĉinaj klasikaj kaj modernaj kantoj tradukitaj de Batalanto kaj John Huang – la emocia gamo estas tre vasta. Ankaŭ tre leginda estas la omaĝo al Etsuo Miyoshi verkita de Lilia Nikolova kaj la memorraporto el Chongqing pri la unua datreveno de la forpaso de la eminenta ĉina esperantisto kaj tradukisto Vejdo.

Krome, ni ĝojas anonci plurajn gravajn internaciajn konkursojn kaj eventojn, kiuj instigas nian komunumon krei: la Literaturan Konkurson Kálmán Kalocsay, la sesan eldonon de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK) kun la defia temo "Proksime al la celo", la Internacian Traduk-Konkurson "Vejdo" (2026), kaj la ILEF Fotokonkurson por 2026.

Ni tutkore esperas, ke vi trovos inspiron, plezuron kaj pensigajn momentojn en la paĝoj de ĉi tiu numero. Agrablan legadon!

Viaj redaktoroj,

*Erika Godó John Huang*

Erika Godó kaj John Huang


## Por "Literatura vivo" – je la unua naskiĝtago

*Lilaketo*

En paĝoj brilas via lumo  
Kreskas la nombro de l' legantoj.  
Per vortoj flugas bela kanto  
Kun revoj ĝis la horizonto.


Ĉu vi pensis? Jam unu jaro...  
Vivas valor' en ĉiu frazo.  
La lingvo sonas kiel sonĝo  
Kaj vekas koron per mesaĝo.

Nia "Literatura vivo",  
Kun nova fajro kaj admiro  
Tra mondo portu pacon al ni  
Kaj vivu longe la poezi' !



# Intervjuo al Jorge Rafael Nogueras

*Erika Godó*



## 1, Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Mi estis legemulo eĉ kiam mi estis tre juna: mi ne memoras momenton en mia vivo kiam, enlitiĝinte, mi ne legis almenaŭ kelkajn minutojn antaŭ ol endormiĝi. Same, kaj kredeble pro tio, de kiam mi estis en gimnazio mi komencis verki novelojn similajn al la ĝenroj kiujn mi plej ofte legis siatempe. Malgraŭ tiu dumviva legemo, verdire post kiam mi diplomiĝis kaj komencis mian profesian vivon mi dediĉis malpli da tempo al legado. Kiam mi eklernis Esperanton, tamen, mi retrovis mian elanon pri literaturo kaj komencis legi pli, kaj tio rekonatigis min kun mia verkemo.

## 2, Kio estas la fonto de via inspiro por verki novelojn aŭ mikronovelojn?

Verdire ne estas ununura fonto el kiu mi ĉerpas inspiron: povas esti io ĵuse legita, aŭ io, kion mi legis antaŭ longa tempo, ekzemple televidserio, filmo, aŭ realviva okazaĵo. Inspiro venas neatendite, kaj el neatenditaj lokoj. Kadre de la diversaj eventoj de la Monda Verk-Monato (MoVeMo, tutmonata, tutmonda verk-defio organizita de Bobelarto), mi devontigis min jam kelkajn fojojn tra la jaroj verki po mikronovelon ĉiutage dum la tuta monato (finfine mi havis tiom, ke mi decidis eldoni ilin libroforme, kaj tial pasintjare eldoniĝis "Centvorte", kolekto de 100 centvortaj mikronoveloj kaj kelkaj el miaj gajnintaj noveloj). Por trovi la inspiron verki tiom da mikronoveloj sinsekve mi uzis diversajn retajn ilojn kiuj proponas jen vortojn, jen temojn, jen rolulojn, jen lokojn, kaj el ili mi devigis min kunteksian intrigon.

## 3, Kiel la partopreno en Belartaj Konkursoj de UEA formis vian karieron? Kion vi lernis el tiuj konkursoj?

La Belartaj Konkursoj kaj la Interkultura Novelo-Konkurso (INK) donis al mi la instigon verki, klaran celon por mia verkado, difinitan limdaton, kaj okaze de INK, eĉ temon. Foje premo mortigas inspiron, sed laŭ mia sperto pli ofte estas la malo: estas ĝuste tiu premo kiu vekas nian kreemon kaj instigas nin fari hodiaŭ tion, kion alimaniere ni ĉiam diras, ke "ni faros morgaŭ".

## 4, Ĉu vi povas rakonti al legantoj pri vi mem?

Mi estas edzo, patro de ĝemeloj, kaj komputil-programisto (kiel ne malmultaj usonaj Esperantistoj!). Mi loĝas en Teksaso, Usono, sed mi naskiĝis en Portoriko, bela hispanparolanta insulo en Karibo. Mi kreskis dulingva, do la koncepto "lerni fremdan lingvon" estis ĉiam parto de mia vivo. En gimnazio kaj universitato mi lernis ankaŭ la italan kaj la francan, kaj klopodis uzi ilin tra la jaroj por ne "perdi" ilin. Kiam mi lernis, ke oni povas lerni ankaŭ Esperanton per Duolingo, mi ĝoje decidis mem elprovi, ĉu ĝi estas same facila, kiel oni diras. Feliĉe estas loka klubo ĉi tie en Aŭstino kiu renkontiĝas sufiĉe ofte, kaj trovi lokan komunumon kiu konatigis min kun la usona Esperantujo montris al mi la vivipovon de Esperanto, kaj tio tenis min en la movado.

## 5, Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?

Ne vere, aŭ almenaŭ ne laŭintence. La temaro de miaj rakontoj estas efektive sufiĉe varia: estas sufiĉe ofte malhelaj temoj rilate morton aŭ malfeliĉajn okazaĵojn, sed oni povas trovi ankaŭ pli leĝerajn temojn pri familio, amo, simplaj fantaziaĵoj kaj eĉ petolaĵoj pri la lingvo mem.

## 6, Kiel vi fariĝis parto de la podkasto "Usona Persone" en 2022?

Dum la montreala Universala Kongreso, Esperanto-USA okazigis ankaŭ siajn proprajn kunsidojn rilate kiel kontribui al la movado, kaj unu el la proponoj estis krei pli da kulturaj, kaj tiel naskiĝis "Usona Persone". Laŭmemore estis Brandon Sowers, la nuntempa prezidanto de Esperanto-USA, kiu proponis, ke li, Hans Becklin kaj mi provu simple registri podkaston. Ni simple parolas pri tio, kio interesas nin, kvazaŭ ni estus ĉe kafejo aŭ trinkejo, kaj foje ni gastigas konaton kun kiu ni volas pritrakti apartan temon. Krom tio, la detaloj pri tio, kiel ni registris la unuajn epizodojn, kiel ni elektis tiujn unuajn temojn, ktp., jam forflugis el mia cetere sufiĉe forgesema menso. Verdire, se mi sciis tiam, ke "Usona Persone" estus tiel longdaŭra projekto, mi estus farinta pli da notoj!

## 7, Kiuj temoj plej interesas vin diskuti en la podkasto?

La podkasto ne vere havas specifan temon, sed ni ja ŝatas preparoli literaturon, la nuntempan movadon kaj la historion de Esperanto mem. Plej ofte ni simple invitas interesajn gastojn kaj babilas pri tio, kio interesas ilin, aŭ pri tio, kion ili kontribuas al la movado.

## 8, Kiel la podkasto kontribuas al la Esperanto-komunumo?

Esperable ni donas al progresantoj bonan lingvan modelon, kaj facile kompreneblan aŭskultindaĵon per kiu plibonigi sian komprenkapablon. Al pli spertaj parolantoj esperable ni proponas interesajn temojn kaj niajn apartajn vidpunktojn. Kaj al la movado ĝenerale ni esperas, ke ni donas pli bonan bildon pri Usono kaj pri usonanoj ol nia registaro faras nuntempe, aŭ eĉ delonge.

## 9, Kio signifas por vi esti membro de la Akademio ekde 2025?

Persone ĝi signifas kompreneble grandan honoron kaj agnoskon pri miaj kontribuoj al Esperanto per mia verkado kaj instruado — kaj ankaŭ ioman ŝarĝon, ĉar mi sentas, ke mi devas "bonkondukti" rilate la lingvon (malgraŭ tio ke, kiel verkisto, mi sentas, ke mi havas iom da devo eksperimenti kaj elireti el la jam konataj padoj kaj malkovri belajn herbejojn). Pli larĝe, esti Akademiano signifas ankaŭ tion, ke oni havas pli da respondeco rilate la taŭgan evoluon de la lingvo, por ke estontaj Esperantistoj povu ĝui la saman juvelon, kiun ni ĝuis kaj daŭre ĝuas.

## 10, Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?

Por mi gravas kiel eble plej multe postlasi feliĉon al aliuloj, esti afabla, kaj ne aldoni ĉagrenojn al aliulaj vivoj. Oni neniam scias kian bonan efikon onia afableco aŭ konsidero al aliaj povas havi sur ili. En mondo kie homoj emas ĉikani, kritiki kaj insulti unuj la aliajn, des pli gravas agi male kaj venigi pli da subteno kaj afableco en nian etan universon. Mi ne scias kiom multe miaj verkoj estos memorataj kaj kiom longe ili postvivos min, sed esperable tiuj, kiuj konis min persone povos diri, ke ili sentis sin subtenataj de mi, kaj ke mi estis bonfara influo en iliaj vivoj.

## 11, Kio instigis vin partopreni en Bobelarton, kaj kia estas ĝia ĉefa misio?

Bobelarto celas arigi Esperantistajn literaturamantojn en subteneman, amikeman komunumon kiu okazigas legosalonojn, konkursojn, verkateljerojn, kaj aliajn eventojn por

helpi tiujn, kiuj interesiĝas pri verkado kaj Esperanto-literaturo ĝenerale. Pro tio, ke mi estas kaj legemulo kaj verkemulo, ĝi estis kvazaŭ farita por mi! Per ĝi mi faris karajn amikojn kaj trovis subtenon por mia verkado, kaj lastatempe mi iĝis neoficiala parto de la teamo, okazigante ĉiumonatajn verkksesiojn.

### **12, Kiel Bobelarto kontribuas al la evoluo de la esperanta literatura komunumo?**

Pere de INK, Bobelarto instigas al verkado (ne nur en Esperanto sed ankaŭ en aliaj lingvoj), kaj pro la internacieco de la konkurso, ĝi ankaŭ diskonigas Esperanton al alilingvanoj kiuj verŝajne neniam eĉ aŭdus pri ĝi! Per siaj legosalonoj ĝi konigas diversajn verkojn kaj verkistojn al la komunumo, kaj ĉar oni emas inviti la verkistojn partopreni la sesiojn, ĝi donas al ili la sperton konatiĝi kun siaj legantoj kaj ricevi rektan retrokuplon pri siaj verkoj –io, kion Esperantaj verkistoj malfacile spertus alimaniere, pro la diseco de nia movado. Kaj per siaj verkateljeroj Bobelarto kuraĝigas verkemulojn en amika, subtenema etoso: mi kredas, ke estas kelkaj homoj kiuj eble neniam eĉ pensus pri verkado en Esperanto, kiuj simple decidis provi unu fojon per Bobelarto, kaj trovis, ke temas pri ĝuinda, entrepreninda ŝatokupo.

### **13, Kiaj estas la plej oftaj defioj por novaj verkantoj en Esperanto?**

Ĉefe estas tio, ke ne estas multe da verkistaj komunumoj aŭ atelieroj por verkistoj en Esperanto (krom Bobelarto, kompreneble). En naciaj lingvoj, kutime en sufiĉe grandaj urboj estas grupoj por verkistoj kiuj subtenas unuj la aliajn, sed io tia malfacile ekzistus en Esperanto, do ni devas renkontiĝi rete por havi similan sperton. En Esperanto ekzistas "manlibro" por poetoj, La Parnasa Gvidlibro, sed similaĵo por prozistoj ne ekzistas, almenaŭ miascie. Do, oni alfrontas la kutimajn defiojn kiujn prezentas verkado mem, kaj al ili aldoniĝas la diseco de nia komunumo kaj manko de subteno.

### **14, Ĉu ekzistas specifaj temoj aŭ ĝenroj, kiuj pli allogas Esperantajn verkistojn?**

Estas kompreneble diversaj eraoj en la Esperanto-literaturo, sed mi dirus, ke ofte enestas la temo de la movado mem, milito... kaj ial, ankaŭ multaj krimromanoj!

### **15, Kiel vi instigas komencantojn kuraĝi ekverki?**

Mi simple diras, ke se oni kapablas lerte mensogi, oni kapablas verki: fikciaĵo estas nenio pli ol bele tajlita mensogo. Mi krome dirus, ke oni ne devas verki longan, mond-skuan romanon: oni povas komenci per mallongaj rakontoj (mikronoveloj, eĉ) pri ajna temo. Oni ne devas eldoni ilin ie ajn, aŭ eĉ montri ilin al iu ajn (kvankam se oni volas plilertiĝi pri verkado, ja nepras havi aliulajn korektojn kaj komentojn)... oni povas simple provi!

### **16, Kian rolon ludas komunumaj eventoj kiel verkksesioj kaj konkursoj?**

Mi kredas, ke verkksesioj donas la okazon aŭ eĉ la mem-permeson entrepreni la verkadon: foje la unua paŝo, kuraĝi kaj ekverki, estas la plej malfacila. Kaj kiel ĉio, estas pli facile fari ion malfacilan kiam oni estas subtenata kaj helpata de homoj kiuj havas la samajn interesojn, kaj kiuj mem travivis kaj ankoraŭ travivas la samajn defiojn rilate verkadon. Same pri la konkursoj: ili donas klaran celon kaj spronon elcerbigi ideon kaj fakte surpaperigi ĝin.

### **17, Kio okazas dum verkksesio, kaj kiel oni povas partopreni?**

La ĉefpaĝo de Bobelarto montras la detalojn pri la ĉiumonataj verkksesioj, kaj ili ankaŭ troveblas pere de Eventa Servo. Kio okazas dume dependas de la unuopa sesio! Mi estas la nuntempa gvidanto, kaj en ĉiu sesio mi elpensas ian instigilon por sproni la kreemon de la

partoprenantoj. Foje ni legas ion kaj verkas ion rilatan al ĝi, aŭ mi provizas la partoprenantojn per frazoj aŭ vortoj uzendaj, aŭ ni diskutas interesajn bildojn, ktp. Poste estas iom da tempo por ke ĉiu verku unuope, kaj fine mi kuraĝigas ĉiujn laŭtlegi tion, kion ili verkis, kaj eĉ dividi ĝin en la Telegram-grupo de Bobelarto.

### **18, Kiel funkcias la INK-konkurso, kaj kiaj estas ĝiaj kriterioj?**

Ĉiujare estas aparta temo laŭ kiu oni verku, kaj estas du kategorioj: unu por komencantoj kaj alia por pli spertaj verkistoj. Estas diversaj monpremioj, sed tiu informo ŝanĝiĝas de jaro en jaro, do oni prefere iru al la paĝo de INK kaj informiĝu pri la tiujaraj temo, premioj kaj postuloj.

### **19, Kian sperton ofertas legosalono al partoprenantoj?**

La ĉefa celo estas konatigi la ĉeestantojn kun diversaj verkoj en Esperanto kaj havi la sperton laŭtlegi ilin kune kun aliaj homoj. Foje oni eĉ invitas la verkistojn mem partopreni la sesiojn, kio donas al la ĉeestantoj la ŝancon starigi demandojn rekte al ili.

### **20, Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate al via verkado?**

Mi daŭre planas partopreni en la diversaj literaturo-konkursoj en Esperanto, do certe pro ili mi daŭre verkos. Mi jen kaj jen ekhavas inspiron kaj verkas novelojn aŭ mikronovelojn memstare, sed verdire tio okazas pli kaj pli malofte pro miaj diversaj aliaj okupoj kaj Esperantumado. Mi havas ideon por verki romanon bazitan sur mia novelo "La babaŝa preĝkolĉeno" kaj mi ja tre ofte ekhavas novajn ideojn por ĝi, sed mi ankoraŭ ne sidiĝis por fakte verki ĝin. Verki romanon estas io, kion mi neniam antaŭe entreprenis, kaj mi eĉ ne certas, ĉu mi havas la bezonatajn lertojn, do mi provas lerni pli pri tia pli longforma verkado antaŭ ol elspezi multe da tempo fuŝverkante. Kaj sendube post iom da jaroj mi denove arigos plian centon da eldonindaj mikronoveloj... ni vidos!

### **21, Kion vi ŝatus diri al la legantoj de Literatura Vivo?**

Mi dankas vin pro tio, ke vi interesiĝas pri literaturo en Esperanto! Se vi ŝatos la mikronovelojn kiujn vi legos en ĉi tiu numero de Literatura Vivo, vi trovos multajn pli en "Centvorte", do mi kuraĝigas vin havigi al vi vian propran ekzempleron (ĉe Esperanto-USA, Amazon aŭ rekte de Mondial)!


Kaj por tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias, Esperanto-USA lastatempe lanĉis novan projekton, la Eldonejon Guteto. Por pli bone informiĝi pri la leg-preferoj de la Esperantistaro, Esperanto-USA publikigis enketilon, kaj mi elkore kuraĝigas ĉiujn, sed aparte legemulojn, plenumi ĝin, kaj tiumaniere helpi gvidi la agadon de tiu nova eldonejo. ♦



# Mikronoveloj

el "Centvorte"

Jorge Rafael Nogueras



## Rapidmanĝa defio


Du deksejaruloj fiksrigardis unu la alian, ĉiu de sia flanko de la manĝeja tablo. Aliaj gimnazianoj ĉirkaŭstaris, spektante la defion.

La du knaboj komencis rapidege vori la manĝaĵojn el siaj respektivaj pletoj: la perdinto pagos la aliulan tagmanĝon.

Marko, la pli maldika, triumfis, kaj Benĉjo, fortika sportisto, pagis sian ŝuldon kaj petis revanĉon la sekvan semajnon.

"Kiel vi daŭre perdas, Benĉjo?" poste demandis al li amiko. "Mi vidis vin voregi pli da manĝaĵoj ol ĉi tiom, pli rapide!"

La grandegulo ridetis konspire: "Mi scias, ke Marko ofte ne havas monon por manĝi, kaj neniel akceptus helpon... sed jes ja premion."



## Enterigoj

Mi ĉiam ŝatis enterigojn.

Nu, ne miskomprenu min: ne temas pri malsaneca, makabra fi-emo. Temas simple pri tio, ke ili estigas la plej bonajn ecojn. Ne estas ĵaluzo, envio aŭ malamo dum enterigoj, sed nur belaj sentoj: amo, respekto kaj estimo.

Dum enterigoj, mortintoj sanktiĝas: la ĉeestantoj panegiras, memorante nur la bonaĵojn de la forpasinto. Estas domaĝe, ke oni ne povas sperti tion dumvive! Tial mi ĉiam diris, ke mi ŝatus povi ĉeesti mian propran entombigon.

Sed nun, kiam tio fakte okazas, mi ekdemandas min maltrankvile – aŭskultante la teron daŭre ĵetiĝi sur mian ĉerkon – kiom longe mi ankoraŭ ĉeestos ĝin...

## Eterna

Antaŭ multaj jaroj, kiam mi estis tre juna, mi hazarde malkovris, ke mi kapablas transformiĝi en ion ajn. Unue mi iĝis hundo, ĉar la vivo de mia dorlotbesto ŝajnis al mi tre agrabla. Tamen, kiam post nur deko da jaroj mi komencis kadukiĝi, mi decidis ŝanĝiĝi en pli longvivan beston: testudon. Mia enkarapaca vivo longe daŭris, sed ankaŭ ĝi, finfine, komencis estingiĝi, do mi decidis fariĝi sekvojo. Mi pace arbis dum jarcentoj, sed mi finfine eksentis miajn branĉojn kraki ekrompiĝe. Kiel trompi la morton?

Finfine mi decidis transformiĝi en ĉi tiujn vortojn, kiujn vi nun legas. Nun, mi estas eterna. ♦

# Verksesio kun Rafa Nogueras

*Raporto kaj verkoj el la verksesio*

*Erika Godó*



**E**n la pasinta sabato, mi havis la eblecon partopreni en verksesio gvidata de Rafa Nogueras, kiu estis ne nur interesa, sed ankaŭ inspira. La verksesio, kun siaj diversaj elementoj, lasis profundan impreson al ĉiuj partoprenantoj.

Unu el la plej apartaj trajtoj de la verksesio estis la ebleco elekti inter tri malsamaj temoj. Ĉiu temo reprezentis unikan etoson kaj pensmanieron, kio permesis al ĉiu partoprenanto elekti la direkton, kiu plej resonis kun ili. Estis fascinate observi, kiel diversaj voĉoj kaj perspektivoj aperis el la sama bazo, montrante la riĉecon de la kreiva procezo.

Post la elekto de la temo, ni havis ampleksan tempon por evoluigi niajn ideojn. La etoso estis trankvila, kaj tio helpis al ni sentiĝi liberaj en nia verkado. Ni povis fari notojn, pripensi kaj diskuti kun aliaj partoprenantoj, kio kontribuis al la profundigo de niaj pensoj. Tio estis esenca, ĉar ne sentante premo fini ion perfektan, ni havis la eblecon vere mergi nin en niaj kreivaj procezoj.

La etoso de la grupo ludis gravan rolon en la tuta sperto. Kvankam ĉiuj laboris pri malsamaj temoj, la interago inter partoprenantoj estis vigla kaj inspiranta. Aŭdi la diversajn vidpunktojn kaj rakontojn el la samaj komencaj instrukcioj estis fascine, montrante kiel diversa kaj riĉa povas esti la mondo de verkado.

Tiaj laborejoj estas valoraj ne nur pro la teknikoj, kiujn ili instruas, sed ankaŭ pro la memfido, kiun ili donas al la partoprenantoj. Ni lernis, ke ne ekzistas unusola perfekta maniero verki; ĉiu rakonto havas sian unikecon, kio faras ĝin interesa. La subteno kaj kunlaboro inter la partoprenantoj helpis al ni malkovri novajn aspektojn de nia verkado.

Fine de la verksesio, ni ne nur havis verkitajn tekstojn, sed ankaŭ multajn novajn ideojn kaj inspiron. La sperto instigis nin plue verki kaj observi la rakontojn ĉirkaŭ ni per novaj okuloj. Tio estas la vera esenco de kreado: la kapablo transformi spertojn en rakontojn, kiuj reflektas nian unikecon.

Konklude, la verksesio kun Rafa Nogueras estis ne nur okazo por lerni, sed ankaŭ por evoluigi la memfidon kaj la pasion por verkado. Tiaj spertoj estas esencaj por ĉiuj, kiuj volas plibonigi siajn skribkapablojn kaj malkovri la riĉecon de la kreiva procezo.

Nun mi ŝatus prezenti kelkajn verkojn, kiuj estis faritaj dum la verksesio:

*Tatjana Tereĥova*

Dankon pri la verksesio!

Mi prenis eĉ du situaciojn el pridiskutitaj kaj unuigis ilin :)

Dankon al ĉiuj kiuj proponis la ideojn kiujn mi prenis!

Pro ĉeneto de absurdaĵoj  
Maltrafita aviadilo:  
Sendormeco, tri tasoj da kafo,  
Neceseje rajpita rilglilo...

Kion fari? Duon-ridante -  
Bezonatas ekskuzo deca  
por la ĉefo, li vagas hazarden.  
Lin atendas vesper' soleca.

Ŝia tag', se honeste diri,  
Ankaŭ iris ne laŭplane -  
Pripensante respondojn ĝustajn,  
Haltis ŝi kun gladiĵ' enmane.

La dungigĝo - afero grava,  
Ĉio estu plej glite kaj glate!  
Forbrulita plej bona jupo...  
Kaj la temp' kuras senkompate.

Jen la pordo. Sed jam fermita.  
Ŝi malfruis. Duon-plorante  
Iras ŝi ne sciante kien -  
Kial ŝi malsukcesas konstante?

Ili iris foliumante  
La malsamajn sociajn retojn,  
Sed en eta restoracio  
Ili trafis apudajn tabletojn.

Li demandis ĉu baldaŭ pluvos,  
Ŝi objetis pri tago suna.  
Sed rigardu, jen ion trikas  
En angulo anĝelo juna.

Ĉu koltukon el du fadenoj?  
Ĉu el du apartaj padetoj  
Nun plektiĝas komuna vojo?  
Tio estas liaj sekretoj.

### *Erika Godó*

La juna viro kun grandaj revoj estis ekscitita pri sia rendezuo por grava posteno en fama kompanio. Li pasigis la antaŭan nokton preparante sin, revante pri la ŝanco, kiu povus ŝanĝi lian vivon. Ĉio estis planita ĝis la lasta detalo, sed la realeco ofte estas malpli antaŭvidebla.

La mateno de la rendezuo, li ekiris el sia hejmo kun sufiĉe da tempo por atingi la oficejon. Tamen, kiam li eniris la aŭton, li ekvidis la unuan malfacilaĵon: la trafikaj lumoj blinkis ruĝe. La strato, kiun li kutime uzis, estis plena de aŭtoj, ĉiuj atendante en longaj vicoj.

"Ĉu tio vere okazis?" li pensis, nervoze kontrolante sian horloĝon. La tempo fluis, kaj la trafikaj problemoj ne ŝajnis finiĝi.

Li provis preni alternativan vojon, sed tio nur kondukis al pli da kaoso. Aŭtoj haltis, homoj rigardis siajn horloĝojn, kaj li sentis, ke liaj revoj forfluas.

Post kelkaj malfacilaj minutoj, li finfine alvenis al la oficejo, sed liaj esperoj falis, kiam li vidis la pordon fermita. La dunganto, lia estonta estro, jam foriris, nur du minutojn antaŭ lia alveno.

Li sentis malfeliĉon en sia koro, sed li ne volis forlasi senprokraste.

Decidinte ne perdi la ŝancon, li atendis, pensante, ke eble la dunganto revenus. La tempo pasis, kaj li reflektis pri la malfacilaĵoj, kiujn li alfrontis, kaj pri la revoj, kiujn li havis. Ĉu li devus forlasi, aŭ eble ekzistus ŝanco, ke la dunganto revenos? ♦



## Kuraĝo kaj Fortuno

*Moissej Bronshteyn*

**M**i estis kuraĝa, mi agis en juno  
konkorde kun mia kuraĝa fortuno.  
Mi ne plu kuraĝas pro l'aĝo nun,  
sed kial ci perdis kuraĝon, fortuno?


Min ĉiuflanke atakante  
problemoj, plagoj kaj malsanoj  
devigas daŭre pensi kante  
kun la gitaro en la manoj.

Printempo ankoraŭ vekiĝis ne plene  
en Nord-Okcidenta Rusio,  
sed plantoj naivaj ĉe mi enĝardene,  
verŝajne, ne scias pri tio.

Se fluas envio al mi de l'najbaroj,  
gapantaj al mia ĝarden' ĉiutage,  
mi diras: - Kolegoj, dum mankas la baroj  
vi rajtas envii senpage.

Mi revis nun ĉefverkon krei,  
kontente jukis miaj manoj,  
sed ĉiuj revoj emas krevi  
sen bone pripensitaj planoj.

Ĝisvivinta la militan fiepokon,  
kiu flagras nun en ĉiu mondoparto,  
komuniku mi, aŭdante vian mokon,  
ke mi kulpas nur pri l'art', ne pri l'fifarto.



# Intervjuo al Kiryl Shukh

*Erika Godó*



## 1, Kio instigis vin interesiĝi pri literaturo?

Mi ĉiam amis mergi min en diversajn historiojn kaj mondojn, kaj ankaŭ elpensi ilin memstare. Por mi, literaturo estas la perfekta fasono por transdoni ideojn. Ankaŭ por mia propra mondo, mi simple ne povis trovi pli bonan formon.

## 2, Kio estas la fonto de via inspiro por verki filozofian dramon novelon?

Mi amas profundajn rezonadojn kaj pensojn. Kaj mi ankaŭ amas fortajn emociojn. Verŝajne, min inspiras miaj propraj fantazioj. Mi tre volas transporti tiujn brilajn bildojn en la fizikan spacon.

## 3, Ĉu vi povas rakonti al legantoj pri vi mem?

Mi naskiĝis en Belorusio kaj pasigis tie mian infanaĝon. Min ĉiam ravis la beleco de tiu lando, kiu por ĉiam restos mia patrujo. Sed en 2020, kiam mi estis adoleskanto, mi kun mia familio translokiĝis al Pollando. Ĝuste ĉi tie ekfloris mia krea vivo. Mi komencis pentri kaj skribi poemojn. Poste mi desegnis mian bildstrion, kaj finfine mi verkis mian dramnovelon. Dum la tuta vivo mi dediĉis multan tempon al pensado, ofte izolante min en parkoj, apud riveroj kaj lagoj aŭ en iu ajn silenta loko. Tie mia fantazio forportis min al malproksimaj bordoj de Asteora, kie mi provis miajn kaj fremdajn filozofiajn ideojn pri ilia fortikeco.

## 4, Kio inspiris vin verki vian libron Himnoj de Asteora: Volo de la Fatalo, kaj kiel vi elpensis la ideon?

La ideo de tiu ĉi libro verŝajne naskiĝis en la sama momento, kiam naskiĝis mi mem. Ekde la plej frua infanaĝo mi elpensis ĉi tiun mondon. Rezulte, en ĝi akumuliĝis riĉa originala historio. Je unu momento mi simple ektimis, ke mi ion eligos el la kapo kaj perdos. Tial mi komencis noti la okazantaĵojn laŭ datoj, kiel kronikon, kaj finfine tio memstare transformiĝis en novelon. Kiel fonto de inspiro servis al mi riĉa bazo de plej diversaj verkoj, kolektitaj en mia kapo dum la tuta vivo. Verŝajne apartan mencion meritas la animacia serio "Steven Universe", ĉar ĝuste ĝi kreskigis kaj edukis min kaj miajn vidpunktojn. Mi ĝis nun revas ĝin senĉese. Kaj kvankam ĝi estas multe pli afabla ol mia historio, ĝuste el ĝi mi ĉerpis la bezonon pri profunda emocia ellaboro de la roluloj.

## 5, Kiajn defiojn vi alfrontis dum la verkado, kaj kiel vi superis ilin?

Kiel la plej granda malfacilaĵo por mi estis la interna kritikanto. Estis simple neeble kontentigi lin! Senfina amplitudo de genio ĝis netalentulo ĉiun tagon min tre lacigis. Kaj foje eĉ devigis min halti. Neniu diros al vi pli kruelajn vortojn ol vi mem al vi mem. Mi ne dirus, ke mi sukcesis venki tiun problemon, sed kiam oni finas la laboron, la interna kritikanto retiriĝas memstare. Tial mi konsilas al ĉiuj fini sian laboron, kiel ajn neatingebla ĝi ŝajnas. Ĉar nur en la finalo vi povos rigardi vian verkon kaj diri "bone".

## 6, Kiun mesaĝon vi volas transdoni al legantoj per via libro?

La ĉefa celo por mi estas la alproksimiĝo al nova kultura epoko. Epoko, kiu venos post la postmodernismo. Kaj ne post-postmodernismo, ne metamodernismo, sed io nova, kio venos tuj. Mi volas helpi homojn senti ĝin, kompreni ĝin kaj ekdeziri ĝin.

## 7, Ĉu vi planas verki vian sekvan libron, kaj se jes, pri kio ĝi estos?

Mi planas verki ne nur unu libron, sed ankoraŭ naŭ librojn, kiuj estos parto de la ciklo "Himnoj de Asteora". Ĉar "Volo de la Fatalo" estis nur la unua himno. Ĉiuj sekvaj libroj ankaŭ estos noveloj, sed ne ĉiuj el ili estos tragedioj. Kelkaj estos silenta persona dramo, aliaj historia raporto, aliaj politikaj intrigoj. Sed la tuta intrigo rakontos, kiel la juna Edmundo kutimiĝis al la potenco, kion ĝi kostis al li kaj kian estontecon li konstruos. Antaŭdirante mi diros, ke lia naskiĝpatrino, dukino Velita, ludos en la historio gravan rolon. Kaj ankaŭ aperos multaj novaj, interesaj roluloj.

## 8, Kiel vi taksas la antaŭparolon, kiun s-ro John Huang verkis por via romano?

Efektive, kiam mi malfermis tiun tekston la unuan fojon kaj eklegis ĝin, miaj okuloj iom post iom malfermiĝis ĉiam pli kaj pli vaste. Mi estis sincere surprizita, kiom profunde kaj precize la estimata John penetris en la intrigon. Liaj vortoj eĉ iagrade klarigis al mi mem, kion mi kreis. Mi opinias, ke tiu antaŭparolo estas la plej bona enkonduko por mia rakonto, kiu entute eblas. Eĉ mi mem ne kapablas priskribi la historion pli bone. Pro kio mi direktas mian koran dankon al la kara John.

## 9, Ĉu Kalapsa vere havas liberan volon, aŭ ĉu ŝi estas nur ilo de la diino Destino?

La imperiestrino Kalapsa sendube posedas liberan volon. Ŝi mem faras decidojn kaj nur ŝi sola respondecas pri ili. Sed la diino Destino majstre ludas per la sentoj de Kalapsa, bone konante ŝian vivon. Ili iam antaŭe havis la plej varmajn rilatojn, kiaj nur eblas inter homo kaj dieco. Sed kaj Kalapsa, kaj Destino mem estas submetitaj al la Fatalo. Oni ne povas diri, ke ĝi tutece kontrolas iliajn agojn, sed ĝi estas la sistemo, interne de kiu tiuj agoj estas entute eblaj. Destino tion komprenas, Kalapsa pri tio nur divenas, dum la plimulto de la homoj en ilia mondo tute ne scias pri la Fatalo.

## 10, Kial la profetaĵo postulas suferon kiel necesan prezon por protekti Edmondon?

La profetaĵo de Destino memstare ne estas io nepre plenumenda. Ĝuste tial ĝi estas prezentita en iom kondiĉa tono. Pli ĝuste, Kalapsa mem atingis tian staton, kie suferoj estas neeviteblaj. En la momento de la profetaĵo, Edmundo estis nur supozata figuro. Sed por ke tiu supozo realiĝu, Kalapsa devis memstare multon aranĝi, kaj la suferoj akompanis tion.

## 11, Ĉu la "malhela tornado" simbolas absolutan potencon, malesperon, aŭ ion alian?

La malhela tornado ja simbolas absolutan detruan potencon. Sed multe pli gravas tio, kion simbolas la sama tornado, kiam ĝi ŝanĝis la koloron al cindro-griza. Perdo de kontrolo, punkto de nereveneco, neevitebla infero: jen kion antaŭdiris la griza koloro. Kiam la homeca retiriĝas, venas la malhomeca.

## 12, Kiel la libro kritikas la koncepton de la Superhomo de Friedrich Nietzsche?

Ĉefe la vivo de Kalapsa estas kritiko. Ŝi sukcesis atingi tiun statuson, kiun oni povas nomi "Superhomo", sed tio montriĝis malvero, ombro sur muro. Ŝi devis esti tiu bildo, la dioj tion postulis de ŝi, sed ŝi ne sukcesis. Ŝi tamen restis homo, ĉar homo ne povas superi la homon, same kiel ŝtono ne povas akiri racion. La Superhomo, en la persono de Kalapsa, fiaskis.

### 13, Ĉu Kalapsa estas tragedia heroino aŭ avertanta ekzemplo?

Mi dirus, ke Kalapsa estas tre tragedia. En la libron eniris nur ŝia lasta nokto, sed ŝi regis dum jarmiloj. Kaj dum jarmiloj la mondo ekzistis pro ŝi. Sed, eĉ se superpotenca, ŝi tamen estas homo, kio signifas, ke tio ne povis daŭri eterne. Ŝia tuta krueleco estis la prezo por la gravito de la mondo.

### 14, Kion reprezentas Generalo Dulion? Demokration? Kaoson? Historian neeviteblecon?

Generalo Dulion estas nobleco. Tio estas revo kaj utopio. Li revemis pri la pli bona, pri la honesta, pri la justa. Li efektive opiniis, ke demokratio kapablas alporti feliĉon en ilian tragikan mondon. Sed liaj ideoj restis liaj personaj revoj ĝis tiam, kiam li dividis ilin kun malĝustaj homoj. La ideoj ekĝermis kaj ekŝanĝiĝis ĝis nereconebleco, tial Dulion ne povis ne preni respondecon pri ili. Li volis gvidi la revolucion, sed la aferon ekprenis intrigantoj. Dulion tro malfrue tion komprenis. En alia mondo lia demokratio povus venki, sed ne en Asteora, kie regis Kalapsa.

### 15, Ĉu la ribelo estas morale prava malgraŭ la katastrofo, kiun ĝi kaŭzas?

Ĉu ĝi estas? Ŝajnas al mi, ke mi ne havas la rajton doni universalan respondon. Ĉiu devus juĝi mem, ĉar ĉiu respondos malsame. Kaj tio estas bona. Ĉu utopio valoras siajn viktimojn? Ĉu nur la ribelo portas respondecon pri la katastrofo?

### 16, Kiel la metafizika mondo de Asteora influas la psikologion de ĝiaj roluloj?

En la mondo de Asteora ne ekzistas rekta institucio de religio. Diecoj en ilia mondo estas tro evidentaj kaj ofte partoprenemaj por esti neataj. Sed ili ankaŭ ne postulas adoradon, ĉar ili mem ne estas personoj en plena senco, sed pli ĝuste personigo de funkcioj. Rezulte, homoj prefere ripetas mallongajn mantrojn kun la rolo de dieco, por trankviligi sin aŭ klarigi ion al si. Kaj al magio la loĝantoj de Asteora rilatas kiel al sporto, en persona uzo, aŭ kiel al elektro, en industria kunteksto.

### 17, Kial Edmundo estas "terurita" ĉe la fino? Ĉu pro la povo, la respondeco, aŭ la vero pri la imperio?

Pli ĝuste Edmundo simple ne povis imagi al si, ke Kalapsa entute kapablas morti. Ke la mondo kapablas ekzisti sen ŝi, kaj la tronon povas okupi iu alia. Se ĉe ni estingiĝus la suno, sed la vivo daŭrus, multaj el ni ankaŭ terurigiĝus, ĉar tio signifus, ke ĉio, kion ni komprenis antaŭe, estas erara.

### 18, Ĉu la kolapso de la imperio estas prezentita kiel tragedio aŭ puriga renaskiĝo?

La imperio ne kolapsis tutece (ĝis nun). Sed kio okazos poste — estas neeble antaŭvidi. Tio estas tragedio, el kiu eblas potenca puriĝo kaj renaskiĝo, kondiĉe de elekto de la ĝusta vojo.

### 19, Kiel la libro traktas la rilaton inter dia destino kaj homa respondeco?

En mia libro tiuj du principoj iras man-en-mane. Homo devas esti respondeca, por ke la dia destino plenumiĝu. Tamen destino ankoraŭ ne estas verdikto, ĝi estas ebleco. Kaj tiu ebleco dependas de multaj homaj variabloj.

### 20, Ĉu Kalapsa amas la imperion, aŭ ĉu ŝi simple timas ĝian finon?

La imperiestrino Kalapsa sendube amis la imperion antaŭe. Ŝi amis regi ĝin kaj perfektigi ĝin. Sed tiel longa periodo de regado, kian ŝi havis, kondukis al stagnado. Tiu progreso, kiu en nia mondo okazis dum naŭ jarcentoj, ĉe ili etendiĝis dum naŭdek jarcentoj. Kaj Kalapsa estis kaj la fonto de vivo, kaj la sufoka maŝo por Asteora. Ŝi konsciis tion, sed povis nenion ŝanĝi. Kun la tempo Kalapsa perdis ĉian entuziasmon pri la potenco, tamen estante devigata resti ĉe la regado.

**21, Kion signifas “sankta ordo” en la kunteksto de la romano? Ĉu ĝi estas vere sankta?**

La tempo montros. Ĉiu rolulo interpretas la ordon laŭ sia maniero. Kalapsa konsideris sin gardanto de la ordo, sed Mastro de Ĥaoso nomis tion — ĥaoso. Edmundo, ekzemple, ankoraŭ nur devos inventi "sanktan ordon" por si kaj sia regado. Kaj al la fremda "sankteco" ĉiu rilatas malsame.

**22, Ĉu la verko sugestas, ke absoluta potenco nepre kondukas al memdetruo?**

Mi dirus, ke jes. Absoluta potenco, kiel oni ofte diras, estas ne rekompenco, sed servo. Ĝi ekstreme damaĝe efikas al la homo. Sed iu tamen portas ĝin, kaj iu al ĝi celas.

**23, Se Edmundo rifuzas la tronon, ĉu tio rompus la ciklon de sufero aŭ plimalbonigus ĝin?**

La respondo al ĉi tiu demando atendas en la sekvaj libroj. Mi diros nur, ke en ĉi tiu momento Asteora postulas, ke iu troviĝu sur la trono.

**24, Kiu libro aŭ aŭtoro forte influis vin?**

Al mi forte influis “Krimo kaj puno” de F. Dostojevskij, “La pupo” de B. Prus, “Makbeto” de V. Ŝekspiro kaj “Reĝo Edipo” de Sofoklo. El ili mi ĉerpis paradoksojn, psikologiajn turmentojn, la ŝarĝon de potenco kaj la neeviteblon de la Fatalo.

**25, Ĉu vi havas specialajn temojn, kiujn vi amas esplori?**

Mi tre amas fari al mi epistemologiajn demandojn. Kial tiuj aŭ aliaj aferoj entute povis okazi aŭ esti tiaj. Ĝuste tiaj esploroj direktitaj al ĉiuspecaj temoj naskas miajn intrigojn.

**26, Kio estas la plej grava afero en la vivo por vi?**

Fideleco al la vero, kiun mi por mi mem trovis, elektis, submetis al studado kaj akceptis kiel fundamentan ŝtonon. Plej grave estas ne esti inerta kaj infaneca ŝtipo flosanta laŭ la fluo, sed esti propra lumturo de la persona vero. Gravas, ke tiu vero estu ellaborita kaj submetita al kritika analizo, anstataŭ esti blinde akceptita kiel idolo.

**27, Kion vi ŝatus diri al la legantoj de Literatura Vivo?**

Karaj legantoj! Rigardu al la estonteco, forlasu la pesimisman penson, ke postmodernismo estas la lasta epoko, kaj konstruu vian feliĉon, eĉ se tio postulas ŝviton kaj sangon. Mi deziras al vi konscian feliĉon, kun plena respondeco pri ĝi.

**Himnoj de Asteora: Volo de la Fatalo**, verkita de Kiryl Shukh (kun antaŭparolo de John Huang), estas filozofia drama novelo situanta en la metafizika mondo de Asteoro. Ĝi estas verkita en Esperanto.

Dum jarmiloj, Imperiestrino Kalapsa la Forta konservis sanktan ordon, sed nun ŝi kadukiĝas pro magia mortmalbeno. Ligite de profetaĵo de la diino Destino, Kalapsa estas devigita elporti sian suferon por protekti la junan heredanton, Edmundo. Kiam demokratia ribelo gvidata de Generalo Dulion sieĝas ŝian kastelon, la Imperiestrino alfrontas la armeon tute sola. Pelite al siaj ekstremaj limoj, Kalapsa liberigas gigantan malhelan tornadon, kiu transformas la tutan batalkampon en cindron.

Elĉerpita kaj mortanta, ŝi transdonas la ruinigitan imperion al terurita Edmundo. Esplorante la premegan ŝarĝon de respondeco kaj kritikante la filozofion de Nietzsche pri la Superhomo (Übermensch), la libro kronikas la neeviteblan sangan kolapson de absoluta potenco, kio estas necesa por la renaskiĝo de nova epoko.

<https://a.co/d/04mKQyjs>

<https://play.google.com/store/books/details?id=XpPWEQAAQBAJ>

Jen mallonga eltiraĵo el la libro.

### Limo de monumenteco

Ekde tempo nememorebla super la ŝanĝiĝema mondo altiĝis grandioza roko. Ĝia neŝanceblo inspiris timon kaj adoron. Malvarma kaj silenta, dum jarcentoj ĝi ombris la ĉielon per sia potenca dorso. Miriadoj da sunleviĝoj kaj sunsubiroj alternis antaŭ ĝia rigardo.

<...>

La fajra kolero de la ĉielo falis en la meman koron de la ŝtona giganto. La ĉirkaŭa mondo fariĝis polvo. La roko eltenis.

<...>

Eterneco estas promeso de falo. Aperintaj fendoj anoncis la finon. La granda roko baldaŭ kolapsos, sed per tio ĝi skuegos kaj transformos la mondon.

Kaj el ĝiaj fragmentoj leviĝos bastiono juna — fortikaĵo de ordo alia. ♦



# Ilona

*Julian Modest*



Viktor ofte sonĝis unu saman sonĝon. Kompreneble ne ĉiun semajnon, sed du aŭ tri fojojn monate, aŭ po ses monatojn foje. Matene, kiam li vekigis,

li estis feliĉa, ke li spertis tiun ĉi sonĝon. Li certis, ke post ĉi sonĝo io bona okazos al li. Li stariĝis de la lito ridante kaj sciis, ke la tago estos hela kaj neordinara. Kompreneble nenio neordinara okazis, sed Viktor estis ĝoja, ke denove li sonĝis sian ŝatatan sonĝon. Iam li forgesis pri la sonĝo, sed pasis tempo, kaj denove li sonĝis ĝin.

La sonĝo komenciĝis rutine. Unue Viktor vidis ŝin en grandega nekonata stacidomo, kie estis multaj homoj, kiuj verŝajne veturos aŭ alvenis. Viktor vagis en la stacidomo tien kaj reen, kvazaŭ li serĉus iun. En la unua momento li ne sciis, kiun ĝuste li serĉas, sed poste rememoris, ke li serĉas knabinon, ne tre altan, kun nigra jupo kaj nigra mantelo, tre mallonga, simila al jako. La knabino havis nigran hararon, kaj ŝiaj okuloj brilis kiel kaŝtanoj.

Viktor vagis inter la homoj, inter valizoj kaj sako, kaj serĉis la knabinon. Li ne sciis ŝian nomon, nek de kie ŝi estas, nek kial ŝi troviĝas en la stacidomo, sed li certis, ke ŝi estas ie ĉi tie, inter la multaj homoj, kaj neatendite, subite li vidis ŝin en la tumulto, kaj tuj li rekonos ŝin. Li nepre trovos ŝin. Li bone sciis tion kaj daŭre serĉis ŝin.

Viktor vekigis, ne trovinte la knabinon, sed li estis ĝoja kaj kontenta, ke denove li sonĝis tiun ĉi sonĝon kaj denove en la sonĝo li serĉis la neordinaran belan kaj enigman knabinon en la nekonata kaj brua stacidomo.

Viktor tre bone sciis, kial li sonĝas tiun ĉi sonĝon. Li ne bezonis deĉifri ĝin kaj ne demandis sin, kion sugestas al li la sonĝo. La sonĝo nur memorigis al Viktor okazintaĵon de antaŭ tre longa tempo, kiam li estis studento, dum la foraj jaroj de la juneco, plenaj je aventuroj. Tiam Viktor ludis gitaron en studenta ĵazbando, kaj en junio la bando devis partopreni en muzikfestivalo en la urbo Berlino, Germanio. La bando forveturis, sed Viktor devis veturi du tagojn pli malfrue, ĉar li havis ekzamenon en la universitato.

Tiam, antaŭ jaroj, oni kutime veturis per vagonaro. Nur la homoj, kiuj havis pli da mono, povis permesi al si veturi per aviadilo, sed la studentoj veturis per vagonaro.

La veturado komenciĝis bone. En la Sofia stacidomo Viktor eniris en la vagonaron, trovis la kupeon, en kiu estis lia rezervita loko, sidiĝis kaj komencis trafoliumi iun ĵurnalon. Lia pakaĵo ne estis granda: nur valizo kaj gitaro.

La vagonaro devis trapasi Rumanion, Hungarion, Ĉeĥion. En Rumanio pluraj homoj veturis per tiu ĉi vagonaro. En la kupeo oni parolis diversajn lingvojn: bulgare, rumane, hungare. Viktor sidis en la angulo, ĉe la fenestro, kaj silentis. De la longa veturado li estis laca, kaj antaŭ Budapeŝto li nesentebles ekdormis. Verŝajne lia dormo estis profunda, ĉar li eksentis, ke iu forte skuas lian ŝultron kaj provas veki lin. Viktor malfermis la okulojn kaj vidis viron en uniformo. La viro diris ion al li en nekonata kaj nekomprenebla lingvo. Post kelkaj sekundoj Viktor divenis, ke la viro estas konduktoro, kiu parolas hungare kaj verŝajne petas de li la veturbileton por kontrolo. Viktor prenis la jakon, kiu pendis sur la hoko, kaj enigis manon en la poŝon por elpreni la bileton, sed tuj li stuporiĝis, sentante glacian ŝviton. La poŝo estis malplena, kaj la bileto ne estis en ĝi. Mankis la vojaĝpasporto kaj la monujo. Viktor saltis ekscitita kaj detale traserĉis ĉiujn poŝojn de la jako, sed ili estis tute malplenaj.

Li restis staranta en la kupeo, senmova, kvazaŭ fulmo estus trafinta lin. Li rigardis al la pakaĵbreto kaj konsternite rimarkis, ke lia valizo kaj gitaro same mankas. Per freneza rigardo li ĉirkaŭrigardis. En la kupeo sidis nur viro kaj virino. Viktor memoris, ke antaŭ lia ekdormo en la kupeo estis du junuloj, kiuj verŝajne delonge forlasis la vagonaron kun liaj valizo kaj gitaro kaj ĉio, kio estis en liaj poŝoj.

Per gestoj kaj per mienoj Viktor provis klarigi al la hungara kondukto, ke oni prirabis lin kaj nun li havas nek bileton, nek pasporton, nek monon. La kondukto verŝajne bone komprenis lin de liaj tragikaj mienoj, gestoj kaj larmoplenaj okuloj. La kondukto klarigis al Viktor, ke li devas eltrajniĝi ĉe la Budapeŝta stacidomo kaj tie iel trovi solvon de la problemo, ĉar sen bileto kaj sen pasporto li ne povas daŭrigi la veturadon al Germanio. Tio estis la sola eblo.

Terurita, senespera kaj kolera Viktor desupris ĉe la Budapeŝta stacidomo kaj restis sur la kajo, ĝis la vagonaro ekiris kaj malaperis en la foro. Estis la deka horo vespere kaj Viktor ne sciis kion fari. Por li la hungara lingvo sonis kiel nekomprenebla kaj mistera magiparolo. Al neniu li povis klarigi, kiu li estas kaj kio okazis al li. Neniu povis kompreni lin. De la stacidoma laŭtparolilo melodia ina voĉo konstante informis la vojaĝantojn, kiu vagonaro ekveturas kaj kien kaj kiu vagonaro alvenas kaj de kie, sed Viktor eĉ vorton ne komprenis. Unuan fojon en sia vivo li estis en Hungario, en Budapeŝto, kaj ĝis nun li eĉ ne interesiĝis, ĉu en Budapeŝto estas bulgara ambasado, kie ĝi estas kaj kiel li povas trovi ĝin por aranĝi sian revenon al Bulgario.

Li staris sur la kajo, gapante al la reloj, kiuj brilis kiel senfinaj gitaraj kordoj. Ĉio, kion li imagis kaj revis pri la ĵazfestivalo en Berlino, subite ruiniĝis, ekkreis kiel sapa veziko. Jam estis klare, ke li vidus nek Germanion, nek Berlinon, sed ankoraŭ li ne sciis, kiel li sukcesos reveni en Bulgarijon. Li sentis sin kvazaŭ en dezerto, kaj verŝajne li povus pli facile eliri el la sabla dezerto ol el tiu ĉi grandega Budapeŝta stacidomo.

Li estis ĉagrenita, ke oni prirabis lin. Li restis sen mono, sen pasporto, sed pli forte doloris lin la ŝtelo de la gitaro. Ĝi estis nova, elektra, multekosta gitaro el Britio. Lia patro tre malfacile sukcesis aĉeti ĝin. Similaj gitaroj ne estis aĉeteblaj en Bulgario. Lia patro petis sian amikon, kiu estis diplomato en Britio, kaj li tie aĉetis ĝin. Por Viktor la gitaro estis kiel viva estaĵo, pli kara ol frato aŭ fratino. Li tre ŝatis ĝin, kaj nun li suferis pri ĝi kiel pri la perdo de proksima homo. Li neniam plu vidus sian gitaron, kaj neniam plu li havos alian tian gitaron.

La kajo iĝis senhoma, Viktor devis eniri la atendejon de la stacidomo kaj atendi tie ĝis mateno. Li provis trankviligi sin per la vortoj, ke la mateno estos pli prudenta ol la nokto, sed li tute ne certis, ke tiu ĉi proverbo helpas lin. Li eniris la grandegan atendejon kaj sidiĝis sur unu el la benkoj. En la atendejo videblis multe da homoj. En la angulo kuŝis kelkaj gejunuloj sur gumaj matracoj. Eble estis junulara grupo, kiu devis atendi frumatenan vagonaron. Viktor sidis sur la malmola ligna benko kaj gapis sencele. La montriloj de la granda murhorloĝo apenaŭ moviĝis. Viktor jam estis malsata kaj dormema. Eble tiu ĉi nokto estos por li senfina. Li rimarkis, ke kontraŭ li sur la benko sidas junulino, eble du aŭ tri jarojn pli aĝa ol li. Ŝi havis nigran hararon kaj brilajn okulojn. Ŝi sidis sola, kaj por Viktor ne estis malfacile konjekti, ke ŝi estas el tiuj virinoj, kiuj diskrete promenas en la stacidomoj kaj serĉas virojn por unu nokto. Li provis ne rigardi ŝin, por ke ŝi ne opiniu, ke li deziras utiligi ŝiajn servojn.

Ŝi ne estis tre bela, sed ŝiaj ĉarmaj okuloj forte allogis. Eble ŝi estis dudekdu- aŭ dudektri-jara kun sukoplenaj lipoj, similaj al ĉerizoj, kaj ŝi havis delikatajn brovojn, kaj en ŝiaj malhelaj okuloj ludis pasiaj briloj. Ŝiaj vestoj aspektis modestaj kaj ordinaraj. Verŝajne ŝi estis tiel vestita, por ke ŝi ne diferencu de aliaj junulinoj.

Ŝi surhavis nigran jupon, helbluan bluzon kaj nigran mantelon, kiu ne estis butonumita. Sub la bluzo ŝiaj mamoj aspektis malmolaj kiel maturaj persikoj. Ŝia kolo estis blanka kiel lakto. Viktor provis ne rigardi ŝin, tamen de tempo al tempo li rapide alrigardis ŝin. La junulino sidis sur la benko kaj ŝajnigis, ke ŝi ne rimarkas la homojn ĉirkaŭ si, sed foje-foje ŝi ekridetis al iu el la viroj, kiuj pasis preter ŝi. Viktor opiniis, ke ŝi ne rimarkas lin, sed subite li kvazaŭ rigidiĝis. La junulino ekstaris de la benko kaj proksimiĝis al li, ridante afable. La junulino sidiĝis ĉe Viktor kaj diris al li "Saluton" angle. Viktor provis germanlingve klarigi al ŝi, ke li ne bezonas virinon. Poste li diris, ke li estas bulgaro kaj ne parolas hungare. Je lia granda surprizo la junulino respondis al li germane: „Jes, mi vidas, ke vi estas fremdlandano, tamen mi ne supozis, ke vi estas bulgaro. Neniam mi parolis kun bulgaro. Kial vi estas ĉi tie, en la stacidomo nokte?"

Viktor klarigis al ŝi, ke li estas studento kaj veturis al Germanio, sed en la vagonaro oni prirabis lin kaj nun li estas sen mono, sen pasporto, sen valizo kaj gitaro. Nun li atendas la tagiĝon, kaj li provos trovi la bulgaran ambasadon. Ŝajne ŝi bone komprenis lin, tamen ne dank' al lia fuŝa germana lingvo, sed de liaj kompatindaj mienoj kaj aspekto.

„Ne maltrankviliĝu“, diris ŝi gaje. „Ĉio estos en ordo. Mi helpos vin. Kiam tagiĝos, mi akompanos vin al la bulgara ambasado.“

„Ĉu vi helpos min?“ demandis Viktor embarasite, kaj tuj li konstatis, ke la demando eksonis tre stulte.

„Kial ne? Iu devas helpi vin. Sola vi ne povas orientiĝi en Budapeŝto. La urbo estas granda.“

Tion ŝi diris tiel firme, ke Viktor nenion povis aldoni.

„Eble vi estas malsata?“ demandis ŝi.

„Ne“, respondis Viktor rapide, kvankam li vere estis tre malsata.

„Kial ne? Vi sidas ĉi tie kiel ŝtonigita jam pli ol unu horon kaj duonon. Dum tiu ĉi tempo mi certe mortus pro malsato. Venu kun mi.“

Ŝi stariĝis kaj kaptis lian manon. Viktor eksentis ŝian molan varman manplaton, kaj lia koro ekstremis pro emocio. Nevole li ekdeziris pli forte teni ŝian manon. Li alrigardis ŝiajn fingrojn. Ili estis longaj, maldikaj kaj fajnecaj kiel fingroj de violonludistino. Sur ŝiaj etaj ungoj estis perlamoŝkolora lako. Ŝi gvidis lin al alia flanko de la atendejo. Ili haltis antaŭ kiosko, kaj ŝi mendis sandviĉon kun senalkohola trinkaĵo. Viktor vere estis tre malsata kaj tuj komencis manĝi la sandviĉon. Ŝi rigardis lin manĝi, kaj verŝajne kaŝe ŝi ridetis al li.

„Kiel vi nomiĝas?“ demandis ŝi.

„Viktor. Kaj vi?“

„Ilona.“

Eble ŝia nomo ne estis Ilona, tamen por Viktor tute egalas, ĉu ŝi nomiĝas Ilona aŭ iel alie.

„Ĉu vi deziras trarigardi la noktan Budapeŝton?“ demandis Ilona.

Dum sekundoj Viktor hezitis, sed li pripensis, ke nenio pli malagrabla povas okazi al li ol tio, kio okazis en la vagonaro. Li havis nek pasporton, nek monon. Oni povis nenion plu ŝteli de li. Dum tiu ĉi tago al li okazis sufiĉe da malbonaĵoj, kaj eble nenio pli malbona okazos. Li scivolis, kion montros al li Ilona.

„Jes“, respondis Viktor.

Ŝi denove manprenis lin, kaj ili ekiris al la elirejo de la stacidomo. Eble li ne havos alian eblon trarigardi Budapeŝton, meditis Viktor.

Verŝajne Ilona decidis ĉi nokton ne serĉi virojn, sed dediĉi ĝin al li, kaj Viktor ne povis klarigi al si mem tiun ĉi ŝian subitan decidon, sed iam homaj agoj estas strangaj kaj nekompreneblaj. Ofte en la homaj agoj ne estas logiko kaj konsekvenco. Vane oni serĉas logikan klarigon kaj provas diveni, kial la homoj agas tiel aŭ alie.

La nokta Budapeŝto estis fabela. Kiam ili eliris el la stacidomo, Viktor kvazaŭ enpaŝis en alian miraklan mondon. La larĝaj kaj senhomaj stratoj estis forte lumigitaj. La konstruaĵoj, silentaj kaj imponaj, similis al kasteloj, ornamitaj per skulptaĵoj. La domoj estis diversaj laŭ la arkitekturo, kvar- aŭ kvin-etaĝaj, belaspektaj. Man-en-mane Ilona kaj Viktor iris al Danubo. Ili haltis ĉe la bordo. La granda rivero fluis malrapide. En la nokta mallumo ĝi similis al glata veluro, kaj en ĝi respeguliĝis la lumoj de la urbo. La pontoj pendis kiel girlandoj. Ilona kaj Viktor ekstaris ĉe granda ponto kun du ŝtonaj leonoj.

„Tiu ĉi estas la ĉena ponto”, diris Ilona.

Sur la alia bordo videblis monteto, sur kiu estis blankaj turoj, same bone lumigitaj. Ĉio estis fabela.

Al Viktor ŝajnis, ke li promenas en la plej bela urbo de la mondo. Li forgesis la priabon, la timon kaj la maltrankvilon. Ĉe li staris nekonata bela junulino, kiu donacis al li karan travivaĵon. En si mem Viktor ripetis ŝian neordinaran nomon „Ilona, Ilona”.

Ili transpasis la ponton kaj ekiris sur la alia bordo, de kie komenciĝis la monteto. Kvazaŭ nur ili estus en la granda, silenta kaj dormanta urbo. Ili iris supren al la pinto de la monteto, kaj Viktor jam deziris, ke tiu ĉi nokto ne finiĝu, ke la suno ne aperu kaj li restu kun Ilona por ĉiam. Li deziris daŭre senti ŝian molan varman manplaton, ŝiajn longajn tenerajn fingrojn. De tempo al tempo ŝi klarigis al li germane, kie ili estas, kiel nomiĝas la konstruaĵoj, preter kiuj ili pasas, sed li ne aŭskultis ŝin. Pli grave estis, ke ŝi iras apud li kaj li aŭdas ŝian melodian karan voĉon. Ili ekiris sur pado inter altaj arboj al la pinto de la monteto, al la blankaj turoj. Kiam ili ekstaris sur la turoj, komencis tagiĝi.

Estis iom malvarme de la matena vento. Oriente la horizonto iĝis rozkolora. La suno malrapide leviĝis kaj lumigis ilin, starantajn sur la blankaj turoj. De tie bone videblis preskaŭ la tuta urbo. Sur la alia bordo de Danubo estis majesta konstruaĵo, kaj Ilona diris: „Tio estas la parlamentejo.”

Iom malantaŭ ĝi estis la kupolo de granda katedralo.

„Tio estas la baziliko ‚Sankta Stefano’.”


Ili ekiris al la urbo.

„Ni iru al la bulgara ambasado”, diris Ilona.

Viktor iris malrapide. Li sciis, ke tiuj ĉi estas la lastaj minutoj kun Ilona. Neniam plu li vidos ŝin.

Antaŭ la ambasado ili disiĝis. Estis superflue demandi ŝin pri ŝia adreso. Certe ŝi ne diros ĝin aŭ eble aŭfable evitos la demandon.

Multaj jaroj pasis de tiam. Matene, kiam Viktor vekigis post la bela sonĝo, li ne deziris kalkuli, antaŭ kiom da jaroj li renkontis Ilonan. Li daŭre serĉis ŝin en la sonĝoj, kaj ĉiam ŝajnis al li, ke, se li iros denove al Budapeŝto, li trovos ŝin tie, en la atendejo de la stacidomo sur la sama benko, kie la unuan fojon li vidis ŝin, kiam li estis studento. ♦



# La vojo de nevenkebla homo

*Pri Etsuo Miyoshi*

*Lilia Nikolova*



**E**tsuo Miyoshi – batalanta japano ne nur por sekuro, sanstato kaj pano! Venkinta la poliomjeliton, li gajnas militon post milito.”

Tiu ĉi strofo - el mia kanto - resumas la vivon de homo, kiu neniam cedis.

La libro de Etsuo Miyoshi ne estas simpla memoraĵo, sed testo pri la potenco de volo. Ĝi montras, ke la vojo malfermiĝas antaŭ tiu, kiu kuraĝas iri.

La kulminoj de lia agado parolas memstare:

Venko super poliomjelito — el persona sufero li trovis forton por helpi aliajn, inventante rulseĝojn kaj apogilojn por samsortanoj.

La Monda Pupekspozicio estas unu el la plej klaraj pruvoj de la batalemo de Etsuo Miyoshi. El simpla ideo li konstruis tutmondan kulturponton, kiu kunigis pupojn, artistojn kaj tradiciojn el dekoj da landoj. La ekspozicio altiris 217 raportojn el 31 landoj, vekante internacian atenton kaj montrante, ke kultura iniciato povas naskiĝi el la volo de unu sola homo. Per ĉi tiu projekto li montris, ke persisto povas transformi lokan eventon en mondan fenomenon. La ekspozicio ne estis nur artaĵo — ĝi estis ago de interkompreno, invito al dialogo, ponto inter kulturoj.

La internacia kampanjo por Esperanto estas unu el la plej imponaj pruvoj de la batalemo de Etsuo Miyoshi. Dum jaroj li sendis leterojn al politikistoj, ministroj kaj eĉ ŝtatestroj, investante proprajn rimedojn por ke la mondo rimarku la valoron de neŭtrala internacia lingvo. Li publikigis anoncojn en ĉefaj eŭropaj gazetoj, organizis subtenon, kaj persistis eĉ kiam la respondoj estis malmultaj. Tio ne estis kampanjo de institucio — ĝi estas la volo de unu sola homo, kiu kredas, ke lingvo povas esti ilo por paco kaj interkompreno. Lia persisto montras, ke vojo aperas nur antaŭ tiuj, kiuj ne ĉesas iri.

Paca vizio — lia pensado pri paco estas praktika, ne teoria; ĝi devenas el vivo dediĉita al interkompreno.

Venkovoj en maljuneco — li superis malsanojn, lernis novajn teknologiojn, kaj restis spirite juna, preta por ĉiu nova defio.

Ĉiu el tiuj kulminoj montras la saman veron: Etsuo Miyoshi estas homo, kiu transformas malfacilaĵojn en pontojn, kaj obstaklojn en vojojn.

Lia libro inspiras, ĉar ĝi mem estas aprezinda pruvo, ke: Kie estas volo, tie estas vojo. Kaj Etsuo Miyoshi ĉiam trovas sian vojon — por si, por aliaj, por la mondo.

Senfinan kaj neesprimeblan dankon al Etsuo Miyoshi — lia batalemo, lia persistemo kaj lia sindediĉo meritas ĉiun vorton de ĉi tiu omaĝo, ĉar lia vivo mem estas atesto, instruo, modelo. ◆

# Fuŝa lernanto de la angla fine atingis Esperanton

La urbo Fuĵi-Joŝida situas ĉe la piedo de la monto Fuĵi, la plej alta monto en Japanio. En ĉi tiu urbo mi naskiĝis kaj kreskis. Oni ofte diras, ke la figuro de la monto Fuĵi estas tre bela. Multaj turistoj ofte fotas ĝin, kiam la vetero estas bona. Sed neniam en mia vivo mi vidis la belan pejzaĝon. Mi estas tute blinda.

Mi rakontos pri aferoj, kiujn mi spertis en mia vivo, antaŭ ol mi renkontiĝis kun Esperanto, kaj pri la nuna ĝojo, ke mi povas komunikiĝi kun homoj en la mondo en Esperanto.

## 1. Malsukcesoj post malsukcesoj en mia juneco

Ekde la aĝo de 6 ĝis 20 jaroj, mi vizitadis la Gubernian Blindullernejon de Yamanashi. En la lernejo estis infanĝardeno, bazlernejo, malsupera mezlernejo, supera mezlernejo kaj aliaj fakaj kursoj. Ekde kiam mi estis infano, mi interesiĝis pri la angla lingvo kaj ŝatis lerni ĝin. Baldaŭ mi ekvolis lerni la anglan lingvon en universitato. Do, kiam mi estis en la fina jaro de supera mezlernejo, mi unue ricevis ekzamenon por eniri en iun universitaton, sed mi ne sukcesis en la ekzameno. Precipe la ekzameno de la angla lingvo estis trege malfacila. Mi rezignis eniri en la universitaton.


Due, mi ekzameniĝis por eniri en la fakan kurson de mia blindullernejo, kie blinduloj lernis metiajn sciojn kaj teknikojn por fariĝi terapiistoj en tri fakoj, nome, akupunkturisto, moksoterapiisto kaj masaĝisto. Mi sukcesis en la ekzameno, kaj lernis la metiojn tie dum tri jaroj. Tamen post kiam mi diplomiĝis, mi ankoraŭ ne povis lerte plenumi mian laboron. En akupunkturo, oni devas precize pinglopiki la akupunkturajn punktojn sur la surfaco de homa korpo, sed mi ne povis fari tion bone, ĉar mi ne povis trovi la ĝustajn punktojn. Malgraŭ mia diligenta kuracado per masaĝo, la simptomoj de miaj pacientoj ne pliboniĝis. Tiaj aferoj multe ĉagrenis min, kaj mi ne havis la memfidon labori. Mi do restis hejme anstataŭ labori ekstere.

Tamen ses monatojn post la diplomiĝo mi hazarde renkontis iun viron, kiu faris la laboron en sia domo kiel masaĝisto, akupunkturisto kaj moksoterapiisto. Li ankaŭ dungis aliajn homojn kaj laborigis ilin en hotelo. Kiam mi renkontiĝis kun li, li ĝuste serĉis homojn por laborigi en la hotelo. Sed kiam li unuafoje vidis min, li konsideris min ne taŭga por la laboro en la hotelo. Li ne volis mallertan homon kiel min, sed li volis spertan laboriston. Do li klare diris al mi, ke li ne pensas dungi min. Sed tiam, li alvokis min:

"Mi instruos al vi tion, kion mi faras en mia kuracejo por kuraci pacientojn. Venu al mia domo por lerni. En estonteco, vi devas labori por vivteni vin. Ĉar vi akiris licencojn pri terapiistoj, utiligu la licencojn. Estas malfacile pinglopiki homan korpon. Antaŭ ĉio, tuŝante homajn korpojn, vi provu fari masaĝon."

Mi do vizitadis lian kuracejon dum tri monatoj por ricevi lian kurson, kaj poste mi eklaboris kiel masaĝistino en alia hotelo.

Post tio, dum multaj jaroj mi laboris kiel masaĝistino en diversaj lokoj. Dum tiu tempo mi mem laŭeble klopodis por lertiĝi kiel masaĝistino. Kiam mi renkontis pacientojn, kies simptomoj ne tre pliboniĝis, mi ekhavis dubon pri mia masaĝmaniero. Mi do telefonis al mia iama instruisto en la lernoservo de la blindullernejo por peti liajn konsilojn. Kiam mi masaĝis laŭ la maniero, kiun li instruis al mi, la simptomoj de la pacientoj pliboniĝis. Tamen kiam mi laboris en ortopedio, mia masaĝo estis tiel mallerta, ke mi estis preskaŭ maldungita. Do en miaj libertagoj, mi vizitadis establejon, kie oni trejnigis blindajn terapiistojn al pli alta nivelo de profesia lerteco. Tie mi ricevis trejnadon de masaĝo.



KOZAŬA Mami (Japanio)  
Portretis: Helga Plötner

Tamen kiam mi laboris en ortopedio, mia masaĝo estis tiel mallerta, ke mi estis preskaŭ maldungita. Do en miaj libertagoj, mi vizitadis establejon, kie oni trejnus blindajn terapiistinojn al pli alta nivelo de profesia lerteco. Tie mi ricevis trejnadon de masaĝo.

## 2. Manon, sed senforte

Iun tagon, en la trejnejo, mia ekzercado finiĝis kiel ĉiam, kaj mi forlasis la trejnejon por reveni hejmen. Survoje, kiel kutime, kun mia blanka bastono en la dekstra mano, mi atendis buson ĉe la busstacio tuj antaŭ la fervojstacio de la urbo Kofu. Baldaŭ venis la atendita buso. Por enbusiĝi, mi supreniris ŝtupon de la buso, certigante ĝian pozicion kaj altecon per mia bastono. Post la unua ŝtupo, tamen estis ankoraŭ alia, pli alta ŝtupo. Mi do devis supreniri sur la ŝtupon, sentante la ŝtupon per la bastono. En tiu momento, iu en la buso abrupte kaptis mian maldekstran manon per sia mano kaj suprentiris min en la buson. Tiam, tenante la manon de la nekonato, kaj superirante la ŝtupon, laŭ mia tuŝsenso de la maldekstra mano, mi pensis, ke la helpan manon etendis al mi fortika mezaĝulino aŭ ĝentila sinjoro. Verŝajne, la helpinto estis pasaĝero, kiu enbusiĝis tuj antaŭ mi. Kiu ajn tiu estu, mi sentis veran bonkorecon en la etendita mano. Certe, mi estus povinta propraforte enbusiĝi per mia bastono post iom da palpado per la bastono, ĉar mi tiel kutimis fari. Sed en tiu tago, mi multe ĝojis pro la bonkora helpo kaj sincere diris: "Koran dankon!"

Sed venis neniam respondo. Nenion mi aŭdis el la direkto de la bonkora helpinto. Iom strange, mi sentis. La sekvan momenton ni disigis niajn manojn, kiuj estis tenataj kvazaŭ en manpremo. Tiam mi sentis, ke la persono staras tuj apud mi. Post tio, mi serĉis malplenan sidlokon, iom paŝante en la buso, kaj post kiam mi eksidis sur la seĝon, la buso ekveturis.

Baldaŭ en la buso, mi aŭdis viran voĉon, ŝajne en la ĉina lingvo. Tuj apud li estis virino, kiu fojfoje kviete respondis al li per malmultaj vortoj en la ĉina lingvo. Iliaj voĉoj aŭdiĝis de tie, kie staris la persono, kiu helpis min. Tiam mi divenis, ke probable la persono, kiu suprentiris min per mia mano, estis ĉino aŭ ĉinino, kiu ne scipovis la japanan lingvon, kaj ke tial li aŭ ŝi ne povis respondi al mia dankesprimado. Tamen mi ne scias, ĉu tio estis la vero. Ankaŭ nun, mi ne povas forgesi la bonkoran manon etenditan al mi senforte.

## 3. Vortoj de mia instruisto de la angla

La 19-an de septembro 1985, granda tertremo okazis en Meksiko. En Japanio, oni raportis pri la tertremo per televidaj novaĵoj ĉiutage. Tiutempe, mi estis lernantino en malsupera mezlernejo. En la lernejo, estis juna instruisto de la angla lingvo, kiun mi estimis.

Iun tagon, en sia leciono, li diris al ni gelernantoj jene:

"Kiel vi scias, lastatempe granda tertremo okazis en Meksiko. Ĝi estis grandega tertremo. Pro tio multaj homoj estis vive kaptitaj sub la rubaĵoj de falintaj konstruaĵoj. Oni do faris agadon por savi ilin, mobilizante polichundojn. En la savagado ĉefe okupiĝis germanoj kaj francoj. Ili ne povis paroli la anglan lingvon, sed ili kunlaboris unuj kun la aliaj kaj plenumis la laboron, ne uzante komunan lingvon. Admirinde, ĉu ne? Jen aŭskultu! Mi diros ion tre gravan. Verdire, por ni tute ne gravas, ke ni parolas malsamajn lingvojn. Tute ne gravas, eĉ se ni ne povas paroli la anglan aŭ aliajn fremdajn lingvojn. Eble en via estonteco, vi renkontiĝos kun usonanoj. Se vi tiam ne povos paroli angle, parolu japane. Per tio ili sufiĉe bone komprenos vin. Se usonanoj demandos vin pri io, respondu japane: 'Mi ne scias la anglan lingvon.' En tiaj okazoj multaj japanoj nur konfuziĝas kaj ne povas tiel respondi. Mi volas, ke vi bone memoru tion."

Aŭdinte tion, mi multe emociiĝis, kaj mi decidis:

"Se mi iam renkontiĝos kun usonano, mi alparolu nur japane kaj ĉio bone iros."

Tamen, tiam en mia kapo ŝvebis unu demando. Kiel interkompreniĝas tiuj, kiuj ne povas kompreni siajn lingvojn reciproke? Pri tio la instruisto nenion diris. Koncerne al tiu demando, mi mem neatendite trovis respondon per mia propra sperto multajn jarojn poste. Fakte, mi tute ne imagis tian aferon, kiam mi aŭskultis la instruiston. Post tiu leciono, mi tuj forgesis la etan demandon, kaj simple kredis je liaj diraĵoj.

#### 4. Usona paciento

Mi lernis la anglan lingvon entute ĉirkaŭ dek jarojn ekde mezlernejaniĝo, ne nur lerneje, sed ankaŭ radiokurse. Tamen malgraŭ ĉiutaga klopodo, mi tuj forgesis anglajn vortojn kaj fiksjajn esprimojn. Baldaŭ mi eklaboris kiel masaĝisto kaj ĉesis lerni la anglan lingvon. De tiam pasis pli ol dek jaroj. Tiam mi laboris en terapiejo, kiu troviĝis en la 5-a etaĝo de la stacidoma konstruaĵo de Fuĵi-Joŝida. En la laborejo, mi kuracis pacientojn per masaĝo, en mia malgranda laborĉambro, kie estis unu lito por la kuracado.

Iun tagon, kiel kutime, mi atendis pacieron en la ĉambreto. Tiam al la terapiejo, iu virino kondukis usonan viron, kiu tute ne povis paroli la japanan lingvon. La viro devis resti en Japanio pro sia laboro dum semajno. La virino gastigis lin en sia domo, sed la viro havis ian korpan problemon. Do en tiu tago ŝi kondukis lin al nia terapiejo por doni al li sperton de japana masaĝo.

La virino tuj foriris ien, postlasinte lin en la akceptejo de la terapiejo. Bonŝance tiam en la akceptejo, estis virina stabano, kiu iom povis paroli la anglan lingvon. Ŝi demandis al la usonano liajn nomon, aĝon kaj aliajn minimume necesajn aferojn en la angla lingvo. Ŝi montris al li medicinan demandaron kaj petis lin plenigi la manklokojn, kiujn ŝi indikis per sia fingro.

Post tio, la virina stabano kondukis lin al mia ĉambro.

"S-ino KOZAWA, mi petas. Tiu sinjoro estas usonano. Li ne parolas la japanan lingvon."

Ŝi diris nur tion, kaj revenis al la akceptejo. Mi tute ne povis paroli la anglan, sed tiam en la ĉambro, estis nur du homoj, mi kaj la usona paciento. Tie estis neniu homo, kiu helpis min. Tamen, mi tute ne konfuziĝis. Mi tuj decidis: "Kiel mia instruisto de la angla lingvo diris, mi parolu nur japane. Ĉar mi aŭdis lian emocian rakonton, certe ĉio bone iros."

Tiel mi pensis kaj japane demandis la usonan pacieron, kiel mi ĉiam faris al miaj pacientoj. "Saluton! Hodiaŭ kio dolorigas vin?"

Tio estis la unua momento, kiam mi sen ajna helpo provis komunikiĝi kun alilandano, kiu tute ne povis paroli la japanan. Sed, li silentis.

"Ho, li nenion respondis!"

Tiam mi eksciis, ke li tute ne komprenis min. Fakte, laŭ ordinara pensmaniero tio estis natura afero.

"La rakonto de mia instruisto estis falsa."



Mi iom pensis. Mi estis iom konfuzita, sed denove decidis daŭre paroli al li japane, ĝis mi finos lian kuracadon. Mi do diris al li japane, tuŝante la liton per mia mano:

"Bonvolu kuŝiĝi sur ĉi tiu lito."

Ĉe tio, li tuj kuŝiĝis sur la lito, por ke mi povu komenci masaĝon. Tiam mi perceptis, ke li certe vidis min montri al la lito apud mi, kaj do, li komprenas kion fari. Mi iom trankviliĝis, sed ankoraŭ restis alia tasko.

La paciento ne komprenis la japanan lingvon. Tial, mi ne povis eĉ demandi lin pri lia ĉefa simptomo. Mi do cerbumis, kiel fari masaĝon por la paciento. Mi do decidis, ke mi masaĝu lian tutan korpon de la pinto de la kapo ĝis la piedpintoj. Se mi tiel faros, tiu paciento eble estos kontenta. Mi tiel masaĝis dum mallonga tempo. Dum la kuracado laŭ bezono mi devis turni lian korpon sur la lito. Do en tiu tempo, mi diris al li: "Bonvolu turni vin dekstren!" "Bonvolu turni vin maldekstren!". Dirante tiel, mi levis kaj movis lian korpon en la necesaj direktoj per miaj manoj. Tiam, li tuj turnis sin, kompreninte mian intencon.

Tiel, mi facile konkeris la problemon, kiun mi tiam alfrontis. Tio, kio savis min, estis ja la vortoj, kiujn mi aŭdis de la instruisto de la angla lingvo, kiam mi estis mezlernejano. Se mi jam ne aŭdus la vortojn de la instruisto en la klasĉambro, mi en tiu tempo tute ne sciis, kiel respondi al la granda defio.

Kiam mi finis la kuracadon, mi diris al li japane:

"Jen mi finis vian masaĝon. Koran dankon pro via vizito."

Tiam li tuj respondis al mi japane:

"O, Arigatoo!"

Li tuj malsupreniris de la lito. Li sciis kaj komprenis nur la japanan vorton "Arigatoo" (t.e. "Dankon"). Li eliris el mia ĉambro kaj preterpasis la akceptejon, salutante la stabanojn, kelkfoje daŭre dirante japanlingve nur tiun vorton:

"Dankon! Dankon! Dankon!"

Ankaŭ la stabanoj salutis lin japane:

"Bonan sanon!".

Kaj la usonano foriris.

En tiu tago, kiam la usona paciento komence venis al la akceptejo, estis alia virina stabano, kiu vidis lin tie. Ŝi poste diris al mi, ke kiam la usonano venis al la akceptejo, li montris sian lumbon per sia fingro. Kiam mi aŭdis tion, mi unuafoje eksciis, ke la paciento havis lumbodoloron. Mi pensis tiam:

"Se oni sciigus al mi tion en la komenco, mi povus fari pli bonan kuracadon por li."

Kiam homoj ne havas komunan lingvon inter si, ili tamen povas komunikiĝi per gestoj, mienoj kaj tiel plu. Ĉi tion probable ĉiuj sciias, sed mi neniam vidis homajn gestojn en mia ĉiutaga vivo. Do, mi ne sciis, kiel gestoj povas esti utilaj por japanoj, kiam ili devas komunikiĝi kun fremduloj, kiuj ne komprenas la japanan lingvon.

En tiu tago, mi ekvolis raporti ĉi tiun okazintaĵon al mia karmemora instruisto de la angla lingvo kun granda dankemo, se mi iam revidos lin. Sed, bedaŭrinde, du jarojn poste mi eksciis, ke li mortis pro kancero en la aĝo de 59 jaroj.

Baldaŭ, pro ĉi tiu sperto, mi estis kondukita al renkontiĝo kun Esperanto, la komuna lingvo en la tuta mondo.

## 5. Renkontiĝo kun esperantistoj en la mondo

Post la epizodo en la ĉapitro 4, mi retiriĝis el la laboro en la stacidoma konstruaĵo kaj komencis fari masaĝistan laboron en mia domo.

Iun tagon, instruisto de la angla lingvo, alia ol tiu ĝis nun priparolita, venis al mia domo por ricevi mian masaĝon. Li antaŭe instruis en mia lernejo kaj bone konis min, kvankam mi neniam ricevis lian lecionon. Mi estas ĉiam relative silentema, sed dum mi faris masaĝon, miaj pacientoj ofte parolis al mi pri diversaj aferoj krom siaj fizikaj doloroj kaj suferoj, ekzemple, pri siaj laboroj, familianoj, vivo kaj tiel plu. Do mi ĉiam aŭskultis ilin sen multe paroli. Tamen en tiu tago, mi tuj diris al la instruisto, kiam mi komencis masaĝi lian korpon:

"Mi havas peton al vi."

La instruisto respondis:

"Jes! Kio?"

Mi do diris al li:

"Ĉu vi povus instrui al mi la anglan lingvon?"

Mi diris al li, ke antaŭe usonano venis al mia laborejo, kaj mi tute ne povis paroli angle kun li. Do, dum lia kuracado, ricevante mian masaĝon, li detale instruis al mi kelkajn necesajn anglajn frazojn, por ke mi povu paroli en la angla lingvo kun alilandaj pacientoj, kiuj parolas la anglan, se mi havos okazon kuraci ilin. Sed, mi ne povis kompreni la frazojn, nek la vortojn. Pro tio, mi ne povis memori al mi la frazojn. Mi silente aŭskultis lin. Do li ne rimarkis, ke mi nenion komprenas pri la anglaj esprimoj. Li diligente diris al mi japane:

"Se la pacientoj montros la dolorajn lokojn per siaj fingroj, vi ne povos kompreni tion pro blindeco. Vi do devos peti la pacientojn tuŝigi vian manon al doloraj lokoj de iliaj korpoj. En tia okazo, diru jene."

Kaj li diris la anglan frazon. Aŭskultante la anglajn vortojn, mi komprenis ununuran vorton, "hand" (aŭ "mano" en Esperanto).

Ankaŭ en aliaj okazoj en mia vivo, li kelkfoje provis instrui al mi la anglan lingvon, sed tio tute ne sukcesis.

Iun tagon, li proponis al mi lerni Esperanton. Tiam li jam fariĝis instruisto de Esperanto. Laŭ lia propono mi eklernis Esperanton. Baldaŭ sub lia gvido mi finis elementan kurson de Esperanto. Post tio, dum kelkaj jaroj, mi lernis ĉi tiun lingvon kaj renkontiĝis kun multaj esperantistoj en Japanio kaj aliaj landoj.

Ekde februaro de la pasinta jaro (2025), mi partoprenas Zoom-kunvenon, kiun okazigas alilanda blinda esperantisto por nevidantaj esperantistoj en la mondo. Kiam mi komencis partopreni ĝin, mi multe emociiĝis, eksciinte, ke multaj blindaj esperantistoj troviĝas kaj agadas en la mondo. Dum la kunveno oni aŭskultas prelegojn de la ĉeestantoj kaj diskutas en Esperanto. Tie, la alilandaj ĉeestantoj fojfoje afable salutas kaj alparolas min. Do ankaŭ mi salutas ilin kaj nur iomete parolas kun ili per facilaj vortoj. Mi ankoraŭ ne povas flue paroli en Esperanto kaj fuŝparolas, sed la alilandaj ĉeestantoj bone komprenas min kaj afable respondas. Mi do ĉiam ĝojas kaj elkore dankas ilin. Mi fojfoje ankaŭ korespondas kun ili per retleteroj.

Laŭ tiuj spertoj mi vere sentas, ke kiel oni diras, certe Esperanto estas la plej facila lingvo en la mondo, kaj por komuniki kun diverslandaj homoj, tiu ĉi internacia lingvo estas tre utila. Nun mi volas daŭre lerni ĉi tiun lingvon. En estonteco, kiam mi ekscios interesajn aferojn, kaj se mi spertos diversajn aferojn, mi volas transdoni ilin al miaj geamikoj kaj konatoj japane kaj esperante por amuzi ilin.

## Fine

En la kvin ĉapitroj, mi rakontis kelkajn miajn spertojn, rememorante diversajn aferojn. Nun finskribinte ĉi tiun artikolon, mi denove dankas ĉiujn, kiuj subtenis kaj helpis min ĝis nun. Nome, la instruistojn, kiuj instruis min en mia blindullernejo; la zorgeman terapiiston, kiu gvidis min, por ke mi povu labori kiel masaĝistino; dungitojn en la establaĵo por blindulinoj; la nekonatan homon, kiu etendis al mi bonkoran manon en la buso; mian instruiston de la angla lingvo, kiu instruis al mi gravan aferon pri komunikado kun alilandanoj; mian instruiston de Esperanto, kiu donis al mi okazon lerni Esperanton; multajn japanajn esperantistojn, vidantojn kaj nevidantojn, kiuj kuraĝigis min, helpis kaj gvidis mian lernadon de Esperanto; kaj alilandajn esperantistojn, kiuj ofte interparolas kaj korespondas kun mi en Esperanto. Fine mi tutkore dankas mian maljunan patrinon, kiu kreskigis min kaj ĉiam subtenadis min ĝis nun dum multaj jaroj en mia tuta vivo. ♦

# Albana Beqiri



Mi amos vin eĉ trans la amo, kiu dolĉe  
 min vekas,  
 trans la brua silento, kiu pri vi al mi  
 parolas,  
 mi amos vin,  
 trans la sonĝo de la pasinta nokto, kiu ĉiufoje  
 al vi min kondukas,  
 trans la glacia morto, kiu kiel tranĉilo de malĝojo  
 min trapikas ĝisoste.  
 Trans mi mem, kiu en vi renaskiĝis, mi amos vin...  
 Mi kuros al via sonĝo, kiel cervino mi  
 kuros  
 senhalte. Ĉiujn flustrojn de amo  
 mi aŭskultos,  
 kaj poste kiel vundita cervino mi falos  
 en embuskon. En via sonĝo ree kaj ree mi  
 min forgesos.  
 Ĉirkaŭ via sonĝo mi moviĝos paŝon post paŝo,  
 ĉion ĝin konkerante...  
 Mi eniros mallaŭte en vian animon, kaj tie,  
 kvazaŭ en sankta loko, mi rifuĝos.  
 Surgenue mi sidiĝos kaj al ĉiuj sanktuloj  
 senĉese preĝos.  
 La belan lingvon de via animo  
 mi lernos.  
 Kaj kun vi mi parolos kaj parolos,  
 ĉiusekunde senhalte.  
 Mi ĵuras al vi: nenio pli dolĉe sur ĉi tiu tero  
 sonos!  
 En via animo, kvazaŭ en oceano de deziroj,  
 mi naĝos.



*Verkis: Arjana Fetahu Gaba*



*Tradukis: Bardhyl Adem Selimi*

*Arjana Fetahu Gaba*



## PATRINO KONAS LA PAŜON DE SIA FILO!

La tago iris tra la mondo,  
 La nokto rapide ruliĝis,  
 Patrino dormon ne ekvidis,  
 La kuseno seke kuŝis.  
 Inter mil kaj unu malbonoj,  
 Vagas penso de kompatinda patrino,  
 Iu vizio al ŝi venas en lumo,  
 Kvazaŭ la filo mansvingas al ŝi.  
 Kiam ŝi vidos liajn ŝuojn ĉe l' sojlo,  
 Kaj aŭdos lian sekan tuson,  
 Ŝi diros du vortojn al la filo:  
 "Via patro dormas, ne faru bruon."  
 Ŝi viŝos larmojn silente,  
 Kaj diros ree: "Malfruas, mia filo,  
 La tago apartenas al la benitoj,  
 Mallumo al la malbonuloj."  
 Longa nokto, iru kaj falu en abismon,  
 Kie vi kaŝas mian filon?  
 Patrino neniam enlitiĝas,  
 Se ŝi ne vidas sian filon.  
 Patrino konas la paŝon de la filo,  
 Ŝi sentas lian spiron en la vento,  
 Kiam ŝi aŭdos la voĉon de lia animo,  
 Tiam la patrino iros dormi.



*Tradukis: Bardhyl Adem Selimi*

# Informoj pri Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay

*Specialaj premioj*

*Erika Godó*



La ĵurio de la konkurso jam komencis sian laboron. En ĉiuj kategorioj alvenis tre altkvalitaj verkoj, kiuj montras la talenton kaj kreemon de la partoprenantoj. La membroj de la ĵurio nun zorge taksas la ricevitajn verkojn.

## Specialaj Premioj

Pro la elstara nivelo de la konkurso, la organizantoj decidis fondi du specialajn premiojn:

Juna talento

Tiu premio estas donita al nova verkisto kun freŝaj ideoj kaj promesplena imagopovo. La verkado de la junaj talentoj montras kreemon, sentemon, kaj deziron esprimi siajn pensojn per belaj kaj signifoplenaj vortoj.

Kvankam ili estas ankoraŭ komence de sia literatura vojo, ilia sindediĉo kaj pasio por verkado estas klare videblaj en ĉiu rakonto kaj teksto, kiujn ili kreas.

## Honoran mencion

Tiu premio estas donita al sperta verkisto, kiu dediĉe verkas jam de multaj jaroj. Per sia konstanta laboro, ili riĉigis la literaturan mondon.

La profunda sperto, kreema spirito, kaj elstara talento videblas en ĉiu verko, kiun ili kreis tra la jaroj. Per siaj vortoj, ili inspiris legantojn kaj montris veran amon al literaturo kaj arta esprimo.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en 26 de Julio en 2026. ♦



# Kiam la kaŝtanoj floras

*Verkis: Marianna Pilas*

*Tradukis: Ryszarda Kwiatkowska*



Kaj la kaŝtanoj denove floris,  
Do ni iru promeni kune.  
Fine, ni ankoraŭ havas unu la alian,  
Kaj mi ankoraŭ volas rigardi en viajn okulojn!  
La kaŝtana aleo bonvenigas nin,  
Ĝi allogas nin per sia mirinda odoro.  
Kaj siaj blankaj floroj,  
Ĝi igas niajn kapojn turniĝi.  
Ni iru, man-en-mane,  
Al la paradizo, kiu atendas nin.  
Mi deziras nenion plu.  
Mi vokas vin de malproksime!



# La Malagasa Skolo

*Nova generacio de esperantaj verkistoj*

*Ulrich Matthias*



En la pasintaj jaroj la malagasa Esperanto-movado tre vigliĝis. Ni dankas tion al Henriel Fidilalao (naskita en 1966), kiu jam de jardekoj instruas la lingvon ĉeeste kaj rete, al Miora Raveloharison (naskita en 1980), kiu organizis komence de 2024 la unuajn du Malagasajn Esperanto-Seminariojn - kaj aparte al Ranja Zafinifotsy. La grandegaj meritoj de Ranja por la malagasa movado montriĝas en tio, ke el la sume 63 malagasaj partoprenantoj de la pasinta 5-a Malagasa Esperanto-Seminario 55 lernis la lingvon rekte aŭ nerekte danke al ŝi. El la ceteraj, sep lernis la lingvon pro Henriel Fidilalao kaj unu de Justine Ralalarisoa (1954-2023).

## La estiĝo de la Malagasa Skolo

Fine de la jaro 2020 Ranja komencis reverki en Esperanto longan rakonton, kiun ŝi ekverkis iam kiel 16-jarulino en la franca lingvo. Ĝi aperis rete en januaro 2022 sub la titolo „La sorto de Aina“. En 2024, la fama recenzisto Sten Johansson laŭdis ĝin en sia retejo literaturo.esperanto.net per la sekvaj vortoj: „La plej valora trajto de La sorto de Aina estas ĝia rakonta voĉo, la perspektivo de la malriĉa knabino Aina, naiva kaj senscia pri la vasta mondo, sed samtempe ankaŭ klarvida kaj prudenta. Mi tuj ekŝatas ŝin, kaj dum la evoluo de la rakonto, tiu ŝato kreskas.“

En 2025, Ranja finverkis 3 pliajn Esperanto-libretojn: la infanlibrojn „Semoj de amikeco“, „La vojaĝo de Ando“ kaj „La Mesaĝisto de la Tero“, aperintaj en po 200-300 ekzempleroj ĉe la eldonejo Lemuro en Wiesbaden, Germanio. Krome en la sama jaro ankaŭ „La sorto de Aina“ aperis en presita formo, kaj fine ankaŭ ŝia ĉefverko, la 103-paĝa romano „Kiel herbo en vento“. Ĉiuj ĉi verkoj aperis kun belegaj ilustraĵoj, kiujn faris per AI parte la hungara esperantisto Csaba Németh kaj parte Ranja mem. „La verko abundas je edifaj pensoj“, skribis Carlo Minnaja en sia recenzo pri „Kiel herbo en vento“ en Literatura Foiro n-ro 338 (decembro 2025).

Ranja ne restis la sola juna verkisto en Malagasio. Inter aprilo kaj aŭgusto 2025 Navalona Lahatriniaina, 20-jara studentino pri komunikado, verkis sian 87-paĝan vivrakonton „Floroj en mizero“. En ĝi, ŝi priskribas sian vivon kiel sociala orfino en ekstrema malriĉeco. Ankaŭ ĝi trovis favoran recenzon de Carlo Minnaja, kiu komenciĝas per la vortoj „Ĉi-foje ni troviĝas vere antaŭ neordinaraĵo“ (Literatura Foiro n-ro 339, februaro 2026).

Ni povis prezenti entute 6 presitajn librojn de Ranja kaj Navalona en la 4-a Malagasa Esperanto-Seminario en oktobro 2025 en Antananarivo. Ili akceptiĝis tie tre favore, kaj tio kuraĝigis pliajn junajn malagasojn al verkado. Jam tuj post la seminario ekverkis Avotra Maria Nafifinjahary, kiu lernis Esperanton nur kelkajn monatojn antaŭe danke al hazarda renkontiĝo kun la frato de Ranja. Dum ŝi ankoraŭ ampleksigis sian kelkdekaĝan verkon, por kiu ŝi antaŭvidas la titolon „De larmoj al lumo“, ni jam publikigis modifitan eltiraĵon en „La Ondo de Esperanto“ n-ro 4/2025 en formo de raporto pri la 4-a Malagasa Esperanto-Seminario.

Mallonge poste Torine Raharisoa, 17-jara lernantino, ekverkis sian vivrakonton, por kiu ŝi jam dekomence elektis la belan titolon „Sub la pluvo, kie naskiĝas miaj revoj“. Kontraŭe al ŝia amikino Navalona, Torine parolas ankaŭ pri siaj unuaj spertoj pri amo – kaj pri sia konatiĝo kun Esperanto. Ni intencas eldoni ŝian libron – kiun ŝi ankoraŭ ampleksigas, por ke ŝi fariĝu almenaŭ same ampleksa kiel tiu de Navalona – ĝis la Universala Kongreso en Graz.

En decembro 2025 ekverkis ankaŭ malagasa knabo, Erica Najaina, kies nomo memorigas nin pri tio, ke en Malagasio la plej multaj personaj nomoj estas ambaŭseksaj. Tri el liaj verkoj – unu eseo kaj du originalaj rakontoj – aperis en Literatura Vivo n-ro 11. Ili impresas per kortuŝa enhavo kaj brila, foje patosa stilo. Menciindas, ke liaj verkoj bezonas preskaŭ nenan redaktadon.

Dum la kvin menciitaj verkis ĉefe originalajn rakontojn, du junaj gefratoj – Célestine Fanjasoa kaj Nasandratra Patrick Randriamizaka – publikigis poemojn en Literatura Vivo, kiuj esprimas sincerajn sentojn kaj, malgraŭ sia melankolia tono, profundan optimismon.

### **Jen la menciitaj aŭtoroj de la Malagasa Skolo en alfabeto sinsekvo:**

- Célestine FANJASOA (nomata Fanja, naskiĝis 11.02.2007) publikigis du poemojn en Literatura Vivo n-ro 11. Ŝi studas sociologion en Antananarivo.

- Navalona LAHATRINIAINA (naskiĝis 06.02.2005) verkis sian vivrakonton „Floroj en mizero“ en 2025. Ŝi aperis en la sama jaro ĉe la Eldonejo Lemuro en Germanio. Ŝi studas komunikadon en Antananarivo.

- Avotra Marie NAFIFINJAHARY (konata ĉe Facebook kiel Nafi Ruicat, naskiĝis 27.07.2005) verkas sian aperontan ĉ. 50-paĝan vivrakonton „De larmoj al lumo“ ekde novembro 2025 (kaj surbaze de ŝi raporton pri la 4-a Malagasa Esperanto-Seminario, kiu aperis en La Ondo de Esperanto n-ro 4/2025). Ŝi studas turismon en Fianarantsoa.

- Erica NAJAINA (vira, naskiĝis 11.11.2004) publikigis unu eseon kaj du mallongajn rakontojn en Literatura Vivo n-ro 11. Li estas profesia kuiristo.

- Torine RAHARISOA (konata ĉe Facebook kiel Aly Light, naskiĝis 21.02.2008) verkis ekde novembro 2025 sian vivrakonton „Sub la pluvo, kie naskiĝas miaj revoj“. Ŝi aperos kiel 80-ĝis 100-paĝa libro antaŭvideble en julio 2026. Ŝi estas lernantino kaj nuntempe faras sian abituriantan ekzamenon.

- Nasandratra Patrick RANDRIAMIZAKA (naskiĝis 05.11.2004) publikigis poemojn en Literatura Vivo n-ro 11 kaj 12. Li estas frato de Célestine Fanjasoa kaj studas administradon en Antananarivo.

- Ranja ZAFINIFOTSY (konata ĉe Facebook kiel Ranja Arc Lydie, naskiĝis 18.07.1996) verkis kvin librojn en Esperanto. Detalaj informoj pri ŝi troviĝas en Vikipedio.

Krom ili, jam pliaj malagasaj gejunuloj (Elysa, Myriame kaj Odilon) montris verkistan talenton per etaj verkoj ankoraŭ ne publikigitaj aŭ – kiel la 18-jara studentino Jenna Randimbison – per belega raporto aperonta en la Revuo Esperanto.

### **Komunaj trajtoj de la aŭtoroj kaj verkoj**

Fanja, Navalona, Avotra, Erica, Torine, Nasandratra, Myriame, Odilon kaj Jenna lernis Esperanton rekte aŭ nerekte danke al Ranja. Pluraj el ili mencias tion ankaŭ en siaj verkoj.

„Ŝi bonvenigis min per rideto kaj varmeco, kaj de tiu momento mi eĉ pli vigle komencis lerni la lingvon“, skribas Avotra, dum Erica emfazas: „Amikeco kun ŝi baziĝas sur kompreno, respekto kaj sincera deziro vidi min kreski.“ Ankaŭ Torine tre laŭdas ŝin: „Super ĉio, mi estas tre dankema al sinjorino Ranja, ĉar ŝi estis tiu, kiu montris al mi la ĝustan vojon, kaj ŝi estas unu el la instrumentoj, kiujn Dio uzis por kuraĝigi min kaj helpi min konstrui novajn rilatojn. Ŝi estas vera beno por mi.“

Malagasio estas lando, kie 80 % de la loĝantoj devas vivi de malpli ol 2 € tage. Navalona, Torine, Fanja, Nasandratra kaj Myriame vivas en aparte malriĉa kvartalo de Antananarivo, Anosibe, kie ili povis viziti lernejon por malriĉaj infanoj, kiun financas franca fondaĵo. La direktorino de tiu lernejo estas ĝuste Ranja, kiu emfazas, ke multaj familioj tie enspezas eĉ ne 100 € monate. Ne estas mirige, ke malagasaj gejunuloj havas ofte tre malfacilan vivon. Al materiaj mankoj – iuj travivis eĉ tempojn de malsato – aldoniĝas problemoj kiel soleco, humiligoj aŭ perforto. Iliaj verkoj baziĝas sur sufero, kiun ili mem travivis.

En tiu malfacila vivo, Esperanto aperas kiel espero. Kiam malagasaj gejunuloj donas al siaj verkoj titolojn kiel „Lumoj post la ombroj“ (Erica) aŭ „De larmoj al lumo“ (Avotra), tiu „lumo“ povas esti nur Esperanto aŭ la kristana fido – aŭ ambaŭ. Ĉiuj malagasaj Esperanto-verkistoj estas kristanoj, kaj ilia fido esprimiĝas diversloke en iliaj rakontoj.

Jen ekzemplo en „Floroj en mizero“ de Navalona: „Kaj mi vere sentis tion: Dio estas tie. Li gardas. Li donas al ili forton. Li benis ilin, paŝon post paŝo. Ĉio iris bone. La bebo estis sana. Kaj eĉ se mono mankis, eĉ se nenio estis preparita... ni trovis ĝuste tion, kion ni bezonis. Kvazaŭ ĉio estis en Liaj manoj.“

En sia aperonta libro „Sub la pluvo“ Torine montras ne nur profundan kristanan fidon, sed ankaŭ saĝon kaj animan maturecon: „Mi pardonis lin ĉar, malgraŭ ĉio, li estas ankoraŭ mia patro – kaj mi kredas, ke pardono estas unu el la plej grandaj fortoj, kiujn Dio povas meti en la koron de infano.“ Simile impresas ŝiaj vortoj pri amrilato, kiu finiĝis jam antaŭ ol ĝi povis ekflori: „Mi ankoraŭ amas lin, ĉar mi amis lin per la amo de Jesuo, kaj la amo de Jesuo estas eterna. Kaj vera amo neniam fariĝas malamo.“

Kompare kun la ĉefaj malnovaj skoloj de esperantaj verkistoj – la Budapeŝta Skolo, la Skota Skolo kaj la Ibera Skolo – surprizas la fakto, ke la Malagasa Skolo konsistas ĉefe el virinoj. Alia diferenco estas, ke niaj malagasaj verkistoj ne estas erudiciuloj pri nia esperanta kulturo kaj la monda literaturo, sed simple verkas kun saĝo kaj bona koro. Pro tio, por iuj povus aspekti aŭdace aŭ eĉ megalomanie kompari la „Malagasan Skolon“ kun skoloj, kiuj alportis al nia esperanta kulturo ekzemple la plej altnivelan poezion.

Tamen ankaŭ en la malagasaj verkoj eblas trovi multon valoran, kaj ili jam trovis sian lokon en la esperanta merkato: Laŭ la furorlisto de la Libroservo de UEA laŭ stato de la 14-a de majo 2026, kvar el la 15 plej vendataj verkoj venas el Malagasio. La „Amikaro de Ranja“, ene de kiu aperis nia skolo, konsistigas tre gravan kaj prosperan parton de la malagasa Esperanto-movado. Ĝi daŭre kreskas kvante kaj kvalite, kaj ni povas ankoraŭ multon atendi, ĉar niaj malagasaj verkistoj estas ankoraŭ tre junaj. ♦

Dekstre:  
Titolpaĝoj de tri  
libroj - la lasta de  
Torine ankoraŭ  
ne aperis.





En la tre modesta unuĉambra dometo de la familio de Nasandratra kaj Fanja (kiu forestis tiam), videblas i.a. Avotra, Navalona, Nasandratra, Myriame, Erica kaj Ranja.



Ulrich kun Avotra, Torine, Navalona kaj Ranja



Torine, Myriame kaj Navalona



Vizito en la dometo de Torine - kun ŝi, ŝiaj familianoj, Elysa, Navalona, Ulrich kaj Ranja



Ranja, Nasandratra kaj Fanja



Ranja, Ulrich kaj Navalona

# Miaj poemoj

Erika Godó



## Amletero neniam sendita

Mi skribis al vi dum silenta nokt',  
kun tremanta mano kaj kaŝita vund'.  
La vortoj fluis kiel pluva river',  
sed restis en tirkesto ĝis la maten'fer'.  
Mi volis rakonti pri ĉio al vi,  
kiel via rideto fariĝis por mi.  
Pli hela ol suno ĉe frua maten',  
pli milda ol vento en somera ĝarden'.  
Sed timo sidis inter ĉiu fraz',  
ĝi ŝtelis la voĉon el mia kuraĝ'.  
Kaj ĉiu "mi amas" fariĝis nur fum',  
perdita en nokto sen stelo kaj lum'.  
Do ĝi restis la letero kun faldita rand',  
flaviĝanta silente sub polvo de la temp'  
Vi neniam legis la veron de mia am',  
sed ĉiu vorto restas eterne en mia kor'.



## Kial mi fariĝis poeto?

**M**i ne elektis tion per unu decido,  
 ĝi venis malrapide, sen bruo, sen signo.  
 Inter silentoj kaj pensoj sen form',  
 io en mi lernis alian norm'.  
 Mi vidis la mondon ne nur kiel ĝi estas,  
 sed kiel ĝi doloras, kiel ĝi restas.  
 Ĉiu et'-detalo fariĝis signif',  
 ĉiu moment' iĝis kaŝita motiv'.  
 Mi ne trovis respondojn en simpla parol',  
 do mi serĉis ilin en ritmo kaj rol'.

Kaj vortoj komencis mem kunveni,  
 kvazaŭ la sentoj volus sin konveni.  
 Eble poeto ne estas nomo aŭ rang',  
 sed manier' rigardi la saman kamp'.  
 Kaj se en mi naskiĝis ĉi tiu bezon',  
 tio signifas: mi aŭskultas la koron.



# Tradukoj de Kirilo Brosch



*Konstantinos Kavafis (Κωνσταντίνος Καβάφης)*

## La urbo (η πόλις)

Vi diris: „Mi iros al alia lando, mi iros trans alian maron.  
Alia urbo troviĝos pli bona ol ĉi tiu.  
Ĉiu klopodo mia estas sub verdikto;  
kaj mia koro – kvazaŭ mortinta – estas entombigita.  
Kiom da tempo mia menso en tia putrado restos?  
Kien ajn okulojn miajn mi fiksdirektas, kien ajn mi rigardas,  
mi ekvidas nigrajn ruinojn de mia vivo ĉi tie,  
kie tiomajn jarojn mi vivis kaj disipis kaj perdis.“  
Novajn ejojn vi ne trovos, vi ne trovos aliajn marojn.  
La urbo vin sekvos. Vi irados en stratoj  
samecaj. Kaj en la samecaj kvartaloj vi irados;  
kaj en samecaj domoj tiuj viaj haroj griziĝos.  
Ĝuste ĉi tiun urbon vi atingos ĉiam. Por iu alia – ne esperu –  
ne ekzistas ŝipo por vi, ne ekzistas vojo.  
Kiel vi disipis vian vivon ĉi tie,  
en tiu eta konkaĵo, ĉie en la mondo ĝin disipos vi.



*Henriko Hejno (Heinrich Heine)*

## La sileziaj teksistoj (Die schlesischen Weber)

Sen larmoj estas la okuloj,  
 sed dentogrincante laboras teksuloj:  
 Ŝtato, morttukon nun teksas ni  
 Enteksas malbenon ni foje tri  
 Ni teksas, ni teksas!  
 Malben' al la Dio, al kiu ni gestis  
 Dum frostis ni kaj sen manĝo estis;  
 Ni vane esperis, atendis sen fin',  
 Dum ĝi nur kun mok' kaj kun fals' trompis nin  
 Ni teksas, ni teksas!  
 Malben' al la reĝ', amik' de moneroj,  
 Kiun ne tuŝis ĉi niaj mizeroj,  
 Kiu lastan monon prenas de ni,  
 Nin mortpafigas sen empati' -  
 Ni teksas, ni teksas!  
 Malben' al hejmoland' malvera,  
 Kie prosperas nur hont' malsincera,  
 Kaj frue velkas ĉiu verd',  
 Nur vermojn freŝigas la putra merd' -  
 Ni teksas, ni teksas!  
 Navedo hastas, teksilo sin fleksas,  
 Ni tage, nokte fervore teksas -  
 Ŝtataĉo, morttukon nun teksas ni  
 Enteksas malbenon ni foje tri  
 Ni teksas, ni teksas!



*Tradukis:*

*Kirilo Brosch*

# La burĝonaĝo de fraŭlino Johana Brodi (5)

*Daŭrigante la enhavon de numero 011*

Verkis: Muriel Spark Tradukis: Detlef Karthaus

## Ĉapitro 3



La tagoj pasis kaj la vento blovis de la rivero Forth. Oni ne supozu ke f-ino Brodi estis unika en ĉi tiu tempopunkto de sia burĝonaĝo, aŭ ke (nu tiaj aferoj estas relativaj) ŝi iel frenezigiĝis. Ŝi estis unika nur pro tio ke ŝi instruis en lernejo kia Marcia Blaine. Ekzistis legioj de ŝia speco dum la 1930-aj jaroj, virinoj tridekjaraĝaj kaj pli, kies edziniĝebleco estis rabita de la milito kaj kies oldfraŭlineco estis nun plenigita de esplorvojaĝoj, en novajn ideojn, kaj agado en arto aŭ sociaj servoj, edukado aŭ religio. La progresemaj oldfraŭlinoj de Edinburgo ne instruis en lernejoj, precipe ne en lernejoj de tradicia karaktero kiel la Lernejo Marcia Blaine por Knabinoj. Estis pro tio ke f-ino Brodi, laŭ la cetera filistra, oldfraŭlineca instruistaro ne estis ekzakte en la ĝusta loko. Sed ŝi ja estis en la ĝusta loko inter siaj propraj samideanoj: la viglaj filinoj de mortintaj aŭ kadukintaj negocistoj, sacerdotoj, universitataj profesoroj, kuracistoj, pasintaj posedantoj de grandmagazenoj, aŭ la posedantoj de fiŝfirmaoj kiuj heredigis al tiuj filinoj sagacon, ruĝajn vangojn, konstitucion de ĉevalo, logikan edukadon, kuraĝan spiriton kaj kapitalhavaĵon. Oni povus vidi ilin, je la tria horo posttagmeze, kliniĝi super la demokrataj vendotabloj de Edinburgaj manĝaĵbutikoj diskutante kun la estro pri ĉiaj temoj ekde la aŭtentikeco de la Sanktaj Skriboj ĝis la demando kion vere signifas la vorto 'garantiita' sur glaso de marmelado. Ili ĉeestis prelegojn, provis nutri sin per mieloj kaj nuksoj, lernis la germanan kaj poste transvagis Germanujon; ili aĉetis ruldomon kaj forveturis en la montetojn inter la lagojn; ili ludis gitaron, ili subtenis ĉiujn novajn teatrajn kompaniojn; ili luis loĝejon en la kvartalaĉoj, kaj disdonante farbotojn, instruis al siaj najbaroj la arton de simpla dekorado de la loĝejo; ili laŭdis la inventaĵojn de Marie Stopes;<sup>1</sup> ili ĉeestis kunvenojn de la Oxford Group<sup>2</sup> kaj profitis de ilia aĝle akuta vidkapablo por testi spiritismon. Iuj helpis en la Skota Nacia Movado;<sup>3</sup> aliaj, kiel f-ino Brodi nomis sin Eŭropanoj kaj nomis Edinburgo eŭropa ĉefurbo, la urbo de Hume<sup>4</sup> kaj Boswell.<sup>5</sup> Ili tamen, ne partoprenis en komitatoj. Ili ne fariĝis instruistoj. La komitat-fraŭlinoj estis malpli entreprenema kaj tute ne rebelema; ili estis sobraj preĝefideluloj kaj kvietaj laborantoj. La instruistinoj estis eĉ pli trankvile retenema; ili gajnis sian panon, loĝis kun maljunaj gepatroj, promenis en la montetoj kaj feris en North Berwick.

Sed tiuj de la speco de f-ino Brodi estis grandaj parolantoj kaj feministoj, kaj kiel la plej multo de feministoj ili parolis al viroj kvazaŭ viro al viro.

'Tion mi diras al vi, s-ro Geddes, naskiĝkontrolado estas la ununura respondo al la problemo de la laboranta klaso. Senpaga disdonado al ĉiu domanaro...'

Kaj ofte en la viglaj nutraĵkomercoj je la tria posttagmeze: 'S-ro Logan, vi ja estas presbitero, sed mi estas virino en sia burĝonaĝo, do vi povas akcepti de mi, ke oni pli profunde spertas religion en la dimanĉaj koncertoj de Profesoro Tovey<sup>6</sup> ol en viaj mesoj.'

1. Marie Charlotte Carmichael Stopes 1880-1958 brita aŭtoro, paleobotanikisto, proparolanto por eŭgeniko, pioniro pri famiplanado, ŝi estis la unua ina akademiano en la fakultato de la Universitato de Manchester, kaj fondinto de la unua naskiĝkontrol-kliniko en Britio.

2. Kristana organizo fondita de usona misionisto Dr. Frank Buchman. Vidu piednoto 1.

3. Angle: Scottish National Movement (SNM) estis politika organizo kiu kampanjis por skota sendependeco en la 1920-aj jaroj.

4. David Hume 1711-1776 naskiĝis en Edinburgo, filozofa, ekonomista kaj historiisto kaj unu el la plej gravaj reprezentantoj de Skota Klerismo. Vikipedio

5. James Boswell 1740 -1795, verkisto, naskiĝis en Edinburgo; el lia verkaro plej famas la biografio pri Samuel Johnson.

6. Sir Donald Francis Tovey 1875-1940 brita muzikisto, komponisto kaj profesoro de muziko, mortis en Edinburgo.

Do, el tiu vidpunkto, oni vidis de ekstere nenion strangan pri f-ino Brodi. Ŝia interno estis alia afero, kaj estis vidota al kiaj ekstremoj ŝia naturo puŝis ŝin. De ekstere ŝi malsamis de la cetero de la instruistaro pro tio ke ŝi ankoraŭ troviĝis en stato de fluktanta evoluado, dum ili tro kompreneble ne plu havis memfidon por ŝanĝi siajn opiniojn, precipe pri etikaj demandoj, post la aĝo de dudek. Fraŭlino Brodi ankoraŭ povus lerni ĉion lernindan, kaj ŝi fanfaronis pri tio. Kaj tiu ne estis ia fraŭlino Brodi elĉerpita de evolupovo kiam ŝi diris al siaj knabinoj, 'Ĉi tiuj estas miaj burĝonadaj jaroj. Vi profitas de mia burĝonaĝo,' sed ŝia esenco estis kreskanta sub la okuloj de la knabinoj, kiuj ankoraŭ edukiĝis. Tiu burĝonaĝo de f-ino Brodi daŭris kaj ŝi ankoraŭ evoluiĝis kiam la knabinoj jam fariĝis dekkelkjaruloj. Kaj la principoj kiuj regis la finon de ŝia burĝonaĝo estus miriginta ŝin je la komenco de ŝia kariero. En la someraj ferioj de mil naŭcent tridek unu okazis la unua datreveno de la komenco de la burĝonjaroj de f-ino Brodi. La venonta jaro fariĝis diversmaniere la jaro kun la plej seksaj spertoj de la Brodiaro, kiu nun aĝis dek unu kaj dek du jaroj. Tiu jaro estis plenplena de ekscitigaj spertoj. En postaj jaroj sekso estis nur unu afero en la vivo. En tiu jaro ĝi signifis ĉion.

La semestro komenciĝis vikle kiel kutime. Fraŭlino Brodi staris sunbrunigita antaŭ sia klaso kaj diris, 'Mi refoje pasigis la plej grandan parton de la someraj ferioj en Italujo, kaj unu semajnon en Londono, kaj mi akiris multajn bildojn, kiujn mi povas afiŝi sur la muro. Jen estas Cimabue.<sup>7</sup> Jen pli granda grupo de la faŝistoj de Mussolini; ĉi tiu bildo estas pli impona ol tiu de lastjare. Ili faras mirindajn aferojn kiel mi klarigos al vi poste. Kun miaj amikoj ni ricevis aŭdiencon de la papo. Miaj amikoj kisis lian ringon, sed mi pensis ke estus pli konvena nur kliniĝi super ĝi. Mi portis longan nigran robon kun mantilo,<sup>8</sup> kaj mi aspektis grandioza. En Londono miaj amikoj kiuj estas bonhavaĵoj — ilia filineto havas du vartistinojn, aŭ nannies kiel ili diras en Anglujo — venigis min por viziti A.A. Milne.<sup>9</sup> En la halo pendis reprodukto de pentraĵo de Botticelli<sup>10</sup> nomita Primavera, kiu signifas La naskiĝo de printempo.<sup>11</sup> Mi portis mian silkan robon kun la ruĝaj papavoj, kio ĝuste konvenas al mia vizaĝkoloro. Mussolini estas unu el la plej grandaj viroj en la mondo, multe pli ol Ramsay MacDonald<sup>12</sup> kaj liaj faŝistoj —'

'Bonan matenon, f-ino Brodi. Bonan matenon, sidiĝu knabinoj,' diris la direktorino, kiu estis haste enirinta, lasinte la pordon larĝe malfermita. Fraŭlino Brodi preterpasis malantaŭ ŝi kun la kapo laŭeble plej supren, kaj fermis la pordon kun ekstrema signifo.

'Mi nur volas enrigardi preterpasante,' diris f-ino Mackay, 'kaj mi devas pluiri. Nu, knabinoj, ĉi tiu estas la unua tago de la nova studperiodo. Ĉu ni malkuraĝas? Ne. Vi knabinoj devas diligente labori ĉijare pri ĉiu studobjekto kaj brile sukcesi en via kvalifika ekzameno. Venontjare vi estos en la Progresinta Sekcio, memoru. Mi esperas, ke vi ĉiuj spertis belajn somerferiojn; vi ĉiuj aspektas bele bronzitaj. Mi esperas, ke en taŭga tempo mi povos legi viajn eseojn pri kiel vi pasigis la feriojn.'

Kiam ŝi estis elirinta, f-ino Brodi fiksrigardis la pordon dum longa tempo. Iu knabino, ne en la Brodiaro, nomita Judit subridis. Fraŭlino Brodi diris al Judit, 'Tio sufiĉas.' Al la kretotabulo ŝi turnis sin kaj kun viŝilo forigis aritmetikan problemon pri longa divido, kiun ŝi ĉiam havis sur la tabulo antaŭvidante iun entrudulon de ekstere dum aritmetika leciono kiam f-ino Brodi ne estus instruanta aritmetikon. Farinte tion ŝi denove turnis sin al la klaso kaj diris, 'Ĉu ni malkuraĝas? ne, ĉu ni malfeliĉas? ne. Kiel mi diris antaŭe, Mussolini plenumis eksterordinaran heroaĵon kaj senlaboreco malpliigis sub lia gvido pli ol ĝi estis lastjare. Mi povos rakonti al vi tre multe dum ĉi tiu semestro.'

7. Cimabue ĉ. 1240 – 1302, konata ankaŭ kiel Cenni di Pepo aŭ Cenni di Pepi — itala pentristo kaj desegnisto de mozaikoj el Florenco.

8. mantil/o — Larĝa punta tuko, uzata de hispanaj virinoj k kovranta la kapon k la ŝultrojn PIV

9. A. A. Milne 1882-1956 — angla verkisto famiĝis ĉefe pro siaj infanlibroj, precipe la du libroj pri la urso Winnie-la-Pu. Vikipedio

10. Sandro Botticelli 1445-1510 — itala pentristo en Florenco dum la frua renesanco. Vikipedio

11. Fakte "Primavera" signifas nur "printempo". Sed ekzistas simila pentraĵo nomita "Naskiĝo de Venuso".

12. Ramsay MacDonald 1866-1937 estis brita ŝtatisto kaj ĉefministro en 1924, 1929 - 31 kaj 1931 - 35. Vikipedio

Kiel vi scias, mi ne kredas ke paroli infanece al infanoj taŭgas; vi kapablas kompreni multe pli ol plenkreskuloj ĝenerale supozas. Edukado signifas elkonduko, de e, el kaj duco, mi kondukas. Senkonsidere al la kvalifika ekzameno vi profitus de miaj travivaĵoj en Italujo. En Romo mi vidis la forumon kaj mi vidis la Koloseon, kie gladiatoroj mortis kaj sklavoj estis ĵetitaj antaŭ la leonoj. Vulgara usonano rimarkis al mi, “Tio aspektas kiel belega ŝtonminejo.” Ili parolas nazale. Mary kion signifas paroli nazale?”

Mary ne sciis.

‘Malkomprenema kiel ĉiam,’ diris f-ino Brodi, ‘Eŭnike?’

‘Paroli per nazosonoj,’ diris Eŭnike.

‘Bonvolu respondi per kompleta frazo,’ diris fraŭlino Brodi. ‘Ĉijare mi opinias, ke vi ĉiuj devus komenci respondi per kompletaj frazoj. Mi devas peni ĉiam memori ĉi tiun regulon. Via ĝusta respondo estas “Paroli nazale signifas paroli per nazosonoj.” La usonano diris, “Tio aspektas kiel belega ŝtonminejo.” Ho! Estis tie, kie la gladiatoroj batalis. “Saluton Cezaro!” ili kriis. La mortontoj salutas vin!”’

Fraŭlino Brodi staris en sia bruna robo kiel gladiatoro kun levita brako kaj okuloj brilantaj kiel glavo. ‘Saluton Cezaro!’ ŝi kriis refoje turnante sian brilantan vizaĝon al la fenestrolumo, kvazaŭ Cezaro sidis tie. ‘Kiu malfermis la fenestron?’ diris f-ino Brodi mallevente la brakon.

Neniu respondis.

‘Kiu ajn malfermis la fenestron, malfermis ĝin tro larĝe,’ diris f-ino Brodi. ‘Ses koloroj perfekte konformas al la cirkonstancoj. Pli estas vulgara. Oni devus havi bonan instinkton pri tiaj aferoj. Laŭ la horaro ni devus nun okupiĝi pri historio. Ekprenu viajn historilibrojn malfermajn ĉemane. Mi rakontos al vi iom pli pri Italujo. Mi renkontis junan poeton apud fontano. Jen bildo de Dante renkontante Beatrice — oni prononcas tion Beatrice en la itala kio tre beligas la nomon — sur la Ponte Vecchio.<sup>13</sup> Li enamiĝis kun ŝi en tiu momento. Mary, sidu rekte kaj ne tiel bubaĉe. Tio estis sublima momento en sublima amo. Kiu pentris tiun bildon?’

Neniu sciis.

‘Ĝi estis pentrita de Rossetti.<sup>14</sup> Kiu estis Rossetti, Ĵenja?’

‘Pentristo,’ diris Ĵenja.

Fraŭlino Brodi suspekto mienis.

‘Kaj geniulo,’ diris Sandra, por savi Ĵenja.

‘Amiko de —?’ diris fraŭlino Brodi.

‘Swinburne,<sup>15</sup> diris iu knabino.

Fraŭlino Brodi ridetis. ‘Vi ne forgesis,’ ŝi diris, rigardante ĉirkaŭ la klasĉambro. ‘Ĉu ferioj aŭ ne. Lasu la historilibrojn malfermajn en okazo ke envenos aliaj entruduloj.’ Ŝi rigardis malaprobinde al la pordo kaj levis sian finan malhelan Romianan kapon kun digno. Ŝi jam ofte rakontis al la knabinoj ke ŝia mortinta Hugo admiris ŝian kapon pro ĝia Romiana aspekto.

‘Venontjare,’ ŝi diris, ‘vi havos specialistojn por instrui al vi historion kaj matematikon kaj lingvojn, unu instruisto por unu fako kaj alia instruisto por alia fako; la instruperiodo daŭros kvardek kvin minutojn por ĉi tiu, kaj same por la aliaj. Sed en ĉi tiu, via lasta jaro kun mi, vi ricevus la fruktojn de mia burĝonaĝo. Tiuj fruktoj restos kun vi dum la daŭro de via vivo. Unue, tamen, mi devas registri la ĉeestantojn antaŭ ol mi forgesas. Ni havas du novajn knabinojn. Stariĝu vi novaj knabinoj.’

Ili stariĝis grandokule dum f-ino Brodi sidiĝis ĉe sia skribotablo. ‘Vi al kutimiĝos al niaj farmanieroj. Al kiu religio vi apartenas?’ diris f-ino Brodi kun sia plumo en pozicio sur la paĝo dum, ekstere en la ĉielo, la mevoj de la estuaro de la rivero Forth cirkulis super la lernejo kaj la verdaj kaj oraj arbopintoj balanciĝis al la fenestroj.

‘Venu velkanta aŭtuno, vestite grize kaj flave, Kaj kontraŭ kadukanta kamparo kvietigu min brave.

13. Ponte Vecchio — prononcu Ponte Vekĵo = Ponto malnova.

14. Dante Gabriel Rossetti, 1828-1882 brita poeto kaj pentristo.

15. Algernon Charles Swinburne, 1837-1909 angla poeto kaj romanisto. Li verkis pri multaj tabuaj temoj kiel lesbanismo, kanibalismo, sado-masohismo, kaj kontraŭkristanismo, kio kaŭzis literaran skandalon.

—Robert Burns,<sup>16</sup> diris f-ino Brodi post kiam ŝi fermis la registrolibron. ‘Ni troviĝas nun en la 1930-aj jaroj. Mi havas kvar funtojn da rozruĝaj pomoj en mia skribotablo, donaco el la fruktoĝardeno de s-ro Lowther; ni manĝu ilin tuj dum neniu lupu minacas — kio ne signifas ke la pomoj ne estas sub mia propra jurisdikcio, sed diskreteco estas ... diskreteco estas... Sandra?’

‘La plej bona parto de kuraĝo,<sup>16</sup> f-ino Brodi.’ Ŝiaj etaj okuloj nur rigardetis fraŭlinon Brodi. Eĉ antaŭ la oficiala komenco de la burĝonaĝo de f-ino Brodi, ŝiaj kolegoj en la Elementa Lernejo iom post iom forturnis sin de ŝi. La instruistaro de la Progresinta Sekcio estis indiferenta aŭ milde amuzita, ĉar ili ankoraŭ ne sentis la influon de la Brodiaro; tio estis okazonta la sekvantan jaron, kaj eĉ tiam ĉi tiuj instruistinoj de la Progresinta Sekcio ne estis tro irititaj per la efikoj de kio ili nomiĝas la eksperimentaj metodoj de f-ino Brodi. Estis en la Elementa Lernejo, inter la malpli bone pagitaj kaj malpli kvalifikitaj virinoj, kun kiuj f-ino Brodi interagis tagtage, ke indigno bolis. Du esceptoj troviĝis inter la instruistaro, kiuj sentis nek rankoron nek indiferecon al f-ino Brodi, sed male estis ŝiaj subtenantoj ĉiuokaze. Unu el tiu estis s-ro Gordon Lowther, la muzikinstruisto por la tuta lernejo, la Elementa kaj Progresinta. La alia estis s-ro Teddy Lloyd, la artinstruisto de la Altbazaj knabinoj. Ili estis la solaj viroj inter la instruistaro. Ambaŭ jam enamiĝis iomete en fraŭlinon Brodi, ĉar ili trovis en ŝi la ununuran sekskapablan objekton en ilia ĉiutaga ĉirkaŭaĵo, kaj kvankam ili ne konsciis pri tio, ili ambaŭ komencis konduti kvazaŭ rivaloj por komplezi al ŝi. Sed ĝis nun, ili ne kaptis ŝian atenton kiel viroj; ŝi konis ilin nur kiel subtenantoj, kaj estis fiere dankema. Estis la Brodiaro kiu perceptis antaŭ ŝi, kaj certe antaŭ ĉi tiuj viroj, ke s-ro Lowther kaj s-ro Lloyd penis aperi kiel eble plej impona antaŭ ŝi, ĉiu kvazaŭ ekskluzive rajtigita.

Al la Brodiaro, Gordon Lowther kaj Teddy Lloyd aspektis sufiĉe simile ĝis montriĝis, pro daŭra interkonatiĝo, ke ili aspektis tre malsame. Ambaŭ havis ruĝ-oran harkoloron. Teddy Lloyd, la artinstruisto, havis pli bonan figuron, pli bonajn trajtojn kaj estis pli monduma. Laŭdire li estis duone kimra, duone angla. Li parolis per raŭka voĉo kvazaŭ ĉiam suferante de bronkito. Ora antaŭbuklo falis super lian frunton kaj okulojn. Plej mirinde estis ke li havis nur unu brakon, la dekstran, per kiu li pentris. La alia estis maniko ŝtopita en lian poŝon. Li perdis la enhavon de la maniko dum la Granda Milito. La klaso de f-ino Brodi nur unufoje havis la okazon ekzameni lin pli proksime, eĉ tiam nur en malbrila lumo, ĉar la rulkurtenoj estis kuntiritaj por permesi al s-ro Lloyd prezenti siajn lumbildojn. Ili marŝis en la artoĉambron, kondukitaj de f-ino Brodi, kiu intencis sidi kun la knabinoj je la fino de unu benko, kiam la artinstruisto alproksimiĝis kun seĝo por ŝi, portita per lia unu mano kaj prezentis ĝin en speciala maniero kun eta genuflekso kiel lakeo. Fraŭlino Brodi sidiĝis noble kiel la statuo de Britannia<sup>17</sup> kun apartigitaj kruoj sub ŝia loza bruna jupo kiu bone kovris la genuojn. S-ro Lloyd prezentis bildojn de ekspozicio pri itala arto en Londono. Li havis indikilon per kiu li indikis la dezajnon de la bildo kaj priskribis tion kun sia raŭka voĉo. Li diris nenion pri kio la bildo reprezentis, kaj nur sekvis ĉiun kurbon kaj linion ĝis la punkto kie la artisto interrompis ĝin — eble ĉe la loko de kubuto, kaj daŭrigis ĝin — eble ĉe la rando de nuboj aŭ la dorso de seĝo. La sinjorinoj en la Primavera, en retpilk-ludanta pozicio provizis al s-ro Lloyd multajn indikendajn liniojn. Li daŭre pasigis la indikilon laŭ la linioj de iliaj postajoj kiuj estis videblaj tra la ŝtofo. La trian fojon kiam li faris tion, kolektiva kurento de amuziĝo kuris laŭlonge de la unua vico de knabinoj, kaj tiam disvastiĝis al la malantaŭaj vicoj. Per fermitaj buŝoj ili provis subpremi tiajn konvulsiojn, sed ju pli kunpremitaj la lipoj des pli la ekblovetoj de humoro eskapis tra la nazo. S-ro Lloyd ĉirkaŭrigardis kun ofendita iritiĝo.

‘Estas evidente,’ diris f-ino Brodi, ‘ke ĉi tiuj knabinoj ne venas el kulturaj hejmoj kaj kultura heredaĵo. La filiŝtoj ĉirkaŭas nin, s-ro Lloyd,’

16. Komuna angla esprimo: "Discretion is the better part of valor" = Plibonas eviti danĝeron ol konfronti ĝin.

17. Britannia estas ina figuro reprezentanta la personigon de la Unuiĝinta Reĝlando.

La knabinoj, kiuj tre volis deveni de kulturaj kaj senseksaj prauloj, tuj trankviliĝis pro tia ŝoka rimarko. Sed senhezite s-ro Lloyd daŭrigis sian prezenton de artista formo, kaj denove tiris la montrilon ĉirkaŭ la ŝtofkovritaj hontindaj partoj de unu el la inaj subjektoj de Botticelli; Sandra simulis tusatakon, kiel ankaŭ pluraj knabinoj malantaŭ ŝi. Aliaj palpadis sub siaj seĝoj kvazaŭ serĉante ion falintan. Agnoskite ke unu aŭ du apogis sin unu kontraŭ la alia kaj subridis kun la mano senhelpe kovrinta la buŝon.


'Vi surprizas min, Sandra,' diris f-ino Brodi. 'Mi ĉiam taksis vin imitinda modelo en la grupo.'



Sandra, meze de sia tusado, levis la okulojn kun hipokriteca palpebrumado. Tamen f-ino Brodi nun jam celis je Mary Macgregor kiu sidis plej proksime al ŝi. La subridado de Mary estis kaŭzita pro kontaĝo, ĉar ŝi estis tro sensprita por havi ian propran seksosenson, kaj la leciono de s-ro Lloyd neniam estus afektinta ŝin se ĝi ne unue afektus la ceterajn klasanojn. Sed nun ŝi gluglis malkaŝe kiel infano kun maldeca fantazio el senkultura hejmo. Fraŭlino Brodi ekprenis la brakon de Mary, skuante starigis ŝin kaj puŝis ŝin al la pordo kie ŝi pelis ŝin eksteren forbarante ŝin, kaj revenante kvazaŭ la tuta problemo estus solvita. Kaj fakte ĝi estis, ĉar la perforta ago sobrigis la knabinojn kaj sentigis ilin ke, almenaŭ oficiale, nedezirata ĉef-agitisto estis kaptita kaj ili ne plu estis la kulpuloj. ♦

*daŭrigota*

# Vento orienta - Vento okcidenta (12)



Pearl S. Buck



Detlef Karthaus

*ĈAPITRO 15 · Daŭrigante la enhavon de numero 011.*

*Pearl S. Buck · elangligis Detlef Karthaus*

**H**odiaŭ mi estas laca kaj elĉerpita, Fratinjo. Mia koro sentas sin kvazaŭ harpa kordo estis trostreĉita dum multaj tagoj kaj nun subite malstreĉigita, tiel ke muziko mortis en ĝi.

La horo kiun mi timis estas pasinta! Ne, mi ne parolos pri la rezulto de tiu horo. Mi rivelos la tutan aferon, kaj tiam vi povos mem juĝi. Sed mi ne rakontos la finon antaŭ la komenco.

Ni sendis la mesaĝiston al niaj gepatroj, kun la permesopeto, ke ni prezentu nin la postan tagon je tagmezo. Li revenis dirante ke nia patro foriris el la hejmo cele al Tjanĝino<sup>1</sup>, tuj kiam li aŭdis pri la alveno de mia frato. Tiel li evitis la malfacilan momenton – tiel li ĉiam evitis decidojn! Anstataŭe nia patrino precizigis la tagmezan horon kiam ŝi ricevos mian fraton kaj min. Pri la fremdulino estis nenia mencio, sed mia frato kriis:

“Se mi iros, mia edzino ankaŭ iros!

Mi do iris unue la venontan tagon je la indikita horo, kaj servanto portis antaŭ mi donacojn. Mia frato elektis tiujn donacojn en fremdaj landoj, kaj ili estis ĉiuj kuriozaj kaj beletaj aĵoj ne ofte viditaj en nia urbo: malgranda origita horloĝo muntita en la stomako de origita infano, la tuto ne pli alta ol ses coloj; brakhorloĝo lerte brodita per juveloj; maŝino, kiam streĉita per tenilo, povus paroli kaj krii; lumo kiu renovigis sin sen fajro, kiel ajn longe ĝi jam brilis; kaj ventumilo de strutaj plumoj, blankaj kiel nubo de pirfloroj.

Mi prezentis min al ŝi kun tiuj donacoj. Nia patrino estis sendinta mesaĝon, ke ŝi ricevos nin en la gasthalo, kaj dum mi eniris, ŝi tie sidis en peza skulptita ebena seĝo, dekstre de la tablo sub la pentraĵo de la imperiestro de la dinastio Ming. Ŝi estis vestita en nigra satena brokaĵo, kaj en ŝia hararo estis oraj ornamaĵoj. Ĉe la manoj troviĝis multaj oraj ringoj, kun rubenoj kaj topazoj, ŝtonoj konvenaj al la digno de maljunaĝo. Ŝi apogis sin sur lambastono el ebono kaj arĝento. Neniam antaŭe mi vidis ŝin aspekti tiel majeste.

Sed mi bone konis ŝin, kaj mi studis ŝian vizaĝon por vidi kiel estis la vera situacio pri ŝia sano, kaj mia koro febliĝis pro timo. Ŝiaj nigraj vestaĵoj nur reliefigis la diafanan maldikecon de ŝia vizaĝo. Tiel magra ŝi fariĝis, ke ŝiaj lipoj kurbiĝis kiel tiuj de mortinto, kaj ŝiaj okuloj plilarĝiĝis, tiel ke ili aspektis kiel la feblaj kaj enfalintaj okuloj de senespera malsanulo. Sur la fingroj la ringoj pendis loze kaj tintis unu kontraŭ la aliaj, kvazaŭ ia obtuza muziko, kiam ŝi movis la manojn. Mi volis demandi kiel ŝi fartas, sed mi ne aŭdacis, sciante ke tio iritus ŝin. Ŝi devis kolekti siajn nervojn por ĉi tiu renkontiĝo, kaj ŝi bezonis sian forton.

<sup>1</sup> Tjanĝino (Ĉine: 天津; pinjine: Tianjin; poŝtnomo: Tientsin, grava havenurbo en norda Ĉinujo. Vikipedio

Tial, kiam ŝi ricevis min senvorte, mi prezentis la donacojn, prenante ilin unuope el la mano de servisto kaj metante ilin antaŭ ŝi. Ŝi agnoskis tion per solena kapklino, kaj sen ekzameni ilin ŝi gestis al siaj propraj servistoj starantaj proksime, forpreni ilin al alia ĉambro. Sed ŝia donacakcepto jam iom kuraĝigis min. Malakcepto, en la lingvo de donacado, signifus klaran rifuzon de la peto de mia frato.

“Mia honorinda patrino, via filo estas ĉi tie kaj atendas viajn ordonojn.”

“Oni jam informis min! Ŝi respondis fride.

“Li kunvenigis la fremdulinojn”, mi riskis mallaŭte aldoni, pensante ke plibonas tuj riveli la plej malbonon, sed mia koro malkuraĝiĝis.

Ŝi estis silenta. Mi ne povis interpreti ŝian mienon. Ĝi estis sensanĝa.

“Ĉu ili rajtas alproksimiĝi?” mi demandis malesperante, ne sciante kion alian diri krom tio, kiun ni planis.

“Lasu lin alproksimiĝi”, ŝi respondis per la sama tono.

Mi hezitis, ne sciante kiel procedi. En tiu sama momento, ĉu ne la fremdulino estis surloke? Mi iris al la sojlo de la pordo, kie ili estis atendantaj, kaj fortirante la kurtenon, mi raportis al mia frato, kion nia patrino diris, kaj estus pli bone unue veni sola.

Lia vizaĝo sombrigis kaj alprenis tiun aspekton, kiun mi memoras de lia junaĝo kiam io ne plaĉis al li. Li parolis dum momento kun sia edzino en ŝia lingvo. Ŝi levis la brovojn pro liaj vortoj kaj leĝere kuntiriĝis la ŝultrojn, kaj atendante staris trankvile kaj egalanime. Tiam mia frato rapide ekprenis ŝian manon, kaj antaŭ ol mi povis ilin haltigi, ili estis enirintaj.

Kia stranga figuro ŝi estis kiam ŝi eniris la halon de niaj prauloj! Mi krampis min al la kurtenoj, duon-fascinita pro la vidaĵo. Ŝi estis la unua fremdsangulo, kiu transpaŝis tiun sojlon! Cerbumante pri tiu mirindaĵo mi fiksrigardis ŝin, tiel ke dum momento mi forgesis pri mia patrino. Kvankam mi sciis duonkonscie, ke la firmdecido de mia frato ne eniri sola devas tuj haltigi la patrinan simpatian al li kaj ŝian naturan sopiron revidi lin, mi ne povis malhelpi miri pri tiu momento.

La fremdulino portis vestaĵojn el nia lando, elektita de mia frato; mantelon el malhela blua silko, tre peza kaj mola kaj leĝere brodita kun arĝento. Ŝia jupo estis el nigra sateno, tute simpla, sed kun arte pendantaj faldoj, kaj la piedvestoj estis el nigra sateno sen brodaĵo. Super tiuj malhelaj koloroj ŝia haŭto estis blanka – brile blanka kiel perloj en la lunlumo, kaj ŝiaj haroj flagris kiel flavaj flamoj ĉirkaŭ ŝia vizaĝo. Ŝiaj okuloj bluis kiel ŝtorma kaj fulmotondra ĉielo, kaj ŝiaj lipoj pendis fiere kaj trankvile. Ŝi eniris rekta kaj malhumila, kun levita kapo. Ŝiaj okuloj renkontis tiujn de mia patrino sen timo aŭ sen rideto.

Vidante tion, mi premis la manojn kontraŭ la buŝo por subpremi krion. Kial mia frato ne diris al ŝi, ke ŝi devus eniri kun mallevitaj okuloj antaŭ pliaĝulo? Pro lia bono, mi tre bedaŭris ŝian trofieran sintenon. Ŝi eniris kiel la reganta reĝino alproksimiĝas al la imperiestra vidvino.

Mia patrino fiksrigardis la fremdulinon. Iliaj okuloj renkontiĝis, kaj tuj ili deklaris sin malamikoj. Tiam mia patrino arogante forturnis la okulojn kaj rigardis en ia spaco aliflanke de la malferma pordo.

La fremdulino diris ion al mia frato per trankvila voĉo. Mi eksciis poste, ke estis la jena:

“Ĉu mi surgenuiĝu nun?”

Li kapjesis, kaj kune ili surgenuiĝis antaŭ nia patrino, kaj mia frato komencis elbuŝigi la vortojn, kiujn li antaŭe preparis:

“Plej Maljuna kaj Honorinda, mi, via malinda filo revenas el fremdaj landoj por prezenti min antaŭ la afablaj vizaĝoj de miaj gepatroj, laŭ via ordono. Mi feliĉas ke nia patrino trovis konvena akcepti niajn senutilajn donacojn. Mi diras 'niajn' ĉar mi kunvenigis mian edzinon, pri kiu mi skribis pere de amiko. Ŝi venas kiel bofilino de mia patrino. Kvankam en ŝiaj vejnoj fluas fremda sango, ŝi deziras ke mi diru al nia honorinda patrino, ke pro tio ke ŝi estas mia edzino, ŝia koro fariĝis ĉina. Ŝi libervole alprenas la rason kaj tradiciojn de nia familio. Ŝi malagnoskas siajn proprajn. Ŝiaj filoj estos tute kaj senescepte parto de nia ĉiela nacio, civitanoj de la brila respubliko, kaj heredontoj de la Meza Imperio. Ŝi faras sian omaĝon al vi.”

Li turnis sin al la fremdulino, kiu silente atendis dum li parolis, kaj donis al ŝi signalon. Kun grandega digno ŝi kaŭtaŭis<sup>2</sup>, ŝia frunto tuŝante la plankon antaŭ la piedoj de mia patrino. Trifoje ŝi kaŭtaŭis, kaj tiam ŝi kaj mia frato refoje kune trifoje. Tiam ili levigis kaj atendis la vortojn de mia patrino.

Dum longa tempo ŝi diris nenion. Ŝiaj okuloj estis ankoraŭ fiksitaj ĉe la liberaj spacoj en la korto aliflanke de la pordo. Dum minutoj ŝi restis tiel, silenta, orgojla, rekta.

Mi pensas, ke ŝi estis sekrete konfuzita pro la aŭdaco de mia frato, kiu kunvenigis la fremdulinon, post kiam ŝi ordonis ke li venu sola. Mi opinias ke ŝi silentis, ĉar ŝi pripensis kion fari en tiu malfacila momento. Ruĝa makulo aperis sur ŝia vango, kaj ĉe ŝiaj delikataj makzeloj mi vidis kontraŭiĝon de muskolo. Sed en ŝia digna sinteno evidentiĝis nenia ekstera signo de konfuzo.

Ŝi sidis kun ambaŭ manoj falditaj sur la arĝenta kapo de ŝia lambastono. Ŝiaj okuloj ne ŝanceliĝis dum ŝi rigardis super iliaj kapoj. La duopo atendis antaŭ ŝi. La silento en la halo fariĝis peza pro atendado.

Tiam io subite mildigis la severan mienon de mia patrino. Ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis. La koloro malaperis tiel rapide kiel ĝi venis, kaj ŝiaj vangoj fariĝis cindrogrizaj. Unu mano falis senforte en la sinon, ŝiaj okuloj malleviĝis hezite al la planko. Ŝiaj ŝultroj malsupreniĝis, kaj ŝi ŝrumpis iomete en sian seĝon. Ŝi diris feble kaj hastigite:

“Mia filo – mia filo – vi estas ĉiam bonvena en via hejmo. Mi parolos poste; nun vi estas forpermesita.”

<sup>2</sup> kaŭtaŭi – ĉine riverenci sternante sin kun la frunto tuŝante la plankon kiel signo de submetiĝo. El la ĉina 磕头 kētóu = kapofrapo.



Mia frato levis la okulojn al ŝia vizaĝo kaj serĉis tie. Li ne havis akrajn okulojn kiel mi, sed eĉ li sciis, ke io ne estis en ordo. Li hezitis, tiam li ekrigardis min. Mi perceptis, ke li volis paroli pli kaj fari riproĉojn al ŝi pro ŝia kormalmildeco. Sed mi timis pri ŝi. Mi kapneis al li. Tiam li diris vorton al la fremdulino, kaj ili riverencis kaj retirigis.

Mi hastis al la flanko de mia patrino, sed ŝi senvorte gestis ke mi foriru. Mi volis peti ŝian pardonon, sed ŝi ne permesis al mi paroli. Mi povis vidi, ke ŝi estis elĉerpita pro ia sekreta doloro; ŝi ne permesis al mi resti. Mi tial riverencis, kaj malrapide forturniĝis. Sed de la korto mi retrorigardis kaj vidis ŝin malrapide reiri al ŝia privata loĝejo, peze apogante sin sur du sklavojn.

Kun sopiro mi reiris al mia hejmo. Eĉ per pena streĉo de mia penso, mi ne povas imagi la estontecon.

Sed tiu duopo, mia frato kaj la fremdulino, tiuj du, kiuj rompas la koron de mia patrino, ili estis for dum la resto de la tago farante unu el siaj longaj promenoj, kaj ĉe noktigo ili revenis, kaj ni ne interparolis. ♦

*daŭrigota*

# Printempa poemo


*PROLEĈNA PESMA*  
Miriĉ Jadranka / esperantigita



Tilio verdiĝas,  
Ĝojlarmo kolektiĝas  
kiu okulon pinĉas.  
Dum varma pluvo pluvetas.

Verda koloro al ĉiu plezuras.  
Birdoĉirpado aŭdiĝas ĉiuflanke.  
Al niaj oreloj bona karesado plaĉas.  
Suna varmo nin tute ĉirkaŭvolvadas.

Ekfloris leontodo flava,  
nur griza nuboj iomete koleras,  
ĉar post la pluvo venas suno,  
kaj birdar' alten ekflugas.



# Ne povas, frato

*Roki Vulović*

*Tradukis: Jadranka*

Neestas temp' por halti!

Ne povas esti franjo,

ke nia Serbio haltu!

Ne, pro niaj infanar',

Pro nia pasinteco glora,

pro Vojvodino ebena,

pro Kosovaj peonioj,

pro Romanio en sangogloro.

Malnombras ni, sed koro kavalira

Por patrujo tiktakas. Ho, Serbio panjo,

Vi ne povas halti. Kuraĝe iru antaŭen!

Ni ĉiu kuniros akompane vin.

Serbio, panjeto, Vivu vi.

Preĝas kaj jubilas ni.

Ne može brate

Nije vreme za stajanje

Ne može brate ,

Srbija da stane ,

Ne zbog naše dece ,

Zbog prošlosti slavne ,

Zbog Vojvodine ravne ,

Zbog Kosovskih božura

I Romanije slavne.

Malobrojan smo narod

Al čistog I mekog srca

Koje za otađbinom jako kuca.

Nedamo te ,naša mati .

O ,Srbijo ,ti nesmeš stati .

Hrabro napred ,uz tebe smo svi .!

Srbijo mat, i živelam ti!



# Ferumigita rivero

Susuras

Miric Jadranka

Betulbranĉaro.

Murmuras Ferumigita rivero-

Malnova monto Goĉ

rivereto.

Alten fluganta aro.

Nigra birdaro.

Aprila

Forta ventego.

Ektondris en oreloj.

Poste sekvis fulmegoj!

Jen, ekpluvegoj!

En montoj

Akvofalo ne

Estas plu certaj. Homoj

Katenigis ilin. Ve

Fiaj ĉi – mortoj!

Aŭrore

Kiu murmuros?

Kiu rulados ŝtonojn?

Kiel monto plu vivos?

Ĉu ĝin plu benos?

Vivos plu

En tubo river'

Ferumita. Sklavoviv'!

Kiel malbenita ter'

Sen ajna prosper'.



Verkis Miric Jadranka , la 11an de Majo 2020 Zajeĉa-Serbio / ĉineskaĵon laŭ 'Sopir al Sudo'

# covid 19

Angoris ni pro covid 19 fi

Ho,mondo

En kvaranteno!

Timigas nin seka tuso  
kaj febro. Jen . subteno  
mia kun peno.

Restu ni

Hejme.Ekstere solaj  
Je distanco fizika/socia.

Preterpasas ni mutaj .

Buŝe maskitaj!

Virusa

Pandemio .Ve

Ankoraŭ ne solvita.

Miloj jam mortis kaj tre  
multe mortos.Ve

Disiĝis

familianoj.

Oni fermis ŝtatlimojn.


De labor' plenas manoj  
kontraŭ malsanoj.

Laboris

nokte kaj tage

ni por savi homaron.

Volontuloj senpage  
agis senvage!



Miric Jadranka Zaječar Serbio, verkis laŭĉineske la 25 de Aprilo 2020

# Mi jam aŭdas printempon en la aero

Mi jam aŭdas printempon en la aer'...

Ĉu ankaŭ vi?

Mia koro rigardas en kvietan sfer'...

Ĉu scias vi?

La mond' printempiĝas, en sunaj radioj

La nokt' forsvenas

Audiĝas paseraĵoj kaj krioj

Printempo venas.

Printempo... Mi havas florojn kaj sunon...

Ĉu ankaŭ vi?

Kaj varmajn larmojn en miaj okuloj...

Ĉu scias vi?



Julian Tuwim (1894-1953)



Tradukis: Jaek Lisowski



## Vi, kiu faris maljustaĵ'

Vi, kiu faris maljustaĵ' al homo  
 simpla, aflikton lian ridetante,  
 Arlekenaron ĉirkaŭ vi havante,  
 Nur por konfuzi bonon kun malbono...  
 Eĉ se aliaj antaŭ vi kliniĝis  
 Virton kaj saĝon vin atribuante,  
 Orajn medalojn je l'honor' forĝante,  
 Feliĉaj, ke ankoraŭ unu tag' postvivis  
 – Sekur' ne estu! La poet' memoras.  
 Vi lin mortigos - naskiĝos alia,  
 Kaj ĉiu far', parolo, estos priskribita.  
 Pli bona por vi estus maten' vintra  
 Kaj ŝnur' kaj branĉo pro la ŝarg' kurbita.



Czeslaw Milosz (Nobel-premiito, 1980)

*Tradukis: Jaek Lisowski*



# KATFRAŬLOJ

*Bożena Gniazdowska*

*Tradukis Ryszarda Kwiatkowska*



**T**ri lanugaj katvostoj pendas de la tegmento apud la kamentubo, varmitaj de la somera varmo.

La unua, ruĝhara, estas de Leonarda; la dua, tibra, estas Brunona; la tria, nigra, estas de Felicjana.

Ili fleksis siajn muskolajn korpojn, zorgis pri siaj feloj, kaj certigis unu la alian pri sia vira amikeco.

La kataj fraŭloj enuis, ĉar ne estis alloga ina kato sur la bieno.

Ĉie, palaj, maldikaj, neglektitaj, mamnutrantaj patrinoj, ŝarĝitaj per respondecoj.

Ili ronronas: aristokrata kato atendas sinjorinon el la granda mondo.



Ili jam perdis esperon, kiam la katino al de iliaj revoj aperis sur la tegmento.

Ili frotas siajn okulojn mirigite; la kamparaj katoj neniam antaŭe vidis tian belecon.

La konkurenco pri la damo atingis sian kulminon;

ili ŝiras siajn felojn kaj mordas siajn vostojn, kaj la korta kato Czarus, salutas la sinjorinon.

Man -en -mane amuzita katino kun ludema kato Czarus, malsupreniras de la tegmento. ◆

# La Sagao de la Eterna Spiralo

## Ĉapitro 2

Lázaro Noel Coto



Mita sagao kiu traktas pri hibrido naskita kiel frukto de la amo inter neandertala virino kaj Homo sapiens. Lia nomo Tanu iĝas la Sanktulo de la Eterna Spiralo.

La verko konsistas el 3 libroj:

1- La Sagao de la Eterna Spiralo.

2- La Ruinoj.

3- Sankta Milito.

La Sagao de la Eterna Spiralo. La Legendo de Tanu.

Ili estis deko da sapiens, sveltaj kiel junkoj, kun haŭtoj harditaj sed puraj, envolvitaj en vegetaj fibroj tinkturitaj je okro. Iliaj lancoj estis maldikaj, pintaj kiel vespo-pikiloj, kaj iliaj okuloj, atentemaj, balaadis la terenon kun malfido.

Komence, ili haltis ĉe la enirejo de la valo, grupiĝinte, murmurante en sia rapida kaj fajfa lingvo. Nur sin rektiĝis, signante al la siaj — Luma kun sia ĵus naskita filino ankoraŭ en la brakoj — ke ili ne moviĝu. La aero odoris je malseka tero kaj fumo de malproksimaj fajrejoj.

Tiam la gvidantino paŝis antaŭen. Nara ŝi nomiĝis, kun nigra hararo kolektita en plektoj ornamitaj per agloplumoj, kaj trankvila rigardo, kiu ŝajnis esti vidinta ŝtormojn kaj renaskiĝojn. Ŝi portis kolĉenon el lupaj dentegoj, kaj ŝia sinteno estis rekta, sen la protekta kurbiĝo de la ĉasistoj.

Nur levis la manon en gesto de paco, malfermita palmo, kvazaŭ li oferas la venton. Nara respondis same, avancante kun singardo. La grupoj observis unu la alian: la neandertaloj, fortikaj kaj silentaj, kun malaltaj fruntoj kaj larĝaj nazoj por flari la mondon; la sapiens, lertaj, kun mallarĝaj vizaĝoj kaj langoj pretaj nomi la nevideblon. Nara montris la ŝirmejojn — kavernoj vastigitaj per adobaj muroj, iloj el polurita siliko vicigitaj sur bretoj el ostoj.

Nur grumblis konsente, tuŝante maĉilon kun tenilo envolvita per tendenoj, poste la fajron, kiu brulis senĉese, gardata de varmegaj ŝtonoj. Ili sidiĝis unu kontraŭ la alia apud la rivereto, kiu serpentumis tra la valo. Horoj pasis. Komence, per signoj: Nara desegnis sur la tero serpentuman vojon el la sudaj ebenaĵoj, kun sagoj por lupoj kaj ombroj por neĝoj, kiuj englutis gregojn.

Nur respondis desegnante sian cirklon ĉi tie, la valon kiel utero, kun linioj por komune ĉasataj predoj kaj manoj kunigitaj ĉirkaŭ la fajro. Ili dividis akvon el korna bovlo, poste pecojn de sekigita viando — cervo por li, kuniklo por ŝi. Fragmentoj de vortoj elkreskis.

“Fajro... ĉiam,” murmuris Nur en sia profunda voĉo, profunda kiel kavern-eko. Nara klinis la kapon, ripetante:

“Fajro... ĉiam,” etendante la silabon ĝis ĝi sonis kiel ponto. Ŝi parolis pri perdoj: ŝi pri rivero, kiu sekiĝis, kondukante ŝian klanon al la rando de malsato; li pri la granda frosto, kiu frostigis la maljunulojn en iliaj haŭtoj.

Gestoj fluadis — interplektitaj fingroj por alianco, pugnoj kontraŭ la brusto por dividita doloro. Nara tuŝis la frunton de Nur, ne kun timo, sed kun scivolemo, kaj li ne retiriĝis. Vespere, kiam la ombroj longiĝis, Nara stariĝis, vokante la siajn.

Sed ŝi lasis agloplumon sur la tero, kaj Nur respondis per dento de mamuto. “Valo... hejmo,” ŝi diris, kaj li kapjesis: “Hejmo... ĉiuj.” La sapiens ne foriris tiun nokton. Ili tendumis ĉe la rando, kaj la valo, por la unua fojo, pulsus kun du ritmoj.

La renkonto inter Nur kaj Nara, kvankam komence paca, baldaŭ elmontris profundajn streĉojn pro kulturaj diferencoj inter neandertaloj kaj sapiens. La neandertaloj, radikitaj al la valo kiel teritoriaj gardantoj, vidis la mondon en eternaj cikloj de ĉasado kaj komuna fajro; la sapiens, nomadaj kaj flekseblaj, prioritatis moviĝon kaj rapidan novigon.

La neandertaloj defendis sian hejmon kun instinkta feroceco, markante nevideblajn limojn per odoroj kaj spuroj. La grupo de Nara, kutiminta vagadi ĝis elĉerpi rimedojn antaŭ foriri, maltrankviligis Nur-on kiam ili tro proksimiĝis al la sankta rivereto.

Li grumblis malalte, frapante la teron per sia maĉilo por trakti linion sur la grundo: “Ĉi tie... nia.” Nara, kun streĉa rideto, etendis la brakojn montrante siajn maldikajn lancojn — “Ne preni... dividi” — sed ŝiaj okuloj jam skanis la predojn de la valo, kalkulante eskapvojojn kaj estontan ĉasadon.

Nur montris fieron pri siaj misteriaj iloj, pezaj kaj precizaj, forĝitaj dum glaciepokoj por daŭri generaciojn. Nara tuŝis maĉilon kun scivolemo, sed poste montris sian propran ĵetlancan armilon, malpezan kaj ĵeteblan, tinkturitan je simbola okro.

“Rapida... malproksime,” ŝi gestis, ĵetante ĝin al malproksima trunko. Nur sulkigis la brovojn; lia forto estis en rekta kontakto, ne en distanca agado.

La sapiensa flekseblo — adaptiĝi, absorbi, novigi — koliziis kun la neandertala fiksitateco, vidata de Nara kiel stagnanta kruda forto. Dum la dividado de manĝaĵo, Nara rakontis per fajfaj kantoj historiojn pri steloj kaj migrintaj prapatroj, invitante al fluidaj dancoj. La neandertaloj respondis per ritmaj gruntoj kaj rektaj korpaj kontaktoj, sen eteraj vortoj.

Luma, la neandertala patrino, patrino de Tanu, la pli aĝa de 20, kaj Panyx de 3, retiris sian bebon de scivolema sapienso, timante fremdajn spiritojn; juna sapienso ridis, imitante ŝiajn malaltajn fruntojn kiel moko. Nara ĉesigis la ridon per rigardo, sed la semo de “malsameco” jam ĝermis — fiksita teritorio kontraŭ nomadeco, rigida tradicio kontraŭ fleksebleco. Streĉo latent.

Kiam noktiĝis, Nara proponis aliancon: “Kune... pli fortaj”.

Nur akceptis la plumon, sed liaj okuloj sekvis la sapiens-ojn, kiuj tendumis ĉe la rando, sciante, ke ilia moviĝemo elĉerpos la valon malrapide. Tiu punkto ne okazis perforto, nur kultura tuŝo, kiu antaŭsignis la malrapidan dissolviĝon de la neandertaloj, absorbitaj de la adaptiĝemo de la sapiens. La valo pulsus dividite, kun paralelaj fajroj.

Tiun nokton, la fajro kraketis sub ĉielo punktita de steloj, ĵetante dancantajn ombrojn sur la vizaĝojn de Luma, Tanu, Nur kaj Panyx. Luma rimarkis unue lian silenton, la manieron kiel liaj okuloj perdiĝis en la mallumo preter la montoj.

— Vi rigardas malproksimen — ŝi murmuris, tuŝante lian brakon per varmaj fingroj. — Ĉu iri?

Nur kapjesis, lia voĉo flufrustrado firma.

— Serĉi aliajn... kiel mi. Kun Nara kaj ŝia bando de sapiens, kiel la ombroj kiujn mi vidis en la valo.

Tanu, sidanta kun kruroj krucitaj apud la fajro, kunpremis la lipojn. Li, jam tute juna, kreskis forta sub ilia zorgo, sed komprenis la vokon de la malproksima sango. Li diris nenion; nur etendis manon kaj metis poluritan ŝtonon en la palmon de Nur, talismano de la rivero kiun ili kune transiris.

Luma tiam prenis la manojn de Nur kaj premis ilin kontraŭ sian bruston, kie batis la koro, kiun ili nutris en tiom da malvarmaj noktoj.

— Vi foriras — ŝi diris, ŝia rigardo fiksita en lia. — Sed fajro... restas. Ĉi tie, kun Tanu. Kun ni.

Nur ĉirkaŭbrakis ambaŭ, unue Luma kun enhavita forto, poste Tanu per frunta tuŝo kaj ankaŭ Panyx. Ne estis larmoj, nur profunda certeco, ke la fajro, unufoje dividita, neniam estingiĝas.

Ĉe la tagiĝo, Nur aliĝis al la bando de sapiens, kiu atendis sur la monteto, gvidata de la imponanta figuro de Nara. Lia silueto perdiĝis ĉe la horizonto, sed la eĥo de tiu fajro daŭris en la kvietaj aero. La suno de la vespero kolorigis la tundrajn montetojn oranĝe, kie la vento flustris sekretojn inter la altaj herboj.

Luma, kun la hararo malordigita de la brizo kaj la manoj harditaj de jaroj de supervivo, revivigis la fajron apud la kaverno, kiun ili nomis hejmo.

Tanu, nun alta kaj fortika juna viro de 25 jaroj, akriĝis sian ostopinton kelkajn paŝojn for, liaj neandertalaj okuloj — profundaj kaj atentemaj — esplorigante la horizonton.

Pasis kvin jaroj ekde kiam la sapienso, tiu fremdulo kun pli glata haŭto kaj rapida lingvo nomata Nur, aliĝis al la bando de Nara, la militista ĉefo.

Luma lin sopiris silente, sed la neandertala klano absorbis lin kiel rivero prenas branĉon. Subite, Tanu rektiĝis, flarante la aeron.

— Patrino, mi flaras... lin. Kaj freŝan mamut-sangon.

Luma faligis la fajran branĉon, ŝia koro batante kiel ĉasaj tamburoj. En la malproksimo, sola figuro aperis el la nebulo: Nur, kurbigita de la jaroj, kun grizeta barbo kaj nova cikatro trans lia vango. Li portis sangmakulitan faskon sur la ŝultro.

— Viando de fora ĉaso — kaj lia paŝo estis pli malrapida, markita de batal-vundoj kun Naru.

Sed liaj okuloj, ankoraŭ brilantaj kiel norda glacio, serĉis la kavernon. Tanu kuris unue, lancon en mano, sed haltis rekone.

— Patro! — li muĝis per profunda voĉo, ĉirkaŭbrakante lin kun neandertala forto, kiu preskaŭ faligis lin.

Nur ridis, raŭka kaj laca sono, kaj lasis fali la faskon.

— Mia filo... vi kreskis kiel koloso.

Luma alproksimiĝis malrapide, larmoj fluantaj laŭ ŝiaj larĝaj vangoj. Ŝi ne parolis; anstataŭe ŝi tuŝis lian vizaĝon per tremantaj fingroj, spurante la novajn sulkojn kaj la cikatro.

Nur altiris ŝin al sia brusto, enspirante ŝian odoron de fumo kaj tero.

— La bando de Naru venkis militojn, Luma. Ni mortigis bizonojn kaj lupojn. Sed ĉi tiu hejmo... ĉi tio estas mia venko.

Ili sidis ĉirkaŭ la fajro tiun nokton, Tanu manĝante la viandon dum Nur rakontis historiojn pri flugantaj lancoj kaj kantoj de sapiens ĉirkaŭ malproksimaj fajroj. Luma apogis sian kapon sur lian ŝultron, kaj unufoje post jaroj, la vento ŝajnis silenti, kvazaŭ la tundro aprobus ilian revenon.

Nur rakontis al sia familio kelkajn el la epopeoj kiujn li travivis kun la klano de Naru.

Dum la kvin jaroj kiujn Nur pasigis kun la bando de Naru, la sapiensa klano frontis serion da brutalaj konfliktoj kiuj testis ilian supervivon en la senkompata tundro. Tiuj konfliktoj ne nur fortigis la ligilojn de la grupo, sed ankaŭ formis Nur-on kiel adoptitan militiston, markitan de cikatroj kaj profundaj lojalecoj.

En la dua vintro, aro de glaciaj lupoj — malsataj estaĵoj kun dentegoj kiel ponardoj— atakis la tendaron ĉe tagiĝo, allogitaj de laodoro de vundita boaco. Naru formis defendan cirkon kun lancoj kaj ŝildoj el hardita haŭto, dum Nur uzis sian sapiensan lertecon por ĵeti ŝtonojn de rifo. Ili perdis du ĉasistojn tiun nokton, sed la klano repelis la atakon senkapigante la alfa-lupon.

La plej granda konflikto eksplodis sur la malfermaj ebenaĵoj kontraŭ la Rompitaj Dentegoj, rivala sapiensa klano kiu ŝtelis predojn kaj virinojn. Naru aranĝis embuskon en la nebulo, uzante la venton por kaŝi sian antaŭeniron. Nur kontribuis per improvizitaj sagotaktikoj, kaj kvankam ili kaptis la malamikestro, la bando suferis gravajn vundojn: juna viro mortis kaj pluraj lamis dum monatoj.

Ne ĉiuj malamikoj estis vivantaj; senfina neĝŝtormo en la tria jaro kaptis la klanon en kaverno, elĉerpante la provizojn kaj kaŭzante internajn disputojn pri la porcioj. Naru ekzekutis perfidulon, kiu provis fuĝi kun manĝaĵo, restarigante la unuecon. Nur sole ĉasis unu solan bizonon en la blovado, savante la grupon de malsatmorto. Ĉe la fino, makulitaj hienoj — rapidaj kaj en granda aro — formanĝis mortintan mamuton, kiun la bando postulis.

La alfrontiĝo estis kaosa: Naru rompis kolojn per siaj manoj, sed la bestoj mortigis maljunan viron kaj vundis adoptan onklon de Tanu. Nur gajnis respekton enpikante sian lancon en tri hienojn. Tiuj konfliktoj kunigis la bandon kiel neniam antaŭe, kun Naru aperanta kiel legenda gvidanto, sed ankaŭ elĉerpis Nur-on, kiu sopiris revenon al sia neandertala familio.

En la nebula valo proksime de lia kaverno, Luma kaj Nur promenis senzorgaj sub la subiranta suno, kolektante sovaĝajn berojn. La aero odoris je malseka tero kaj freŝa herbo, kaj iliaj ridoj eĥis inter la rokoj dum ili babilis pri pasintaj aventuroj. Subite, profunda muĝo rompis la pacon: sabrodenta tigro eliris el la alta vepro, ĝiaj kurbaj dentegoj brilante kiel rikoltiloj kun praa feroco. Nur, la plej alta kaj forta, puŝis Luma malantaŭ si kaj levis branĉon kiel improvizitan armilon.

La felino atakis kun mortiga rapideco, ĝiaj ungegoj ŝirante la teron. Nur turniĝis por bati, sed la tigro saltis kun mortiga precizeco, enŝovante siajn dentojn en la elmontritan kolon de Nur.

Sango ŝprucis dum la viro falis genue, gorgante, liaj okuloj vitraj en ŝoko. La predanto skuis la kapon kun brutala efikeco, rompante vertebrojn en momento, kaj lasis la senan korpon en la polvo.

Luma kriis, paralizita de teruro, kaj provis fuĝi al la rokoj. Sed la tigro, kun la sangmakulita muzelo, turniĝis al ŝi en palpebrumo. Ĝi kovris la distancon per tri potencaj paŝoj kaj faligis ŝin per frapo, kiu malfermis ŝian torson.

Ĝiaj dentegoj enprofundiĝis en ŝian gorĝon, silentigante la krion meze; fina krako kaj Luma falis senviva, ŝiaj okuloj fiksitaj al la malproksima kaverno, kiun ŝi neniam atingus. La tigro trenis la korpojn en la duonlumon, postulante sian predon en la silenta valo.

Dum la sabrodenta tigro manĝis sian makabran vespermanĝon en la ombroj de la valo, la nokto falis kiel peza vualo super la kaverno. Interne, Tanu, ilia adoleska fratino/filino de Nur kaj Luma, flegis la fajron per sekaj branĉoj, maltrankvila pro la malfruo de la du.



La fumo dancis en la aero ŝarĝita de streĉo; tro da tempo pasis ekde ilia foriro ĉe tagiĝo. Tanu eliris al la enirejo de la kaverno, vokante iliajn nomojn al la malvarma vento. “Nur! Luma!”, li kriis, lia voĉo eĥante kontraŭ la rokmuroj.

Nur la ululo de strigo respondis.

Kun batanta koro, li prenis improvizitan torĉon kaj malsupreniris al la valo, gvidata de malhela antaŭseno. La spuro de freŝa sango en la herbo kondukis lin al la sceno: la mutilitaj korpoj, duone manĝitaj, kun profundaj unĝospuroj markantaj la teron. Terurite, Tanu falis genue, larmoj spurante lian vizaĝon. Li tuŝis la malvarman manon de Luma, murmuregante rompitaĵajn promesojn. Sed krako en la vepro alarmis lin: la tigro, kun brilantaj flavaj okuloj, revenis por pli.

Tanu subite stariĝis, svingante la torĉon kiel ŝildon. La felino muĝis kaj alproksimiĝis, sed li ĵetis la brulantan flamon al ĝia muzelo, momente blindigante ĝin. Li kuris al la kaverno, stumblante en la mallumo, kun la spiro de la predanto ĉe lia nuko.

Atinginte la enirejon, li rulis pezajn ŝtonojn por bloki ĝin, spiregante dum la tigro furioze gratadis la barieron.

Sekura por la momento, Tanu pasigis la nokton en vigilo, akriĝante ostajn kaj ŝtonajn lancojn per tremantaj manoj. Ĉe tagiĝo, li kolektis kuraĝon kaj eliris armita, sekvante la spuron de la tigro ĝis ĝia kaŝejo en kaŝita ravino.

Tie, li embuskis ĝin: li ĵetis lancon, kiu enpikiĝis en ĝia flanko, malfortigante ĝin. La besto atakis blinde pro kolero, sed Tanu evitis kaj enigis alian en ĝian elmontritan koron.

Kun lasta spasma, la tigro falis, ĝiaj dentegoj finfine senmoviĝintaj. Elĉerpita sed venka, Tanu trenis la restaĵojn de Nur kaj Luma reen al la kaverno por fina rito. Li enterigis iliajn korpojn sub tumulo de ŝtonoj, ĵurante protekti sian hejmon sola. La valo, nun markita de sango, fariĝis loko de eterna averto.

Kun la jaroj, post la morto de Nur kaj Luma, la gepatroj de Tanu, la eĥo de iliaj faroj transformiĝis en legendon. Kiam la ĉasisto maljuniĝis, antikvaj saĝuloj trovis lin inda, perfekta homo forĝita en soleco, perdo kaj devo.

Ili rekonis en lia spirito forton, kiu transpasas la limojn de la karno. Sed pli grave, la ponton kiu komencis novan generacion de hominidoj, miksaĵon de neandertaloj kaj sapiens. La eterna kaj nevidebla ponto, kiu unuigis ĉiam.

Tiam ili levis lin al la panteono de la spirala simbolo, emblemo de la ascendo de la animo kaj la unuiĝo inter la tera kaj la dia.

La spiralo reprezentis la senfinan vojon de lernado, renovigo kaj reveno al la origino, eterna fluo kiu unuigas diojn, homojn kaj bestojn. Ĝia suprenmovo simbolis la superadon de timo, la konkeron de interna kaoso kaj la venkon de konscio super morto.

En la koro de la panteono, kie la ŝtonoj brilas per propra lumo kaj la eĥoj de la tempo flustras forgesitajn nomojn, staris la trono de Tanu. Tie, sub la signo de la lumanta spiralo, lia spirito estis sigelita per rita fajro.

De tiam, li gardas la paŝojn de la justuloj, gvidante ĉasistojn, prizorgante la vojojn de infanoj kaj defendante la hejmojn de tiuj, kiuj vivas en harmonio kun la tero.

Tiel la valo, iam sanktigita per lia sango, fariĝis sankta loko, memorigo, ke ĉiu vivo — kiel la suprenira spiralo — ĉiam celas leviĝi al la lumo.

### **Sankta Himno al Tanu, la Gardanto de la Spiralo**

Ho Tanu, filo de Nur kaj Luma benitaj,  
 el via sufero naskiĝis la eterna lumo.  
 En la silento de soleco vi trovis forton,  
 kaj en devo via perfekta spirito firmiĝis.  
 La spiralo — sankta signo de ascendo —  
 unuigas la teran polvon kun la spiro de dioj.  
 Ĝi fluas senfine tra tempo kaj mondoj,  
 kantante la venkon de la animo super morto.  
 En la sankta koro de la brilanta panteono,  
 kie la ŝtonoj konservas perditajn nomojn,  
 staras via trono, sigelita per rita fajro.  
 Tie, sub la spiralo de lumo, ripozas via eterna gloro.  
 Protektu nin, ho Tanu, gardanto de la justuloj,  
 gvidu la ĉasistojn tra nebulo kaj ombroj.  
 Protektu la infanojn, benigu la fekundajn terojn,  
 kaj defendu la korojn de tiuj, kiuj vivas en vero.  
 Ho valo, sanktigita per la sango de viaj gepatroj,  
 memoru la spiralon, simbolon de lumo kaj alteco.  
 Ĉar, same kiel la flamo leviĝas el la cindroj,  
 ĉiu animo serĉas ascendi al la senfina lumo. ◆

# Tristeco



*Elena Popova*

Mi estas longorela  
kun bona aŭdosens',  
sed sola...

Muta mi ne estas –  
mi vidas ĉion, sentas,  
sed sola mi festas...

Mi havas belan domon,  
sed inter l' homoj mi  
estas sola kaj trista.

“Ne malĝoju,  
al mi la steloj flustras,  
la revoj realiĝas!


Atendu!”  
Ho ve! Mi maljuniĝas...



# LA VIVO ESTAS...

*Elena Popova*

Voj' estas la vivo  
kun korp' vundita.  
Ofte vojkruc  
pri nia elekto.  
Kien?  
Font' en la monto  
pri gluto da akvo.  
Postsignoj de ni,  
ne tralegitaj.  
Kiam?  
Libroj legitaj  
kaj forgesitaj,  
sed niaj gvidantoj  
je voj' malfacila.  
Kiel?  
Per sana spirito  
al voj' senfinita.



# Stranga konsilo

Laimundas Abromas



**K**iu frapas, al tiu oni pordon malfermas. Tiel oni skribas en unu sankta libro Kaj mi frapas. Jam dum dek minutoj. Tamen la pordon neniu malfermas. Komence mi premis sonorilbutonon ĉepordan, ĝis tiu raŭkiĝis. Poste ĝentile mi frapis per kondiloj. Finfine mi frapis perpugne. Verdire, mi tre volas piedfrapi tiun malbenitan pordon. Restu tiel, mi tion ne faros, ĉar timigitaj najbaroj povas alvoki policon. Tamen mi faras nenion malbonan, mi volas nur interparoli... Vi pensas: oho, ĉiuj tiel parolas. Ne... Mi estas nek kolera, nek furioza, nek iu malbonulo, mi nur iom malĝojas. Ĉar mi estas forte enamiĝinta.

Oni diras, se virino koleras, sekve la viro kulpas. Eĉ ne provu li sin pravigi, ĉion nei kaj diverse elturniĝi. Simple oni balancu perkape kaj pardonpetu, ne gravas, ke oni estas senkulpa. Se li tion ne faros, komenciĝos tagoj de malparolado, kaj eble eĉ semajnoj. Ne donu Dio...

Tamen mia fraŭlino koleras. Mi venis por pardonpeti al ŝi. Sed ŝi ne permesas eniri. Ŝi certe hejmas. Mi trifoje ĉirkaŭiris multloĝejan domon, en ŝia fenestro io malforte lumas. Verŝajne la ŝaltita televidilo trembrilas. Ŝi pensas, ke mi ne komprenas. Mi komprenas, tamen kio sekvas el tio. Mia poŝtelefono senutilas, - aŭtomata voĉo informas, ke abonanto estas en senkupa zono aŭ ien malaperis. Do, jen tiel. Almenaŭ dormu sur tapiŝeto ĉe la pordo en ŝtuparejo. Kaj mi tiel farus, se najbaroj ne forpelus. Do, estu tiel, por hodiaŭ sufiĉos ataki la pordon.

Se diri veron, mi mem iom kulpas. Mi iun dimanĉon forgesis redoni al ŝi libron, kiun ŝi insiste petis. Mi estis sankte promesinta. Lunde mi pentofaris al la libro aldonante glaciaĵon kaj donacis floron. Ŝi pardonis, kvankam kontraŭvole. Post tiu okazintaĵo dum tuta monato mi estis milda kiel lanugo. Tamen poste mi denove misagis. Nun denove mi ĉerpas kaĉon. Eble tio estas ne mia kulpo, simple tiel cirkonstancoj koincidis – mi perdis biletojn al koncerto. Al tiu ununura koncerto, kiun ŝi tiel senpacience atendis. Verdire mi tiun kantiston ne adoris, kiel mia fraŭlino. Tamen pro ŝi tiujn du horojn mi sufersidus en koncerto. Kaj nun mi suferas. Pro mia malatento. Mi pensas, ke puno ĉifoje daŭros pli longe. Mi eĉ ne imagas, kiel mi pentofaros mian kulpon.

Jam duan tagon mi sturmas la pordon de la loĝejo de mia fraŭlino. Obstine kaj ne laciĝante. Mi jam parolis, ke al miaj telefonalkvokoj ŝi ne respondas. Eble eĉ mian telefonnumeron ŝi forigis el la listo de adresatoj. Mi eĉ timas pensi pri tio. Por hodiaŭ la bruado ĉe la pordo pli ol sufiĉas. Jam najbaroj revenas hejmen post laboro. Morgaŭ mi provos denove.

Mi venas hejmen tra la skvaro, kie ni ŝatis sidi. Sur nia benko la maljunulo jam sidas. Mi volas mallonge ripozeti pro la negativaj emocioj. Mi malbonhumora eksidas apude, eble li ne alparolos. Do jen, silentis li nur kelkajn minutojn. Maljunuloj elhejmiĝas ĝuste pro tio, por ke interparolu kun iu. Ĉar televidilon aŭ katon paroligi tedas. Mi ne volas aŭskulti lin, des pli paroli kun li. Maljunulo komencis sian paroladon per neŭtralaj temoj: pri vetero, vesperiĝanta placo, monumento, kiun malpurigas kolomboj. Almenaŭ respondi ne necesas. Poste el la dorsosako li eligis saketon.


-Regalu vin. Mi el vilaĝo revenas. Mia fratino donis pomojn. Bongustas ili, gustumu vi. Ĉar mi vidas, ke vi malgajas, -afable parolis li. -Ne, dankon, mi ne malsatas, - mi respondis. -Vi nur prenu. Maĉante eĉ kolero forlasos. Ĉio en tiu ĉi mondo preteriras. Necesas nur ĝisatendi.

Mi prenis unu pomon, poste li instigis min preni ankoraŭ unu. Ili estis bongustaj, dolĉacidaj. Ĝuste tiaj, kiajn ŝatas mia fraŭlino. Mi plezure ilin formanĝis. Evidentiĝis, ke maljunulo estis sagaca. Komence li nutris min kaj poste vorto post vorte pridemandadis kaj eksciis la kaŭzon de mia ĉagreniĝo. Do, mi ne ĉion rakontis, nur proksimume. Kaj diris, ke mi ne scias kiel pardonpeti.

-Ohoho... Tamen vi sciu, ke ne estas tia rubo, kiun oni ne povu forbalai. Vi menciis, ke via fraŭlino ŝatas la pomojn. Jen, prenu ĉiujn. Mi en vilaĝo satmanĝis. Vi diris, ke morgaŭ denove iros frapi tiun pardonon. Metu la pomojn en belan saketon. Se ŝi enlasos vin, kune vi manĝos ilin. Se ne, - restigu ilin ĉe la pordo.

La konsilo de maljunulo estis pli ol stranga, ia el profunda pratempo. Tamen se nuntempaj rimedoj ne helpas, mi provu arkaikan.

Sekvontage la pardonon ree malfermis neniu. Kia mi estas naiva. Fraŭlino mia ankoraŭ ne cedis. Sed kiomdaŭre ŝi povas koleri?.. Saketon kun pomoj mi restigis sur la porda klinko. Ankoraŭ aldone mi enmetis bildkarton kun lanuga kateto kaj pentris sur ĝi multe da koretoj. Se nun ĉio tio ne ekefikos al ŝi..., kion fari?



Efikis! Tamen ne ĉi-vespere, sed en alia tago, posttagmeze. Mi ricevis sciigon: „Pomoj tre bongustis. Mi esperas, ke vi ne prirabis ĝardenon de via najbaro? Koretojn mi ankaŭ akceptas... Tamen vi ŝuldas koncerton“.

-Huraa!.. Mi aĉetos biletojn al alia bona koncerto! En cent koncertojn! Kaj mi penos ne plu perdi ilin... ♦

# Esperantismo?

*Lenke Szász*



**M**i havas la impreson, ke ĉiam mi estis esperantisto, ankaŭ tiam, kiam mi eĉ ne sciis pri la ekzisto de tiu lingvo.

En la lernejo, antaŭ sesdek jaroj, mi lernis pri la antikva Grekio. Mi admiris la bildojn en la lernolibro pri historio pri la antikvaj grekaj statuoj, kaj formiĝis mia idealo pri la harmonia beleco. Mi estis kortuŝita pri la heroa morto de Leonidas, kaj eĉ nun mi memoras la versojn de Simonides pri la tricent spartanoj falintaj ĉe Thermopile.

Poste mi lernis pri la italaj pentristoj, skulptistoj, poetoj de la renesanco. Grandaj komponistoj italaj, germanaj, rusaj, verkistoj kiel Dickens riĉigis ne nur miajn konojn, sed ankaŭ mian koron per sentoj. La franca Victor Hugo kortuŝis min per siaj romanoj. Faust de la germana Goethe pensigis min en la mezlernejo. La rusaj Puŝkin, lia Anĝegin, Tolstoj kun Anna Karenina, la belegaj rusaj popolkantoj kaj dancoj plenigis mian koron per impresoj. Kial ne ami ilin ankaŭ nun!

Per la amo kaj admiro por la kreaĵoj de diversnaciaj verkistoj, artistoj, la grundo jam estis pretigita por la akcepto de Esperanto kun ĝia bela interna ideo.



Esperanto ebligis trovi dise en la mondo leteamikojn kun simila pensado, kun estimo al ĉiu nacio, al ĉiu kreanto de kulturaj valoroj. Ĉio ĉi kondukas al pli alta ŝtupo de la pensado:

La tuta Terglobo estas nia komuna patrolando, ni devas protekti, ne detrui ĝin.


Ĉu ne en ĉiuj lernejoj, en ĉiuj landoj de Eŭropo estas instruataj la samaj lernmaterialoj?

Kaj la sama ordono de la Biblio: „Amu vian proksimulon!”

Ĉu ni ne devus honti pro nia konduto, pro militoj, anstataŭ kunlaborado?

Kial oni ne komprenas, ke ni ĉiuj estas civitanoj de la Tero, nia komuna patrujo. Ke ni devus esti bonaj fratoj? ♦

# Traduko de Cristina Bollini



*Cristina Bollini*

# KIEN FORFLUGAS LA NUBO?

Luiza CAROL



Kien forflugas la nuboj?

Kien forflugas la sonĝoj?

Kien forflugas la amo?

Kien forflugas la kantoj?

La nuboj forflugas al sonĝoj,  
la sonĝoj forflugas al amo,  
la amo forflugas al kanto,  
la kanto forflugas al nuboj.



## KIEN FORFLUGAS LA NUBO?

Vortoj kaj melodio: Luiza CAROL

F# Bm G F#m Em C#° D  
 ki en for-flu-gas la nu - bo ki - en for-flu-gas la sonĝ' ki - en for-flu-gas la

6 F#m G F# Bm B E C#m  
 a - mo ki - en for-flu-gas la kant' la nu - bo for-flu-gas al son - ĝo la

11 G#m C#m D#m F# C#mB F# B  
 son - ĝo for-flu-gasal am' la a - mo for-flu-gasal kan - to la kan - to for-flu-gasal nub'

# DE KIE VENAS

Luiza CAROL



De kie venas ĉiuj vortoj?  
De kie venas ĉiuj sonĝoj?  
De kie venas rido?  
De kie ĉiu larmo?  
De kie venas nia amo?

Buntajn vortojn dissemas la sunlumo,  
luna lumo dissemas nokte sonĝojn,  
vento alportas la larmojn kaj ridojn,  
amo burĝonas el kanto.

De kie venas ĉiuj versoj?  
De kie venas melodioj?  
De kie venas ĝojoj?  
De kie la malĝojoj?  
De kie venas nia amo?

Buntajn versojn dissemas la sunlumo,  
luna lumo dissemas melodiojn,  
vento alportas malĝojojn kaj ĝojojn,  
amo burĝonas el kanto.

## DE KIE VENAS

Vortoj kaj melodio: Luiza CAROL

Em C Em G<sup>+</sup> Am

de ki - e ve - nas ĉi - uj vor - toj de ki - e ve - nas ĉi - uj son - ĝoj de ki - e ve - nas ri - do de  
de ki - e ve - nas ĉi - uj ver - soj de ki - e ve - nas me - lo - di - ojn de ki - e ve - nas ĝo - jo de

6 B F<sup>°</sup> Em B7 Em F<sup>°</sup> Em F<sup>°</sup>

ki - e ĉi - u lar - mode ki - e ve - nas ni - a a - mo bun - tajn vor - tojn dis - se - mas lasun - lu - mo lu - na lu - modis  
ki - e la mal - ĝo - jo de ki - e ve - nas ni - a a - mo bun - tajn ver - sojn dis - se - mas lasun - lu - mo lu - na lu - modis

12 Am Bm Am Em F<sup>°</sup> Em

- se - mas nok - te son - ĝojn ven - to al - por - tas la lar - mojn kaj ri - dojn a - mo bur - ĝo - nas el kan - to  
- se - mas me - lo - di - ojn ven - to al - por - tas mal - ĝo - jn kaj ĝo - jn a - mo bur - ĝo - nas el kan - to

# La vulpo pravis

*Malsovaĝigi: la malrapida arto ne plu esti fremduloj*

*Stanislao M Esposito*



**L**a vulpo ne volas esti karesata. Ĝi ne serĉas ludon. Ĝi deziras ion pli malfacilan: esti malsovaĝigita.

Kiam mi relegis tiun scenon el La Eta Princo, mi haltis pli longe ol kutime. Ĉar la vulpo ne petas nur afekton. Ĝi petas tempon, ĉeeston, ritojn. Ĝi petas fariĝi unika — kaj fari la alian unika. Ne en unu momento, sed laŭlonge de komuna vojo.

Kaj mi demandis min: kiom ofte ni provas atingi proksimecon tro rapide? Kiom ofte ni serĉas tujan ligan, intimecon sen la malrapida vojo kiu ĝin preparas?

La vulpo tion ne akceptus.



## Vorto kiu ŝanĝas ĉion

La vulpo diras al la eta princo vorton kiu ŝajnas simpla, sed enhavas tutan vojon: malsovaĝigi.

Indas halti ĉe tiu vorto en diversaj lingvoj, ĉar ĉiu traduko malkaŝas ion alian.

En la franca — *apprivoiser* — la tono estas milda, preskaŭ poezia: enkonduki delikatan rilaton. En la angla — *to tame* — aperas ideo de kontrolo: regi ion fortan aŭ nedresitan. En la itala — *addomesticare* — oni sentas la eĥon de hejmo kaj kunvivado.

Sed en Esperanto, en la traduko de Pierre Delaire, la vorto fariĝas malsovaĝigi — “igi ne plu sovaĝa”. Ne kontrolo. Ne adapto. Transformiĝo.

Temas pri procezo kiu iom post iom implikas ambaŭ flankojn, ĝis ili fariĝas unikaj unu al la alia.

Jen la diferenco kiu vere gravas. Ne regi. Transformiĝi kune.

## De fremduloj al amikoj

En mia vivo mi lernis ke tiu procezo ne havas mallongajn vojojn.

Mi travivis rilatojn kiuj komenciĝis el nenio — homoj kiuj komence estis nur vizaĝoj, nomoj, simplaj ĉeestoj. Kaj poste, iom post iom, io komencis ŝanĝiĝi.

Ne per grandaj deklaroj aŭ dramaj gestoj, sed per malgrandaj aferoj ripetitaj tra la tempo: laŭte esprimi penson, rakonti memoron, rideti pro afero komprenata nur de du homoj.

Ĝuste tion la vulpo nomas ritoj. Simplaj, ripetitaj gestoj kiuj sentigas al la alia: vi estas atendata. Vi gravas.

La vulpo diras tion klare: “La vortoj estas fonto de miskomprenoj.” Rilato ne kreskas nur per vortoj. Ĝi kreskas per tempo, ĉeesto kaj atendado. Kaj ritoj estas ĝuste tio: la konkreta maniero laŭ kiu tempo fariĝas zorgo.

Tiel fremduloj fariĝas amikoj. Ne en unu momento. En vojo.

## La senluziigo pri la rozo

Sed La Eta Princo kondukas nin ankaŭ al pli dolora loko.

Antaŭ ol renkonti la vulpon, la eta princo ploras. Li ĵus malkovris ke lia rozo — tiu kiun li kredis unika en la mondo — similas al miloj da aliaj rozoj. Li sentas sin trompita. La rozo diris al li ke ŝi estas speciala. Kaj li kredis ŝin.

Mi konas tiun senton.

Estis momento en mia vivo kiam mi bezonis homojn je kiuj mi pensis ke mi povas fidi. Homojn kun kiuj mi dividis tempon, pensojn kaj silentojn. Homojn kiuj, laŭ mi, fariĝis veraj amikoj.

Sed ili fariĝis silentaj. Preskaŭ nevideblaj.

Ne pro malico, eble. Sed pro tiu distanco kiu doloras pli ol konflikto — ĉar ĝi eĉ ne lasas lokon por vortoj.

La vulpo tamen ne lasas la etan princon sola en tiu doloro. Ĝi rekondukas lin al lia rozo kaj diras ion kiu ŝanĝas ĉion: la rozo estas unika ne ĉar ŝi diferencas de la aliaj, sed ĉar li zorgis pri ŝi. Ĉar li donis al ŝi sian tempon. Ĉar li konstruis ligon.

La ligo ne forigas la senluziigon. Sed ĝi transformas ĝin. Ĝi montras ke amo ne troviĝis en la ideo de unikeco kiun la rozo havis pri si mem. Ĝi troviĝis en la vojo kiun ili faris kune.

## La arto vere vidi la alian

Estas interese kiel kelkaj el la plej profundaj rakontoj de la homaro revenas ĉiam al la sama punkto: la bezono esti vere vidataj.

Ne rapide juĝataj. Ne simple rimarkataj. Sed vidataj.

Eble pro tio certaj renkontoj restas en nia memoro dum jaroj. Iu haltis. Iu aŭskultis. Iu traktis nin ne kiel parton de homamaso, sed kiel personon.

Ankaŭ komunumoj vivas tiel. Per malgrandaj ritoj: reveni al la sama loko, rekoni unu la alian, scii ke iu atendos nin. Foje sufiĉas simplaj gestoj por ke fremda medio iom post iom fariĝu loko kie oni sentas sin hejme.

Kaj eble ĝuste tion la vulpo provis instrui: rilatoj ne naskiĝas el rapideco, sed el atento. El tempo donita ree kaj ree, ĝis la ĉeesto de la alia fariĝas parto de nia vivo.

Eble La Eta Princo daŭre parolas al ni ĉar ĝi tuŝas ion kio ne maljuniĝas: la deziron ne resti fremduloj. La deziron esti vidataj, atendataj kaj rekonataj.



Malsovaĝigo estas la nomo de tiu deziro kiam ĝi ekmoviĝas. Ne stato atingenda, sed vojo.

Kaj ankaŭ la seniluziiĝoj, se oni ilin trapasas, ne detruas la ligon — ili faras ĝin pli vera.

Mi lernis, foje kun peno, ke la homoj kiuj min seniluziigis ne nuligas tiujn kiuj restis. Kaj ke amo ne mezuriĝas laŭ vivo sen vundoj, sed laŭ la kapablo plu konstrui ligojn — ankaŭ poste.

La vulpo pravis. Ne temas pri posedi. Temas pri transformiĝi kune.

Unika fariĝas tio, al kio ni ne ĉesas doni tempon. ♦

# Neandertalaj homoj eble plu vivas

*Kvar kunligitaj tekstoj pri restaĵaj homeculoj*

*Roland Platteau*



**M**ez-epoka poeto zorge priskribis « teruregan neĝvirinon »

Pliaj atestaĵoj pri restaĵaj homeculoj, eble lastaj neandertalaj homoj estas, kelkaj nuntempaj, ĉefe en eksa Sovetio kaj centra Azio ; ilin studis Michael Trachtengerts, Dimitri Bayanov, Boris Porchnev. Multaj rakontoj portas pri detaloj tiom strangaj « kiujn oni ne povis elpensi » ekzemple klasika estas la kazo de la ĉevalinoj kies kolhararojn la kamparanoj trovas matene, post vekigo, nodataj per strangaj harplektaĵoj. Oni scias nun, ke tio estas la ununura rimedo per kiu la homeculoj povas melki la lakton de la ĉevalinoj, pendigantaj kap-sube al tiuj noditaj harplektitaj kolhararoj por atingi iliajn mamojn, unu el la rusaj esploristoj vidi tion en kavkazo.

KAJ oni retrovas tiun trajton en diversaj regionoj de la mondo, ekzemple en Anglujo, tradiciaj rakontoj parolas pri certa Mab

« ... that very Mab

That plates the manes of horses in the night » (Shakespeare, Romeo and Julietta, I, 4) faris tion (tiu mem Mab, kiu plektas la kolharojn de la ĉevaloj dumnokte » )

Ne nur en Himalajo renkontiĝis la Tibete nomitaj « jeti » (aŭ de la gazetistoj « teruregaj neĝhomoj » ! ) ; fakte ankaŭ en antikva kaj mezepoka Eŭropo estis atestaĵoj kaj bildaj spuroj de ties ĉeesto. En tuta centra Azio estas, ĝis nunempe, atestaĵoj pri ili, nomitaj « dev » de la antikvaj irananoj, « nasnas » en Pamiro, « Almasty » en Kaŭkazo, « Ksj-gjik » (sovaĝaj homoj) en Kirgizio, "Tungu" de la Nenecoj, Bigfoot en Usono, Russalka en Rusio, Basajun en Eŭskio ktp.

*„Iu speco da nasnas-o (estaĵo komparebla al latina Faŭno) renkontiĝas en regiono Bamir (Pamiro), senhomejo inter Kaŝmiro, Tibeto, Vaĥano kaj Ĉinio. La nasnas-oj estas felkovritaj, krom sur la vizaĝo, kaj saltegas kiel gazeloj. La Vaĥananoj ĉasas kaj manĝas ilin.“*

*[el la libro Ŝaraf al-Zaman de Tahir Marvazi, araba vojaĝisto en la 12-a jarcento]*

*„La besto plej nobla estas la nasnas-o, vivantaĵo vivanta en la ebenaĵoj Turkestan-aj, kun ungoj larĝaj kaj plataj. Kie ajn ĝi vidas homojn, ĝi sekvos ilin kaj rigardas al ili. Kaj kiam ĝi trovas homon solan, ĝi forkaptas lin aŭ ŝin, kaj laŭdire eblas, ke ili gekoncipu kune. Post la homoj ĝi estas la plej supera estaĵo inter la besta regno, tiomtiom ĝi similas al homo : unue per sia dukrura rekta staro, poste per la larĝeco de siaj ungoj, finvoce per siaj haroj surkape. »*

*[el la libro Ŝahar Makala de Nizami al-Arudi, persa sciencisto en la 12-a jarcento]*

Fakte la legendojn helenajn pri la silenoj, saturoj, la virinaj nimfoj kaj dio Pan konjekteble kaŭzis renkontoj kun tiuj vilaj longorelaj, krure lertegaj, sekse sentabuaj (parenteze ni memoru la terminon « nimfomanio ») estaĵoj (la lastdata, historia, ne legenda, okazo tia disvolviĝis en Ilirio, proksime de Dyrrhachium, « saturino » kaptita en loko « Nymfaeum » far la soldatoj de la fama romiana politikisto Sula (alie : Sylla), kiu taksis ĝin multe malpli bela ol tiuj bildigitaj de la artistoj !).



Jen ĝuste, maldekstre figuro de « Sileno » trovita en ruinoj de urbo Nymphaion, helena kolonio en Krimeo.

Dekstre vi povas vidi desegnon de almasty laŭ rusa fakisto Michael Trachtengerts.

Pluraj rusaj sciencistoj okupiĝis pri tiuj homecaj vivantaĵoj. Plej fama el ili Boris Porĉnev opiniis, ke ili estas plurestantaj neandertalaj homoj (la plejnova subspecio antaŭ la nuna Homo sapiens sapiens – subspecio, do interkoncipigoj eblas, kaj oni scias, ke tiuj ekzistis inter Homo sapiens sapiens, la nuna homo, kaj la Homo sapiens neanderthalensis)

Sed eĉ ĝis la mez-epoko ili vivis en la Pireneoj (probablas ke la plej lasta manifestiĝis en Eŭskiaj montoj dum la dekkoka jarcento) kaj trubadora literaturo parolas pri ili, precipe dum la dekkvara jarcento la hispana verkisto Juan Ruiz, en sia « Libro de buen amor » parolas pri la « serranas », virinoj kiuj vivadis en la montaro de Guadarrama . Jen la strofoj, kie li priskribas unu el ili, amasigante detalojn, kiel gazetisto aŭ policisto, aŭ kiel homo kiu vidis ion eksterordinaran kaj volegas zorge konservigi kaj diskonigi la informojn :

« En Apokalipso de sankta Johano la Evangelisto,  
Oni ne vidas tian figuron nek tiom teruran bildon  
Se multnombros kaŭzus ĝi egan lukton, egan konkeron.  
Ne sciiĝas de kiu diablo tia fantomo povus amati.

Ŝi havis la kapon tre granda, superproporcia,  
Hararon nigrega tiel, kiel glima korniko,  
Okulojn enprofunditaj kaj ruĝaj, ne tre distingeblaj,  
Ŝia paŝosigno pli grandas ol tiu de ursino.

La orelojn tiom grandajn, kiom tiuj de unujara azeno,  
La kolon nigran, larĝan, vilan, malgrandan,  
La naztruojn tre larĝajn, tiuj de kurlo ;  
Ŝi trinkus post kelke da tagoj la tutan akvon de marĉeto.

Buŝon kiel dogo, kaj vizaĝon tre grandan,  
La dentojn larĝajn kaj longajn, ĉevalecajn, misarangĝitajn;  
La brovojn larĝajn kaj pli nigraj ol turdoj; .....

Ŝi havas lanugon el barbharoj ege nigraj, .....

Sed se paroli vere, se mi bone vidis ĝisgenue,  
La ostoj estas grandaj, la kruro ne tre malgranda.....  
La maleoloj pli grandaj ol tiuj de unujara bovidino.

Pli larĝan ol mia mano ŝi havas manartikon,  
 Vila, per longaj haroj, sed ne tre seka (?)  
 La voĉo basa, laŭta kaj nazaleca,  
 Lenta kiel cervobleko sen gracieco kaj kavece sonanta.

Ŝia malgranda fingro pli grandas ol mia dika fingro...  
 Ŝi surhavas kiel veston siajn mamojn pendantajn,  
 Kiuj atingas ĝis la zono.....  
 Ripoj grandegaj en ŝia nigra brusto,  
 Unu tiomas tri .... »



*Sur muro en Andaluza urbo Ubeda – ĉu mez-epoka bildigo de restaĵa homeculo?*

La detaloj ĉi-supre listigitaj ekzakte kongruas kun la priskriboj de la modernaj atestantoj, ekzemple en Kaŭkazo aŭ Pamiro.

En Eŭropo ili nun malaperis ; ŝajnas, ke la lastaj vidoj estis en Transilvaniaj Alpoj (nuna Rumanio) far la tiama sciencisto Michael WAGNER kaj en eŭskaj Pireneoj, dum la 18-a jarcento.

Fine kaj krone, kiam mi estis en Ubeda, provinco de Malago) mi vidis kaj fotis tiun skulptaĵon: (vidu la bildon supre)

Ĉiukaze, la hipotezo pri la lastatempa postvivado de neandertaloj en Pireneoj kaj Hispanio ŝajnas disvastiĝi trans niajn limojn, juĝante laŭ pasaĝo el la lastatempa libro de Robert Hutchinson (1989) pri lia ekspedicio al Nepalo serĉante la Jetion: "Antropologoj elfosantaj la kavernon El Juyo, en la montoj sudokcidente de Santandero (Hispanio), trovis 35 cm ŝtonan kapon reprezentantan duonhoman, duonbestan estaĵon. La kavernon El Juyo vizitadis tribo de Cro-Magnonoj antaŭ 14 000 jaroj, kaj la skulptaĵo povus esti ŝtona reprezentado de Jetio aŭ sovaĝa homo. Restaĵoj de Cro-Magnonoj estis trovitaj (en Portugalio) kun spuroj de neandertaloj datiĝantaj 24 500 jarojn, kio indikus hibridan populacion rezultantan el la krucbredado de..." du specioj. Ĉi tiuj estas ankaŭ la plej lastatempaj konataj restaĵoj de homoj kun neandertalaj karakterizaĵoj, kio farus ilin la lastaj de sia specio. C. Duarte kaj J. Maurício, PB Pettitt, P. Souto, E. Trinkaus, H. van der Plicht, J. Zilhão, "La frua supra paleolitika homa skeleto el la Abrigo do Lagar Velho (Portugalio) kaj moderna homa apero en Iberio," Proceedings of the National Academy of Sciences, 96-13, (ISSN 1091-6490, DOI 10.1073/pnas.96.13.7604, legebla interrete [arkivo]).

Mia sento estas, ke restaĵoj de neandertaloj aŭ gigantopitekoj ankoraŭ ekzistas kaj inspiris skulptaĵojn kiel la kapo de El Juyo.

## Neandertalaj homoj plu vivas – 2

Ne nur en Himalajo la tie nomitaj « jeti » renkontiĝis, fakte ankaŭ en antikva kaj mezepoka Eŭropo estis atestaĵoj kaj bildaj spuroj de ties ĉeesto, pri tio eble posta artikolo parolos. Ĉi foje mi montros, ke en tuta centra Azio estas atestaĵoj pri ili!

*„Iu speco da nasnas-o (estaĵo komparebla al latina Faŭno) renkontiĝas en regiono Bamir (Pamiro), senhomejo inter Kaŝmiro, Tibeto, Vaĥano (1,) kaj Ĉinio. La nasnas-oj estas felkovritaj, krom sur la vizaĝo, kaj saltegas kiel gazeloj. La Vaĥananoj ĉasas kaj manĝas ilin.“*

[el la libro *Ŝaraf al-Zaman de Tahir Marvazi, araba vojaĝisto en la XII-a jarcento*]

*„La besto plej nobla estas la nasnas-o, vivantaĵo vivanta en la ebenaĵoj Turkestan-aj, kun ungoj larĝaj kaj plataj. Kie ajn ĝi vidas homojn, ĝi sekvas ilin kaj rigardas al ili. Kaj kiam ĝi trovas homon solan, ĝi forkaptas lin aŭ ŝin, kaj laŭdire eblas, ke ili gekoncipu kune. Post la homoj ĝi estas la plej supera estaĵo inter la besta regno, tiomtiom ĝi similas al homo : unue per sia dukrura rekta staro, poste per la larĝeco de siaj ungoj, finvice per siaj haroj surkape. »*

[el la libro *Ŝahar Makala de Nizami al-Arudi, persa sciencisto en la XII-a jarcento*]

### **Atestaĵo de la ĉef-majoro Miĥajl Topilski (1925) :**

« Dum aŭtuno 1925 mia taĉmento estis operacianta persekutserĉante gerilan bandon kontraŭsovetan en okcidenta Pamiro.

Survoje tra la vilaĝoj alt-montaraj en distrikto Vanĉ ni estis aŭdintaj rakontojn pri best-homoj vilaj kaj monstraj ( la « dev » -oj de la persaj kaj taĝikaj malnovaj legendoj ) vivantaj en la montaraj. Laŭ la lokaj kredaĵoj renkonti la estaĵon, vidi ĝin kaj aŭdi ĝiajn hurlojn, ĉio tio altiras malbonŝancon kaj anoncas morton. Ni tute ne atentis tiujn rakontojn.

Ni sekvantaj spuron de la bando laŭlonge de montarpado, kaj atingintaj limon de la eterna neĝo, ni ekvidis paŝosignojn traŭrantaj trans la pado ; Nia hundo malkonsentis ilin sekvi. Ili estis tute netaj, kaj konjekteble faritaj de homa nuda piedo. Ili finiĝis 150 metrojn pli poste, ĉe la bazo de roka klifo kruta, malfacilege grimpebla de homo. Post detala esploro nia kuracisto taksis, ke ili estis nediskuteble homaj.

Pluirantaj nian persekutserĉadon, ni reatingas la elĉerpitajn restulojn de la gerilula bando, haltintaj por ripozeti en groto malfermanta en rokklifo superita de glaciario kvazaŭpendanta super ĝi. Ni preterĉirkaŭas ilin silente kaj ekokupas pozicion pli altan ol ilia. Mitralon ni direktas al ili. Apenaŭ ni estis ĵetintaj unuan granadon viro eliras el la groto kriante, ke la pafoj igos la glaciaron disfali, kaj tial ĉiuj estos egale enfositaj. Ni postulas al ili kapitulaci. Li petas havi tempon por pridiskuti la aferon kun siaj sampartianoj kaj reeniras la groton. Malmulte da tempo poste ega krakbruo aŭdiĝas, dum la glacio ekmovetas. Preskaŭ sammomente ni aŭdas pafojn, kaj en la dubo ni kredas pri sturmo de ili. Neĝ- kaj glac-pecegoj ekfaladas de la klifo kovrante pograde la eniron de la ŝirmejo. Kiam ĝi estis preskaŭ tute ŝtopita, tri viroj sukcesis eskapi, la aliaj (ni poste lernis, ke ili estis kvin) estante enfositaj. Ni mortpafis du, kaj severe vundis la trian. Konstatigis, ke tiu kaptito estis uzbeko, posedanto de tetrinkejo en Samarkando.

Li rakontis, ke dum ili estis pridiskutantaj nian kapitulacipostulon pluraj vilaj estaĵoj homsimilaj eliris el fendego de la rokmuro, ili estis armitaj per bastonoj. La viroj provis sin defendi pafante. Nia kaptito ricevis baton surŝultre dum li estis fuĝanta elirejen postkurata de unu el la monstroj. Tiu estis mortigita kaj superkovrita de falanta neĝamaso.

Ni provis kontroli tiun strangan rakonton. Ni petis lin ke li montru la precizan lokon, kaj ni forfosis la neĝon. Ni verfakte trovis la korpon. Ĝi estis ricevinta tri kuglojn. Unuavide la kadavro ŝajnis estis tiu de antropoida simio : ĝi estis tutkovrita per haroj. Sed mi ja sciis, ka tiaj simioj ne ekzistas en Pamiro. Kaj la korpo fakte aspektis pli bone al tiu de homo. Ni tiris la harojn kaj konstatis, ke ili vere estis la naturaj haroj de la estaĵo.

Tio estis vira individuo 1,70 metrojn alta, iom maljuna, kun haroj kelkie griziĝintaj. La haroj estis pli longaj sed pli maldenskreskaj sur la brusto, pli mallongaj kaj pli densaj sur la ventro. Estis malpli da haroj sur la gluteoj, el tio nia kuracisto deduktis, ke la kreitaĵo kutime sidis, kiel homa estaĵo. La koksoj estis pli vilaj. La genuoj estis tute nudaj kaj kovrita per kalaĵoj. La tuto de piedoj, inkluzive de la supraĵo, estis sufiĉe senhara, kovrita per haŭto malmola kaj bruna. La ŝultroj kaj brakoj estis egale kovritaj per hararo, kies dikeco malkreskis al la manoj. La manplatoj estis tute senharaj kun nur kaleca haŭto.

La vizaĝo estis malhela, kaj la estaĵo havis nek barbon nek lipharojn. La malantaŭa flanko de la kapo estis kovrita per tre densaj implikitaj haroj. La kadavro kuŝis okulojn malfermaj, la dentojn videblaj ; La okuloj estis malhelakoloraj, la dentoj grandaj kaj homeceformaj. La frunto estis simiece klina, la brovostoj ege elstaraj. La altaj zigomoj similigis ĝin al mongolo. La nazo, kies radiko estis tre enprofundigita, platis. La oreloj estis nudaj, kaj iom pli pintformaj ol ĉe homa estaĵo. La malsupera makselo estis fortega. Ĝi havis potencon bruston ege muskolriĉan. Ni ne trovis ian ajn netan malsimilecon al homo. La seksorganoj estis tutsame al viro. La braklongo normalis. La manoj iomete pli longaj kaj la piedoj multe pli largaj ol ĉe la homoj.

Ni malsciis, kie ni troviĝas ekzakte, ĉar tiam ne ekzistis ĝusta mapo pri Pamiro. Tamen ni konjekteble estis ie inter la Jazgulem-o kaj la montarvico Ruŝano. Ĉar nia komisiono estis plenumita, ni estis returnontaj. La naturo de la mortigita estaĵo problemis al ni. Sed ne eblis al ni kunporti ĝin laŭ la malfacilega vojo, kiun ni estis sekvontaj. Kaj ni timis ekhavi al ni problemoj kun la loĝantaro : ni ja povus diri, ke ni portas beston, sed vere tio tro multe similis kiel homon. Ni pensis senhaŭtigi ĝin por kunporti la haŭton, sed ja tio tro pensigis je senhaŭtigi homon. Fine ni decidigis enterigi lin tie, kie ni trovis lin.

Ni direktis nin al sudo forlasante kiel eble plej frue la montojn, kaj transiris riveron (konjekteble la Panĉ-o). La nemultaj loĝantoj de tiuj aliaj montoj, baluĉoj, miris vidi nin, kaj demandis nin, kiel do ni povis eskapi el tiuj regionoj supozitaj esti loĝataj per homaspektaj homoj.

Ni eksciis per la baluĉoj abundajn aliajn detalojn. Ili diris al ni, ke la vilaj homsimilaj estaĵoj estis vidataj ne nur solaj sed ankaŭ duope kaj iomfoje kun ido, sed neniam ili iris per pli ampleksaj grupoj.

(1) ankaŭ vortita Wakhan, aŭ Wakhan koridoro, montara kaj pattenilforma regiono en la Pamira Monsistemo en ekstreme nordokcidente de Afganio. Ekde la determino de la afgana landlimo (1895–96), tiu konsistigis strategia interzono inter tiam Rusia Turkestano Tiam brita Hindio kaj Ĉinio . Vahxan rivero fluas okcidente orienten tra vahxan lauxlonge 160 kilometerojn.

Alesperantigis Roland PLATTEAU 27/9-1/10/2003

Mi jam raportis en pluraj artikoloj atestaĵojn pri restaĵaj homeculoj, eble lastaj neandertalaj homoj. Atestaĵoj nuntempaj ankaŭ estas, ĉefe en eksa Sovetio kaj centra Azio ; ilin studis Michael Trachtengerts, Dimitri Bayanov, Boris Porchnev. Sed en Eŭropo ili malaperis ; ŝajnas, ke la lastaj vidoj estis en Transilvaniaj Alpoj (nuna Rumanio) far Michael WAGNER kaj en eŭskaj Pireneoj, dum la 18-a jarcento.

Multaj rakontoj portas pri detaloj tiom strangaj « kiujn oni ne povis elpensi » ekzemple en Hispanio ekzemple klasika estas la spito de la ĉevalo kies voston la kamparanoj trovas matene, post vekiĝo, nodata per strangaj harplektaĵoj. » (aperita en Turka Stelo sendita de Maurizio Brucco el Hispanio ).

Sed

Tamen estas unu rakonto multe pli novtempa, kiu rilatas al Hispanio, jen ĝi :

Ĉi tiun eĉ pli nekredeblan okazaĵon malkovris Michel Raynal. "Sinjorino Gomez (naskiĝinta en 1926), loĝantino nun de Lézignan (Francujo, departemento Aude), rakontis al ni, ke en ŝia naskiĝvilaĝo Cuevas Bajas (Hispanio, provinco Malago), ĉirkaŭ 1920, juna paro, la Palmares, iris al Sierra Morena por paŝti brutaron. Ili vivis izolite en kabano. Iun tagon, dum la edzo forestis, la juna virino malaperis. La vilaĝanoj ne longe serĉis, pensante, ke ŝi estis manĝita de la sovaĝaj bestoj, kiuj infestis la regionon. Sed iom poste, la virino revenis hejmen kaj rakontis sian mirindan historion. Ŝi estis forkaptita de simio dum ŝi lavis siajn vestaĵojn en la rivero. Ĝi prenis ŝin al sia kaverno kaj seksperfortis ŝin. Dum lia foresto, ŝi sukcesis eskapi. Kelkajn monatojn poste, ŝi naskis filinon, kiu nomiĝis Anica kaj estis pli konata per la kromnomo "la filino de la orangutango". Ŝi parte heredis la fizikon de sia patro: longajn brakojn, harplenan korpon; ŝia vizaĝo estis simieca en sia malsupra parto, tiu de sia patrino en sia supra parto. Ĉi tiu knabino ankaŭ havis, du filojn, kiuj ankoraŭ loĝas en la urbo Labisbal (provinco Ĝirono); la unua estas tute normala, sed la alia estas moknoma "la Fromaĝo" pro sia simia malbeleco...

Denove kaverno (la nomo de la loko, Cuevas bajas, signifas "Malaltaj Kavernoj")!

<http://daruc.pagesperso-orange.fr/> « enlèvements » kaj raportita far Daniel Fabre en sia libro pri « Jean-de-l'Ours »)

La rusa verkisto Turgenjev rakontis iam en Parizo, kie li vivis, ke iam, kiam li estis juna viro, li ekbanis sin (do tute nuda; naĝkalsonetoj ne ekzistis tiuepoke) en rivereto proksime de vilaĝo. Sed subite terura virino tute vila plonĝis en la riveron, lerte naĝis, kaj komencis tikli lin! Li estis kvazaŭ paralizita de timo, sed tamen sukcesis reiri sur la bordon kaj kuri ĝis la vilaĝo. Tiu incidento ebligas kompreni la legendojn rakontantajn, ke en riveroj loĝas undinoj, kiuj mortigas la solajn virojn per tiklado; konjekteble ili estis tiom teruritaj, ke ili dronis! Fakte tiu vila virino, kiel en la tradiciaj rusaj rakontoj pri rusalkoj, estis konjekteble restaĵa homeculo, kiu volis amori kun li.



« sovaĝa viro » bildigita de 16-jarcenta germana artisto, eble inspirita de rakonto pri restaĵaj homeculoj

## En Florido, spura fotilo fotis estaĵon nekonatan simila je simio



En la usona subŝtato Florido, spura fotilo metita en nepublikigita loko fotis bildon de mistera estaĵo. La estaĵo similas ĉimpanzon. Ne estas sovaĝaj simioj en Florido, sed dum jardekoj, onidiroj cirkulis pri la tiel nomata "Mefitsimio", simi-simila estaĵo.

Ĉi tiu estaĵo estas foje priskribita kiel primato kiel ĉimpanzo, orangutango aŭ gorilo, kaj foje kiel io tre homsimila, kiel Saskvaĉo.

La fotilan bildon disdonis la anonima posedanto de la aparato al kriptozoologoj kaj publikigis en la blogo de esploristoj ĉe la Rokmontara Bigfoot-Organizo. "Mia amiko, kiu esploras la floridan mefitsimion, ricevis ĉi tiun bildon el nia regiono," skribis la kontribuanto. "Se ĝi estas falsa, ĝi estas bona falsaĵo!" Kion vi pensas, ke ĝi estas? "

Laŭ kriptozoologoj, la foto povus montri patrinon kun bebo. La felo de la bebo estas pli hela, kaj ĝia kapo kaj parto de ĝiaj ŝultroj estas videblaj.

La mefita simio estas enigma, simisimila estaĵo, kiun kriptozoologoj kredas loĝi en la arbaroj kaj marĉoj de la sudorienta Usono. La supozata estaĵo ankaŭ estas ofte nomata la Florida Saskvaĉo kaj ofte estas komparata kun, konsiderata sinonima kun, aŭ nomata la "kuzo" de Saskvaĉo, grava figuro en Usono.

La apero de la mefita simio en la folkloro de Florido, Georgio kaj Alabamo estas dokumentita de kiam eŭropaj setlantoj komencis okupi la regionon.

En 1818, lokaj gazetoj raportis rakonton el kio nun estas Apalachicola, Florido, pri "homgranda simio" trudeniranta manĝaĵvendejojn kaj persekutanta fiŝkaptistojn laŭlonge de la marbordo. ♦

# Vi venas kiel maja nokto

*Bolesław Leśmian*

*Tradukis: Ryszarda Kwiatkowska*



**B**lanka nokto, nokto dormanta en jasmeno...

Kaj viaj vortoj odoras je jasmeno...

Kaj arĝenta sonĝo ŝvebas kun la luno...

Mi amas vin...

Mi ne promesas al vi multon...

Ĉar ĝi estas preskaŭ nenio...

Maksimume, printempa verdaĵo...

Kaj sunaj tagoj...

Maksimume, rideto sur via vizaĝo...

Kaj mano en bezono...

Mi ne promesas al vi multon...

Ĉar mi donas al vi nur min mem...

Kiel aeron.

Kiel truon en malnova svetero.

Kiel arbon en maldensejo...

Mi simple amas vin... mia amo.

Ĉu vi permesos al mi diri al vi...

En granda mallongeco kaj silento...

Ke mi donos ĝin al vi kaj malfermos ĝin...

En la silento de koroj, en la brilantaj riveretoj...

Du vortoj forŝtelitaj de sonĝo...

Kaŝitaj de nokto... kaptitaj de tempo...

Du vortoj kiuj sonas kiel kantado,

du simplaj vortoj... Mi amas vin



# Filino kaj ŝia patro

*Yin Jiaxin*



En la tago de emeritiĝo de Lin Pinpin, oni faris por ŝi simplan adiaŭan feston. La kolegoj diris multajn ĝentilaĵojn, kaj ŝi esprimis sian dankon ridetante, dum en la koro ŝi pensis pri la hejmaj aferoj.

Emeritiĝinte, ŝi, kvindekkvinjara, devus sin distri, tamen ŝi fariĝis eĉ pli okupata, ne pro siaj privataj aferoj, sed pro ofta vizitado al la gepatroj. Ŝia loĝejo ne estis malproksime de tiu de la gepatroj, je dudek minutoj per biciklo. Ŝia patro, okdekkvarjara, estis paralizita preskaŭ tri jarojn. Pro la malfortaj kruroj, li devis sin apogi sur muro por paŝi, kaj bezoni rulseĝon por pli longa distanco. Ŝia patrino, du jarojn pli juna ol la patro, suferis de alta sangopremo kaj diabeto. Lin Pinpin havis pli aĝan fraton, kies familio loĝis en Shenzhen, kiu estis tre malproksima. Ŝia frato kun la familianoj vizitis la gepatrojn nur unufoje en pluraj jaroj, iajoje salutante ilin per telefono. Lin Pinpin neniam donis atenton al tio, ke la frato ne povas prizorgi la gepatrojn. Kaj ŝi opiniis, ke ŝi devas prizorgi la gepatrojn kiel filino loĝanta proksime, .

Iun tagon ŝia patrino telefone diris, ke ŝi sentas sin senforta, eble malvarmumante. Lin Pinpin demetis la telefonon kaj tuj biciklis al la gepatroj. Enirinte la pordon, ŝi vidis, ke la patrino kuŝas flanke sur la sofo, kaj la patro en la rulseĝo frapadas la plankon per sia apogbastono, “dun-dun-dun”, murmurante ke li malsatas.

Lin Pinpin rapide lavis rizon por kuiri. Ĉar la patrino suferis altan sangopremon kaj diabeton, kaj la patro havis malsanan renon, do ŝi metis malmulte da oleo kaj salo en la manĝaĵo. Kiam la manĝo pretiĝis, ŝi alpuŝis la patron al la tablo kaj verŝis al li bovlon da supo. Tiu ĉi, post unu gustumo, eksulkigis la brovojn kiel tuberon, demetis la kuleron, kaj voĉegis kvazaŭ tondro: “Ĉi tiu supo estas kiel boligita akvo! Vi certe forgesis meti salon, ĉu?”

Lin Pinpin pacience klarigis: “Paĉjo, la kuracisto diris, ke vi kaj panjo ne manĝu trosalaĵon, kiu malutilas al via sano. Mi metis nur iomete da salo.”

“Diable!” La maljunulo frapegis la tablon, tiel ke eksaltis la bovloj kaj manĝobastonetoj, kaj la supo disverŝiĝis. “Kia kuracistaĉo! Mi nur scias, ke la manĝo ne estas manĝebla! Vi kuiris jardekojn kaj ankoraŭ ne scias salecon aŭ malsalecon? Ĉu vi vivis samkiel hundo?”

La maljunulino flanke admonis: “Olda Lin, parolu malpli, Pinpin ja intencis por nia bono.”

“Ne intervenu!” La maljunulo silentigis la maljunulinon per krio, kaj daŭre insultis: “Ĉar mi estas paralizita, vi intence faras la manĝaĵon neglutebla por turmenti min, ĉu ne? Vi nun havas fortajn flugilojn, do ne plu konsideras min via patro!”

Mordante sian lipon, Lin Pinpin silentis kun la kapo klinita. De la infanaĝo ŝi konis la patran temperamenton: li ofte koleriĝis pro bagatelo, eĉ pro nenio, kaj neniu povis lin persvadi. Silente ŝi forviŝis la disverŝitan supon, kaj rekuiris la supon kaj la pladojn. La maljunulo restis malkontenta en la tuta manĝo, dum la maljunulino ĝemadis.

La sekvan tagon Lin Pinpin denove iris kuiri por la gepatroj. Ĉi-foje ŝi speciale atentis la salecon. Sed tuj kiam la patro ekmanĝis, li, ĵetinte la manĝobastonetojn kaj kraĉinte surplanken, eksplodis eĉ pli forte ol la antaŭa tago: “Lin Pinpin, ĉu vi intencas insidi kontraŭ mi? Hieraŭ neglutebla, hodiaŭ denove, vi deziras, ke mi ne manĝu, ke mi mortu pro malsato, ĉu?”

Per la voĉo mallaŭta sed la tono iom pli malmola ol kutime, Lin Pinpin ekrezonis: “Paĉjo, mi jam diris al vi, tro da salo malbonas por via sano. Via sangopremo estas alta, kaj lastan fojon en la hospitalo ankaŭ la kuracisto...”

Antaŭ ol ŝi finis, la maljunulo ekprenis la apogbastonon kontraŭ la rulseĝo kaj ŝvingis ĝin al ŝi. Lin Pinpin ne sukcesis eviti, la ligna bastono peze trafis ŝian maldekstran suron. La doloro estis tiel ega, ke ŝi tuj klinis sin, kaj larmoj ekfluis. Ŝi levis la pantalonon kaj vidis, ke en la suro estas granda kontuzo blu-nigra.

“Olda Lin—” Elkurinte el la kuirejo kaj vidinte la kontuzon, la maljunulino ektemis, sed ŝiaj vortoj ne povis eliri. Kun ruĝiĝintaj okuloj, ŝi tenere karesis al sia filino la dorson, konsolante: “Pinpin, via patro ne intencis, tia estas lia temperamento, ne koleru pri li.”

Forviŝinte siajn larmojn kaj malleviste la pantalonon, Lin Pinpin prenis la franĝobalailon el la manoj de la patrino, kaj ekpurigis la plankon. La patro restis senvoĉa. Oni ne scias, ĉu li konsciis, ke li trois?

Eltenante la doloron, Lin Pinpin lavis la manĝilaron kaj pretigis la kuracilojn por la patrino. Poste ŝi eliris el la pordo, ignorante la patron. Dum ŝi biciklis hejmen, larmoj simple ne ĉesis. Ŝi rememoris pri sia juneco, pri la suferoj, kiujn ŝia patrino eltenis dum tiuj jaroj, pri tio, ke okaze de festoj ŝi portis grandajn kaj malgrandajn donacojn al la gepatroj, kaj pri la okazaĵoj de hieraŭ kaj hodiaŭ. Ju pli multe ŝi pensis, des pli maldolĉe ŝi sentis.

Mallumiĝis, kiam ŝi atingis la hejmon. Ŝia edzo, Can Hanhe, estis pretiganta manĝon en la kuirejo. Aŭdinte la pordoknaron, li ekrigardis kaj vidis ŝiajn ruĝajn okulojn kaj strangan mienon. Li alproksimiĝis kaj zorge demandis: “Kio okazis? Ĉu io malbona ĉe panjo?”

Lin Pinpin sidiĝis sur la sofo, kaj la aflikto, kiun ŝi retenis la tutan vojon, finfine elverŝiĝis. Ŝi kovris la vizaĝon kaj ekploregis, interrompe rakontis la okazaĵojn de la du tagoj, kaj kiam ŝi parolis pri la kontuzo sur la suro, ŝi kuspis la krurumon. Sub la luma lampo la kontuzo aspektis terure: sur blu-nigra fundo troviĝis malhele ruĝa strio. Can Hanhe ekzamenis ĝin, profunde sulkigis la brovojn senvorte.

“Mi neniam plu iros al ili,” diris plorsingulte Lin Pinpin. “Mi jam havas kvindek kvin jarojn, mi ne estas infano. Kiam ajn insulti min kaj kie ajn bati min. Kial mi devus toleri tion? Eĉ se li estas mia patro, mi ne plu suferos lian tian humiligon.”

Ŝi parolis rapide kaj kolere, larmoj kovris ŝian vizaĝon, kaj la tuko en ŝia mano tute malsekiĝis. Ŝi atendis, ke la edzo konsolu ŝin, dirante “jes, ne plu iru al ili” aŭ “paĉjo ja agis troe”. Sed Can Hanhe ne voĉis sed sidiĝis apud ŝi larmante.

Lin Pinpin konsolite pensis, ke la edzo kompatas ŝin, kaj ŝia koro varmiĝis. Ŝi volis diri: “Kial vi ploras? Ne estis vi batita,” sed antaŭ ol ŝi povis diri tion, Can Hanhe ekparolis per tre mallaŭta voĉo, preskaŭ kiel monologo: “Pinpin, vi estas feliĉa.”

“Kio?” Ŝi pensis, ke mem misaŭdis.

“Mi diris, ke vi estas feliĉa.” Can Hanhe levis la kapon kaj rigardis ŝiajn okulojn. En liaj iomete nebulaj okuloj estis plena seriozeco: “Vi en tia aĝo ankoraŭ havas patron, kiu povas bati vin, kaj patrinon, kiu atendas vian kuiradon.” Parolante, lia voĉo raŭkiĝis: “Sed mi ne havas. Multfoje mi tiel sopiris miajn gepatrojn, ke en sonĝo mi aŭdis, ke mia panjo vokas mian karesnomon, kaj mi ĝojis neesprimeble, sed vekiĝinte mi trovis nur la malsekan kusenon. Mi volus, ke mia patro denove batu min, ke mia patrino denove insultu min, sed tia ŝanco ne povas sin trovi por eterne. Vi havas ĝin. Kiel feliĉa vi estas!”

Lin Pinpin ekmiris, ĉar ŝi neniam aŭdis la edzon paroli tiele dum la pasintaj tridek jaroj. Ŝia bopatro ne ĝisvivis la edziĝon de la filo, kaj kiam ilia filo trijariĝis ŝia bopatrino estis trafita de hepata kancero, kaj mortis post unu jaro. Tiatempe Can Hanhe perdis dek kilogramojn, kaj multaj blankaj haroj ekaperis ĉe liaj tempioj. Sed li neniam parolis pri la aflikto pro la forpaso de la patrino, male vivis kun optimismo kiel kutime: deĵori, aĉeti legomojn, kuiri, trinki iomete da vino kaj spekti televidserion. Ŝi pensis, ke li jam superis la aflikton kun paso de la tempo. Sed nun ŝi komprenis, ke iuj aferoj estis neniel forlasitaj.

Tiun nokton Lin Pinpin turniĝadis sur la lito kaj ne povis endormi, dum ŝia edzo baldaŭ ekdormis, kun spiro regula kaj ronkado mallaŭta. Ŝi turnis sin al lia flanko kaj rigardis lian vizaĝon. Sub la malforta lumo de la nokta lampo ŝi vidis la profundajn sulkojn ĉe liaj okulanguloj, rememorante, ke kiam ili geedziĝis, li havis densajn brovojn, peĉ-nigrajn harojn kaj blankegajn dentojn.

Je la sesa de la sekva mateno ŝi ekaŭdis bruon en la kuirejo. Post kiam ŝi tualetis, Can Hanhe jam stufis poton da ripaĵo-suppo, kies agrablaodoro tiklas la nazon. Li enverŝis la supon en termogamelon kaj solide turnis la kovrilon.

“Jen, iru rapide al panjo,” dirante, Can Hanhe transdonis al ŝia edzino la termogamelon kaj sakon da ĵus vaporumitaj mantooj. “La manĝo sufiĉas. Vi manĝu kune kun ili.”

Tenante la termogamelon, Lin Pinpin ekridetis, kaj samtempe emis larmi. Ŝi volis diri al li “dankon”, sed sentis, ke estus tro fremde diri dankon inter geedzoj. Ŝi nur diris milde: “Do vi sola manĝu vian tagmanĝon.”

“Jes, bone. Rapidu.”

Ŝi eliris el la pordo, surbicikliĝis kaj sin direktis al la loĝejo de la gepatroj. Ankoraŭ ne plene vekiĝis la strato antaŭ la sepa horo, ankoraŭ brilis la stratlanternoj, kaj la vento estis pli malforta ol la antaŭa tago. La termogamelo en la korbo ete ŝanceliĝis kun la rulado de la bicikloradoj.

Kiam Lin Pinpin malfermis la pordon per sia ŝlosilo, ŝia patrino ĵus leviĝis, kaj vidinte ŝin, ŝi miris momente. En ŝiaj okuloj ekbrilis lumo kompleksa: kortuŝeco kaj kulposento. Ŝi ridete transprenis la termogamelon kaj iris en la kuirejon. Kiam Lin Pinpin metis bovlon da la ripaĵo-suppo sur la tablon, ŝi diris al la patro: “Paĉjo, la suppo estis ĵus stufita de via bofilo. Vi gustumu.”

La maljunulo senvoĉe ĵetis rigardon al la filino kaj komencis manĝi la supon. La ripaĵo estis kuirita tre konvene por li: la viando apartiĝis de la ostoj per unu tuŝo de la manĝobastonetoj. Maĉante la viandon malrapide, li faris neniun kritikon pri ĝia sapor. La manĝo okazis silente. Neniu parolis, kaj aŭdiĝis nur la sonoj de bovoj kaj kuleroj.

La tagoj daŭris kiel kutime: Lin Pinpin konstante vizitis la gepatrojn, la patrino ĉiam estis parolŝparema kaj la patro kolereza aŭ pro nekonvena manĝaĵo, aŭ pro akvo tro varma, aŭ sen ia kialo — li simple trovis ĉion ĝena. Lia voĉo estis laŭta, lia spiro forta, kaj kiam li koleregis, li eĉ ĵetis aĵojn: apogbastonon, teleron, tason kaj kion ajn ĉe lia mano. Iufoje Lin Pinpin estis batita per la apogbastono je la brako, sur kiu montriĝis granda blua makulo. Alian fojon, dum ŝi viŝis korpon por la patro, tiu ĉi senkiale ekkoleris kaj frapis ŝin sur la nukon, tiel ke ŝiaj oreloj zumis longe. Ĉiufoje la maljunulino penis malhelpi sian edzon, sed neniam sukcesis. Tiu ĉi insultis ankaŭ la edzinon, dirante, ke ŝi tro dorlotas la filinon, tiel ke la filino fariĝis pli sentaŭga. La maljunulino, lacigita de tiom da insultoj, devis larmante resti silenta.

Ĉiufoje kiam Lin Pinpin estis insultita aŭ batita, ŝi koleregis ankore kaj sentis, ke ŝi estis traktita maljuste. Sed tamen ŝi ankoraŭ vizitadis la gepatrojn. Iom post iom ŝi ĉesis sin ĉagreni pro la insultoj kaj batoj. Ŝi komprenis, ke maljunulo similas al infano, kiu ne obeas racion, sed sekvas sian kapricon, kaj ke se infano estas kulpa, oni povas iomete frapi lian postajojn; sed tiu ĉi estas ŝia patro, ŝi ja povas lin nek insulti nek bati reen.

Jam pasis tri jaroj post la emeritiĝo de Lin Pinpin. La sano de ŝia patro pli kaj pli malboniĝis: de apenaŭ pasi apogante sin al muro, ĝis ne plu forlasi la rulseĝon, kaj fine nur kuŝi en la lito. Li fariĝis pli malgrasa. Kiam li faris insultadon, la voĉo iĝis senforta kaj raŭka kiel trivita radioaparato kun preskaŭ elĉerpita pilo.

En iu aŭtuna posttagmezo, Lin Pinpin ricevis telefonvokon de sia patrino, kies voĉo tremis maltrankvile: “Pinpin, venu rapide. Via patro... li estas en malbona stato.”

Kiam Lin Pinpin atingis la loĝejon de la gepatroj, ŝi vidis plurajn homojn ĉe la patra lito, sur kies rando sidis la patrino kun larmoj ruliĝantaj sur la vangoj. La kuracisto kaŝe al Lin Pinpin sugestis, ke oni devu pretigi la funebraĵon por la maljunulo. Vespere venis ŝia frato kun la edzino per aviadilo el Shenzhen.

La maljunulo elspiris pli ol enspiris. Lia vizaĝo estis tiel terure magra, ke restis nur haŭto, la vangostoj elstaris alte, la lipoj estis fenditaj, la okuloj duone fermitaj, kaj la nebulaj pupiloj malrapide turniĝis. Ŝajnis, ke li volas ion diri, sed el lia gorĝo eliĝis nur neklaraj sonoj “he— he—”, kiel aero elblovanta el difektita balgo de akordiono.

La frato de Lin Pinpin sin klinis kaj alproksimiĝis, vokante “Paĉjo”, sed la maljunulo ne reagis. Ankaŭ la bofrato alproksimiĝis kaj vokis, sed la maljunulo restis same. Liaj okuloj rigardadis la plafonon. La maljunulino plorsingulte diris: “Olda Lin, rigardu. Jen via filo kaj bofilino, vi rigardu ilin.”

La okuloj de la maljunulo malrapide ĉirkaŭiris la ĉambron, tanĝante unu post alia. Li penige levis sian sekan manon kaj svingetis ĝin al ĉiuj. Tiu gesto estis komprenebla por ĉiuj: li volis, ke oni foriru.

La filo demandis: “Paĉjo, ĉu vi volas, ke ni foriru?”

La maljunulo palpebrumis por jesi, poste fikse rigardis Lin Pinpin. En liaj nebulaj okuloj eke eliĝis iometa brilo, kiel flamo de kandelo tuj estingonta subite saltis supren en la lasta momento. La frato denove demandis: “Ĉu vi volas, ke Pinpin restu?” La maljunulo palpebrumis refoje.

Kun la koro dolora, Lin Pinpin alpaŝis kaj kaŭriĝis apud la lito, mallaŭte vokante: “Paĉjo.”



La buŝanguloj de la maljunulo ekstremitis, kvazaŭ li penus fari ian esprimon: ĉu por rideti, ĉu por diri ion, oni ne povis distingi. Li mole trenis la manon de Lin Pinpin sub la litkovrilon. Lia mano, tremante, metis aĵon en ŝian manplaton.

Larmoj ektorentis el la okuloj de Lin Pinpin. Ŝi volis ion diri, sed la gorĝo ŝajnis ŝtopita. Ŝi firme tenis la malgrasan manon kiel falintan folion, memorante, ke tiom forta ĝi estis, kiam ĝi svingis la apogbastonon por bati ŝin. Se ĝi ankoraŭ povus levi la apogbastonon por ŝin bati!

La maljunulo rigardis sian filinon, kiun li insultis kaj batis multfoje. Liaj lipoj moviĝis kelkajn fojojn, bedaŭrinde sen sono. Tamen Lin Pinin komprenis, ke li volis diri "prenu ĝin" Ŝi jam ploris tiel malĝoje, ke ŝi ne plu povis klare vidi la vizaĝon de sia patro. Ekster la fenestro en la nokta ĉielo brilis stelaro kvazaŭ sennombraj paroj da tristaj okuloj.

Poste oni trovis, ke tio, kion la patro donis al la filino, estas deponkajero de lia dumviva ŝparaĵo. Sur la dorso de ĝia kovrilo estis skribite: "La pasvorto estas via naskiĝdato." ♦

# Ario de juneco

Daŭrigante la enhavon de numero 011

*Yin Jiaxin*



## Ĉapitro 12 Hu Zenzi rakontas

Ricevinte la akceptleteron de transpostenigo por Gen Men, mi persone portis ĝin al Vudan. Mi supozis, ke Fanhua akompanos min. Sed ŝi diris, ke ŝi estas tre okupita, pro ke la nova jaro alproksimiĝas. Jes, prave. Mi instruis al ŝi, ke oni ne difektu la laboron pro amo. En la pasintaj tagoj, la humoro de Fanhua estis iom stranga. Mi plurfoje pridemandis ŝin kial. Ŝi diris, ke ŝi estas laca pro okupateco.

Vidinte Gen Men, mi estis surprizita. Li multe maldikiĝis. Certe li laboris tagnokte kaj malbona estis la manĝaĵo en la kantino. Kiam mi montris al li la akceptleteron, li ne montris ĝojan mienon. Mi pensis, ke eble tio estas pro ke la akceptletero eliĝis de la mezlernejo anstataŭ la Buroo de Eksteraj Aferoj. Efektive, mi antaŭe diris, ke mi klopodos transpostenigi lin al la Buroo de Eksteraj Aferoj. Sed mi, maljuna virino sen potenco aŭ prestiĝo, jam faris mian plej fortan klopodon. Mi nur povas diri “pardonon” al li en la koro.

Necesis la aprobo de la lernejestro antaŭ ol Gen Men transposteniĝos oficiale. Malbonŝance, la lernejestro ĵus oficvojaĝis al Beijing. Do mi unue plenumis viziton al la tombo. Ĉifoje mi iris tien por adiaŭi Olda Zan. Mi estis fariĝonta pli kaj pli maljuna, kaj la urbo Ŝan estis malproksima, do mi devis lasi lin sola. Bonŝance, mi jam akiris novan spiritan apogilon. Mi pensis, ke Olda Zan certe estus trankvila subtere.

La vasta tero estis kovrita de dika neĝo kvazaŭ funebra vesto. Mi iris sola al lia tombo kun bukedo da umefloroj. Blovadis glacia vento kaj neĝo flirtis furioze. Mi longe staris antaŭ la tombo, ĝuanta la trankvilecon kaj kvietecon kun Olda Zan.

La ĉielo malheliĝis kaj mi devis foriri. Mi turnis la kapon ade dum paŝado. En la arĝenta mondo, nur la umefloroj sur la tombo estis ruĝaj, tiom okuloplaĉaj. De malproksime mi ankoraŭ povis vidi la ruĝon, kvazaŭ brulantan fajron kaj kvazaŭ batanan koron.

Fanhua, ve! Ĵus reveninte al Vudan, mi ricevis ŝian telegramon, kio urĝis min tuj reiri por grava afero. Kial tiel urĝa?

## Ĉapitro 13

Zu Fanhua ricevis leteron de Gen Men kelkajn tagojn antaŭ ol ŝia avinjo veturis al Vudan. En la letero, Gen Men konfesis al ŝi, ke li trompis sin mem, ŝin kaj ankaŭ ŝian avinjon. Li finfine konsciis, ke lia vera amo estas en la urbo Vudan; la afero, por kiu li batalas, ankaŭ estas en Vudan; kaj la amrilato inter ili devas finiĝi. Leginte la leteron, ŝi spiritforestis, tiel ke ŝi preskaŭ trafiĝis de rulanta aŭto survoje.

Por ne difekti la humoron de sia avinjo dum la tombovizito, ŝi ne rakontis al la avinjo pri la amrompa letero. Tamen ŝi timis, ke post la tombovizito ŝia avinjo restos en Vudan kaj plue spertos la trompon de Gen Men. Do ŝi sendis la telegramon.

Hu Zenzi molfalis sur sofon kun larmoj perlantaj, la buŝo tremanta kaj la manoj kramfantaj. Estis ŝia lasta espero, ke Fanhua kaj Gen Men geedziĝu. Sed ĝi disrompiĝis kaj ĉio fariĝis sonĝo. Ŝi neniel pensis, ke en sia maljuniĝa vivetapo ŝi plie suferas tian grandan baton. Ŝia disrompita koro apenaŭ povis rezisti la baton. Ŝi sopiris, ke Olda Zan venus el la tombo por helpi al ŝi forigi la doloron.

En la sekva tagmezo Zu Fanhua revenis hejmen de sia deĵoro kaj vidis neniun spuron de avinjo krom letero sur la tablo, kiu legiĝas jene:

“Mia kompatinda Fanhua:

Avinjo sentas sin sufoka en la ĉambro kaj volas eliri por distri sin. Mi ne scias, kiam mi revenos. Bonvolu ne maltrankviliĝi, avinjo ne trafiĝos de akcidento nek emos memmortigon. Via avinjo restis kun forta karaktero dum la plejparto de sia vivo. Ŝi ne iros al ekstremaĵo. Ne serĉu min, vi ne povos eltrovi min.

Mi scias, ke via koro afliktiĝas, sed bonvolu ne lasi al la malbona humoro difekti vian okupon. Estu animforta, vi estas juna, kaj la vojo estas longa.

Avinjo vere bedaŭras. Vi iam havis belan unuan amon, kiun mi detruis. Mi ĉiam estis memfida. Mi pensis, ke mi trovis feliĉon por vi. Sed neatendite, mi alportis ne feliĉon sed honton de forlasiteco por vi. De nun mi ne plu interferos en viaj privataj aferoj. Mi sincere benas vin.

Dum avinjo ne estas hejme, bonvolu prizorgi vin bone, ne lasu la korpon malfortiĝi.

Via avinjo

12-a de januaro, 1988”

Zu Fanhua ĵetis sur sin mantelon kaj elkuris el la loĝejo. En tia granda neĝo kaj vento, ŝi ne povis lasi avinjon sola vagi ekstere. Ŝi devis trovi ŝin kaj akompani ŝin. Ŝi serĉis tra la plena fervoja stacidomo, sed vane. Ŝi pensis, ke eble avinjo jam forveturis. Ŝi telefone petis forpermeson de sia ĉefo, kaj eniris trajnon okcidenten.

Ŝi pensis, ke avinjo ne reiros al la lernejo, eble ŝi rekte transbusiĝis al la urbo Jun. Ŝi ne volis resti en Vudan eĉ unu momenton. Ŝi malŝatis ĉi tiun lokon kaj hatis tiun hipokritulon, kiu trompis ŝian kaj avinjan amon.

Dum du tagoj Zu Fanhua pridemandis ĉiujn konatulojn en la urbo Jun, sed vane. Ŝi seniluziiĝis kaj sentis sin tre laca. Ŝi paŝis sencele en la frostaj neĝflokaj kaj ostopika vento. Ŝi ne volis forlasi la urbon Jun. Ŝi ŝatis la malgrandan urbon. Ĉi tie ŝi havis dolĉan revon, kiun avinjo disŝiris. Ĉu ŝi povis rekunigi ĝin? Ŝi iris al la kajo. Trans la rivero estis la ŝipfarejo. Ah, kia familiara loko! Ŝia koro batadis rapide kaj bolis ŝia sango. Ŝi deziris retrovi la perditan revon. Ĉu ŝi povus retrovi ĝin? Ŝi demandis sin mem. Ĉu Lin Zimin pardonos ŝin? Ŝi venis al la kaja gardejo kaj pruntis tiean telefonon por voki la ŝipfarejon. Virina voĉo respondis: “Ha lo! Kiun vi serĉas?”

“Lin Zimin,” ŝia voĉo tremetis.

“Li estas en sia mielmonato.”

“Kio? Ĉu li edziĝis?” Ŝi miregis.

“Jes, li edziĝis je Novjara Tago. Kiu vi estas?”

Sen respondi la aliflankulon, ŝi rekroĉis la aŭdilon kaj eliris la gardejon.

“Uuuu...” La pramo longe sonoris, forlasante la kajon.

La tero estis tute blanka, la ĉielo griza kaj neĝflokaj dancadis tumulte en la aero. Zu Fanhua lante paŝis al la riverbordo, lasante al la morna vento taŭzi ŝiajn harojn. Ŝi rigardis senmove al la direkto de la ŝipfarejo, larmguto pendis ĉe ŝia okulangulo. En la malproksimo foje sin trovis aminda kaduka ŝipo kaj bela vesperruĝo.

## Ĉapitro 14

Vi ne sciis la saponon de maljunulaj larmoj nek la doloron de forlasita knabino. Vi raviĝas en la amikeco kun He Lei, tiel ke via ĉiu leciono estis facile plenumita. Kun bona humoro vi verkadas kaj tradukadas. Farinte la netan kopion de via novelo, He Lei laŭdis, ke ĝi estas patosa kaj certe estos publikigita. Vi grimacis kun unu okulo fermita, dirante: “Dankon! Mi esperas tiel. Dio benu!”

Tamen, via humoro ne ĉiam estis ĝoja. Ĉiufoje kiam vi vidis la fermitan pardonon de instruistino Hu, ombro trairas vian koron. Vi vanigis la esperon de la soleca maljunulino kaj malsanktigis la blindan pasion de la knabino. Vi sentis kulpon kaj ĉagrenon. Vi volis forigi la ombron, sed vi ne povis. Vi deziris, ke la tempo fluu rapide, ĉar ĝi eble povos forigi ĉiajn malagrablajojn.

Kaj efektive, la tempo pasis rapide. En palpebrumo, ekblovis milda printempa vento sur la tero. La vento igis homojn plezuraj kaj varmetaj. Ĝi ankaŭ alportis al vi emocian novaĵon: via tradukaĵo 《Verkaro de Julio Baghy》 estas eldonita kaj via novelo estas publikigita. Vi saltis de ĝojo, kriante “vivu!” kaj tuj telefonis al He Lei.

“Saluton! Ĉu vi estas fraŭlino He?” Vi intencis uzi la vorton “fraŭlino”, kiun oni apenaŭ uzas.

“Kio okazis, vi estas tiom ĝoja?” Ŝi aŭdis, ke estas aludo en via tono.

“Mia novelo estas publikigita kaj 《Verkaro de Julio Baghy》 ankaŭ estas eldonita.”

“Ĉu vere? Gratulon! Ni devas festi.” Ŝia tono estis gaja.

“Jes. Kiel festi?”

“Ni iru danci ĉi-vespere, ĉu bone?”

“Bone. Kien?”

“En la Kultura Palaco.”

“Bone. Mi atendos vin tie je la sesa kaj tridek minutoj.”

“Bone, ĝis vespere!”

“Ĝis vespere!”

Estis tagmeze, vi ekkalkulis la tempon minuto-post-minute. Vi preskaŭ deziris, ke la Tero akcelu sian moviĝon. Du horoj pasis, He Lei telefonis al vi, dirante, ke ankaŭ ŝi ĵus ricevis bonan novaĵon. Vi demandis ŝin, kio estas la bona novaĵo. Ŝi diris, ke ŝi mirigos vin ĉi-vespere. “Vere petolema knabino!” vi diris al vi mem.

Vi malfacile atendis ĝis la sesa horo. Starante sur la perono de la Kultura Palaco, vi atentis la aŭtobusan haltejon trans la strato kaj la ne-motorajn vojojn ambaŭflanke. Vi ne sciis, ĉu He Lei venos per aŭtobuso aŭ biciklo. Vi jam decidis, ke spite ĉion vi konfesos al ŝi: plurfoje vi volis verŝi vian koron al ŝi, sed via vanteco kaj malsupereco perdigi al vi la kuraĝon. Kiel aktoro, kiu memoras la tekston, vi ripetadis en via koro: “He Lei, mi amas vin! He Lei, mi amas vin!...”

La montriloj de la brakhorloĝo finfine atingis la sesan kaj tridek minutojn, sed ne aperis He Lei. Vi fariĝis nervoza, rigardante foje la horloĝon, foje aŭtobuson kaj foje la ne-motorajn vojojn. Je la sesa kaj tridek kvin, alvenis aŭtobuso, el kiu eliris He Lei en oranĝa pulovero. Vidinte vin, ŝi ŝvingis la manon kun koverto, en kiu estas la sciigilo por magistrea studento. Poste ŝi haste kuris trans la straton. Ĝuste tiun momenton, alrulis flugrapide malgranda aŭto.



“Atentu!” vi kriegis konsternite. Samtempe ŝi eligis ŝirantan ŝrikon kaj falis sur la teron, kaj ŝiaj okulvitroj defalis fore. Vi impetis trans la straton kaj prenis ŝin en viajn brakojn. Sed estis malfrue. Ŝi ĵetis rigardon al la verdastela insigno sur via brusto kaj spiris la lastan spiron.

Ho, se vi havus ian grandiozan magian potencon, vi certe renversus ĉi tiun terglobon. Sed tamen, nia planedo daŭre turniĝas trankvile, sen ia signo de foriro de sia orbito. ◆

# Posteuloj de la Drako

Verkis: Hou Dejian Trad.: John Huang



En fora Oriento fluas river'.  
 Yangzi estas ĝia nomo.  
 En fora Oriento fluas river'.  
 Huanghe estas ĝia nomo.

Kvankam ne vidis Yangzi-belon,  
 en songĝ' mi vagas sur ĝia flu'.  
 kvankam ne aŭdis Huanghe-muĝon,  
 en songĝ' mi sentas ĝian tumult'.

En antikva Oriento vivas Drako,  
 ĝia nomo estas Ĉinio.  
 En antikva Oriento vivas homoj,  
 ili estas posteuloj de la Drako.

Sub l' piedoj de l' Drako mi kreskis,  
 Kreskinte mi estas ĝia posteulo.  
 Nigraj okuloj, nigraj haroj, flava haŭt'.  
 Por ĉiam mi estas ĝia posteulo.

Antaŭ cent jaroj, en nokto silenta,  
 en la profunda nokto de l' ŝanĝ',  
 paf' kaj kanon' dishakis silenton,  
 ĉie nin vundis cedema glav'.

Kiom da jaroj ankoraŭ tondras,  
 kiom da jaroj, ho, kiom plu!  
 Ho Drako, Drako, brilu per l' okuloj,  
 por ĉiam tenu ilin bril'.



# Patrin'

Verkis: Che Xing; Trad.: John Huang

Novan sakon ĉe lernej',  
iu portis al vi,  
florombrelon en la pluv',  
iu tenis por vi,  
vian ŝatan farĉon,  
iu faris por vi,  
viajn larmojn de ĉagren',  
iu viŝis por vi.

Ah, jen ŝi estas panj',  
ah, jen ŝi estas patrin',  
ŝi donis vivon al mi,  
kaj hejmon donis al mi,  
Ah, kiom ajn for vi iras,  
kion ajn vi faras,  
ĉiam vi bezonas patrin'.

Se vi loĝas en fremdlok',  
iu zorgas pri vi,  
kiam vi revenas hejmen,  
iu teon faras por vi,  
sur malsanlit' vi kuŝas,  
iu ploras pro vi,  
kiam vi ridetas,  
iu floras pro ĝoj'.

Ah, jen ŝi estas panj',  
ah, jen ŝi estas patrin',  
ŝi donis vivon al mi,  
kaj hejmon donis al mi,  
Ah, kiom ajn riĉas vi,  
kiom ajn altas rang',  
neniam forgesu patrin'.

**《母亲》**  
(阎维文演唱, 车行词、威建波曲)

你入学的新书包,  
有人给你拿,  
你雨中的花折伞,  
有人给你打,  
你爱吃的那三鲜馅,  
有人给你包,  
你委屈的泪花,  
有人给你擦。

啊, 这个人就是娘,  
啊, 这个人就是妈,  
这个人给了我生命,  
给我一个家,  
啊, 不管你走多远,  
不论你在干啥,  
到什么时候也离不开咱的妈。

你身在那他乡住,  
有人在牵挂,  
你回到那家里边,  
有人沏热茶,  
你躺在那病床上,  
有人她掉眼泪,  
你露出那笑容时,  
有人乐开花。

啊, 这个人就是娘,  
啊, 这个人就是妈,  
这个人给了我生命,  
给我一个家,  
啊, 不管你多富有,  
不论你官多大,  
到什么时候也不能忘咱的妈。

**母爱无言  
大爱无疆**  
有妈在的地方  
就是最温暖的家

# Ni laboristoj fortas

vortoj kaj melodio: Ma Ke Trad.: John Huang

Ni laboristoj fortas, hej!

Ni laboristoj fortas!

Ĉiutage ni laboras, hej!

Ĉiutage ni laboras,

Altdomojn ni konstruas,

fervojojn, karbominojn ni faras,

la mondon ni tute ŝanĝas!

Hej! Maŝinoj muĝas kun fervor',

marteloj tintas en labor',

ni faras ilojn por la ter',

kaj armilojn al la front'!

Hej-hej-hej-hej-hej-hej-ho!

Ruĝe brilas nia vizaĝ',

ŝvito fluas sur vizaĝ',

Kial? Por liberig'!

Kial? Por liberig'!

Aj-haj! Aj-haj!

Por tuta Ĉinio, por liberig'!

**咱们工人有力量**  
(马可 词曲)

咱们工人有力量，嘿！  
咱们工人有力量！  
每天每日工作忙，嘿！  
每天每日工作忙，  
盖成了高楼大厦，  
修起了铁路煤矿，  
改造得世界变呀么变了样！

★

嘿！发动了机器轰隆隆地响，  
举起了铁锤响叮当，  
造成了犁耙好生产，  
造成了枪炮送前方！  
嘿嘿嘿嘿嘿嘿哟！

★

咱们脸上放红光，  
咱们的汗珠往下淌，  
为什么？为了求解放！  
为什么？为了求解放！  
哎嗨！哎嗨！  
为了咱全中国彻底解放！

★

# Kulpa vivsavinto

Longarko



**M**i naskiĝis ĉe la antikva Granda Kanalo, kiu komenciĝas de urbo Pekino kaj atingas urbon Hangzhou. Oni nomas ĝin La Granda Kanalo Jinghang (PeKINO kaj HANGzhou). Mia urbo situas laŭ la kanalo en urbo Changzhou. Mi ne bone memoras, kiam mi estis pli-ol-dekjara. En somera ferio mia ĉeftasko kiel unuenaskito estis zorgado pri miaj tri junaj gefratoj dum miaj gepatroj laboris.

... La kanalo estis nia tuta somero. En la kanalo internavedis ŝipoj inter kamparo kaj urbo, kunportante akvomelonojn, legomojn kaj aliajn varojn. La akvo glimbrilis kiel fandita oro sub la posttagmeza suno. Mi memoris, kiel la murmuro de la akvo preskaŭ dronigis la krion de la geknaboj. Miaj gefratoj, la du knabinoj, baraktis en malprofunda akvo ĉe la kanalo, iliaj ridoj estis akraj kiel birdkrioj. Sed ŝi... Mia plej juna fratino, Printempflora, kun siaj okuloj grandaj kiel kristalo, paŝis pli kaj pli for, allogita de la suna brilo sur la akvosurfaco.

Mi kriis ŝian nomon kaj vekis ŝian atenton. La laŭta voĉo forŝiris mian gorĝon, sed la akvo ŝin forprenis, englutis senbrue. Ŝi surda nur faletis, unu momenton, kaj tiam ŝi malaperis sub la akvo, kiu ŝajnis tiel trankvila sur la akvosurfaco.

En tiu momento, la mondo disfalis. Mi vidis nur la cirklojn sur la akvosurfaco, kiuj larĝiĝis kaj malaperis, kvazaŭ ŝi neniam estis tie. Mia alia fratino nur povis eligi teroran kriegon. Miaj kruroj fariĝis plumbaj, mia koro batis tiel forte, ke mi kredis, ke ĝi disŝiros mian bruston. Kaj tamen tiu teruro iom malvarmiĝis en mi, samtempe estis tre timiga kaj firma deziro savi ŝin.



Mi ĵetis min en la akvo, ne pripensante, ke mi ne estis tiel lerta naĝanto. La akvo estis pli malvarma, kvankam estis la somero. Mi baraktis kaj subakvigis min, kiam mi malfermis

miajn okulojn sub akvo ---ĉio estis verda kaj malklara. Kaj mi vidis ŝin. Ŝia hararo flirtis kiel nigra algo, kiu flugis en la akvo, ŝiaj malgrandaj manoj dancantaj, kvazaŭ kaptantaj ion nevideblan.

Mi klopode etendis al ŝi mian brakon. Miaj fingroj tuŝis ŝian hararon, tuj kaptis ĝin. La hararo ŝajnis tiel glita, kiel eskapebla de mia mano. Mi forte altiris. La akvo kontraŭstaris, la hararo estis peza kiel ŝtono. Kun ĉiu forto el miaj ostoj, mi altiris ŝin al la akvosurfaco. Mi konfuziĝis kaj malklare konsciĝis, poste kio okazis.

Ni ambaŭ elvenis el la akvo kiel du dronintaj fantomoj, disĵetante akveron kaj elspiregojn kaj sentante nin panikiĝantaj.

Ni kuŝis sur la bordo, ŝi estis tusanta kaj ploranta, mi estis tremanta pro timo kaj malvarmo, ke miaj dentoj kunfrapiĝis. Sed ŝi vivis kaj estis savita. Ŝiaj grandaj okuloj rigardis min, plenaj de konfuzo kaj larmoj. En tiuj okuloj mi vidis mian propran vizaĝon — pala, timanta, lacega.

La savo estis nur la unua batalo. La dua, kaj eble eĉ pli timiga, atendis nin hejme. Ĉio estis mia kulpo, ĉar mi ne atenteme prizorgis miajn gefratojn. Kiel kaŝi nian aventuron antaŭ niaj gepatroj? La defio kaj terora scenejo atendas min hejme.

Aliaj du gefratoj alvenis ĉirkaŭ ni. Ni vidis nin, unu la aliajn, ni preskaŭ ĉiuj sciis, ke la teruro en la akvo nun malaperis en niaj ostoj, sed ĝi anstataŭiĝis per alia: Ŝtormo pri riproĉadoj kaj punadoj antaŭ niaj gepatroj nin atendas.

Jes. La Parko. Ni ŝajnis unuanime interkonsentaj. Ĝi estis nia rifuĝejo, nia alibio, nia kunlabora mensogo kreskinta el niaj mensoj, nekredible tiel unanima, kiel kunlaborada. Ni kune forkuris tien, niaj korpoj ankoraŭ tremantaj kaj niaj vestoj malsekaj sintenantaj al la haŭto.

La parko en tiu posttagmezo estis varma kaj ora, plena de la bruo de cikadoj kaj la dolĉaodoro de falintaj folioj. Ŝajnis absurde, preskaŭ paradizo, ke tia kvieto povus ekzisti post tio, kio okazis ĉe la kanalo. Sed ĝi estis tie. Kaj ni, la kvar kunuloj kun sekreto, eniris en ĝin.

Unue, ni nur sidis sur la seka, varmega grundo apud la fontano, lasante la sunon varmigi niajn vestojn kaj ostojn. Neniu parolis. Ni nur sidis, kun la fluado de la vento en niaj oreloj anstataŭ la bruo de cikadoj. Printempflora ankoraŭ iomete tremis. Mi metis mian brakon ĉirkaŭ ŝiajn ŝultrojn, kaj ŝi alproksimiĝis, silente senplorĝeme. Tiu silento ne estis malplena; ĝi estis plena de la bildoj, kiujn ni vidis: la verda akvo, la flirtantaj haroj, la blankaj manoj.

Poste, kvazaŭ laŭ neaŭdebla signalo, ni ekstaris. Ni ne povis plu sidi. Ni devis ludi. Ni devis agadi kiel buboj, kiuj pasigis batalplenan tagon. Do ni kuris. Ni kuris tra la herbejo, niaj piedoj tretadis sur la sekan herbaron, niaj ridoj sonantaj tro laŭte, tro akre, kvazaŭ ni provus forpuŝi ion panikan. Ni ludis rulante kaj rampante ŝajne en batalkampo, sed nia ludado estis tro intensa, nia kaŝado tro evidenta. Ni ĉiuj antaŭvidis, ke ni devos ŝirmi nian aventuron kaj niajn subakvigajn vestojn, eĉ niajn vizaĝojn.

Fine, lace kaj elĉerpote ni falis sur la vastan, sunbrilan herbejon. La herbejo estis varma kaj seka kontraŭ niaj korpoj. Ni kuŝis en cirklo, kapo kontraŭ kapo, rigardante la senfinan bluan ĉielon.

La suno brilis sur niajn vizaĝojn kaj vestojn, iom post iom sekigante la lastajn spurojn de akvero. Sed ni sciis, ke nur sekaj vestoj ne sufiĉos. Ili estus tro puraj, tro senmakulaj post tuta tago ekstere.

Do ni komencis la duan parton de nia plano: malpurigi niajn vestojn.

Mi prenis herberojn kaj frotis ilin sur miaj genuoj. Miaj gefratoj ruliĝis en pli seka, polvera parto de la herbejo, kovrante siajn ŝultrojn kaj dorsojn per bruna polvo. Printempflora, kun serioza mieno, prenis malgrandan ŝtonon kaj singarde frotis ĝin kontraŭ la bordo de sia jupo, tiel pentrante makulon. Estis stranga, preskaŭ rita agado. Ni ne parolis dum ni faris tion. Ni sciis nian taskon. Ni sciis nian celon: krei la bildon de normala, malpura, makulita, feliĉa tago.

Kuŝante sur herbejo, kun la varmo de la suno penetranta niajn ostojn kaj la solideca tero estis sub ni, io ekŝanĝiĝis. La teruro komenciĝis kun krepusko. Inter ni, en tiu silenta cirklo sur la herbejo, kreskis io nova, stranga. Ne nur la peza sekreto, sed ankaŭ... neforgesebla mirindaĵo. Ni ĵus travivis ion monumentan. Ni estis ĉe la rando de la abismo kaj revenis al vigla vivo. Kaj nun ni kuŝis ĉi tie, kune sub la ĉielo, kaj la mondo ankoraŭ rondiris. La cikadoj ankoraŭ kantis. La suno ankoraŭ brilis.

Kiam ni fine leviĝis, niaj vestoj estis sekiĝintaj, varmaj de la suno, kaj ornamitaj per la artaj, malgrandaj pruvoj de nia posttagmezo: herbo, polvo, malgrandaj makuloj. Ili aspektis perfekte kredindaj.

La hejmeniro certe estis malsama ol la kutimo. Kia estis la atmosfero dum la vespermanĝo? Ĉu la gepatroj iel suspektis, aŭ ĉu nia "ludo" sufiĉis?

Ni staris antaŭ la hejmdomo, niaj kvar siluetoj kontraŭ la oranĝa lumo de la krepusko. Ni rigardis nin unu la alian. La lipoj de Printempflora ankoraŭ tremis, sed ŝiaj okuloj nun tenis sekreton pli grandan ol ŝia tuta korpo. La du geknaboj, ilia kutima bruemo anstataŭita de rara, peza seriozmieno.

Ni eniris tra la pordo, portante sur ni la odoron de suno, seka herbo kaj polvo — la perfekta parfumo de senkulpa infana ludo. Niaj gepatroj estis en la ĉambro. Nia patrino tranĉis legomojn, ŝiaj movoj trankvilaj kaj efikaj en la kuirejo. Puriginte kaj ordiginte ĉambrojn nia patro kontrolis niajn hejmtaskojn apud la fenestro, la lastaj radioj de suno ornamantaj lian hararon.

"Ho, jen ili alvenas!" diris nia patrino, turnante sin kun rideto. "Vi aspektas kiel grupo da sovaĝaj katidoj! Iru lavi vizaĝojn kaj manojn, la manĝo estas preskaŭ preta."

Ŝiaj okuloj, tiuj amemaj, atentaj okuloj, glitis sur nin. Ili vidis la polveron sur la ŝultroj de miaj gefratoj, la herberojn sur niaj genuoj, la delikatan makulon sur la rando de la jupo de Printempflora. Ŝajne ili akceptis. Ili vidis niajn lacajn ridetojn, niajn iom malordajn harojn, kaj ili pensis: "Ili bone amuziĝis."

Dum la vespermanĝo la tablo estis plena de bruo. Miaj gefratoj, liberigitaj de la sekreta pezo, estiĝis eĉ pli bruemaj ol kutime, rakontante pri "la parko", pri la fontano, pri la granda hundo kiun ili vidis. Ili konstruis nian alibion per sia fantazio, kiujn ni ne eĉ interkonsentis, kaj ili faris tion kun tia natura naiveco, ke eĉ mi preskaŭ kredis ĝin.

Ili ludis siajn rolojn, kaj mi vidis en iliaj okuloj brilon de komplika fiero, miksita kun iom da nerekonita paniko. Neniu menciis la kanalon. Mi kredis, ke ĉio ĉi, kion ili faris, nur senkulpigis ilian plejaĝan fraton, min.

Mi silente manĝis, rigardante ilin. Mi rigardis miajn gepatrojn, kiuj ridetis kaj aŭskultis, tute senkonsciaj pri la kanalo, pri la verda akvo, pri la momento kiam ilia plej juna filino estis tre proksima al abismo. Nia artifiko sukcesis harmonie kun gefratoj.

Poste, kiam ĉio finiĝis kaj la domo fariĝis kvieta, mi estis finfine sola en mia ĉambro. La luno lumis tra la fenestro, falante rekte sur la plankon, kie mi zorgeme rigardis miajn malpurigitajn ĉemizon kaj pantalonon por lavado. En la lunlumo la polvo aspektis kiel fajna arĝenta polvo. La herberoj sekiĝis kaj fariĝis fragilaj. La "makulo" sur mia genuo aspektis kiel malgranda kaj abstrakta mapo.



Sed tiam mi aŭdis mallaŭtan frapeton sur mia pordo. Printempflora. Ŝi eniris, portante sian propran ludurseton en la brako. Ŝi ne diris ion. Ŝi nur grimpis en mian liton kaj alproksimiĝis al mi. Kaj poste venis la unua fratino, kaj poste la dua frato. Ili enrampis silente, kiel tri malgrandaj fantomoj, kaj kaŝiĝis sub la litkovrilo ĉirkaŭ mi. Mi sentis nin amikece unuiĝintaj kaj harmoniaj.

Post nelonge nia aventuro estis finfine malkaŝita, niaj gepatroj neniajn riproĉadon kaj punon faris, nur ofte atentigante nin pri sekureco. ◆

# Vespera Promeno en la Okcidenta Korto

de Fan Chengda (Song-dinastio) Tradukis: *Ardo*



Malvarmo ombris nigrajn nubojn en vespero,  
 flugflor' en korto plendas pri la primavero.  
 ventblov' florigas kaj faligas ankaŭ florojn,  
 do sama vento, sed malsama karaktero.

## 晚步西园

范成大

料峭轻寒结晚阴，  
 飞花院落怨春深。  
 吹开红紫还吹落，  
 一种东风两样心。



# Pordo al Ĉinio malfermita de bombono!

Shenzhen Fabu

Trad.: Sheng Min

Ĉu vi scias Karem? Li estas hotela akceptisto en Milano, Italio. Iam, iu ĉina turisto donis al li bombonon kun arakida farĉo. Li gustumis kaj forte laŭdis la guston. En februaro ĉi-jare, kun la bombona papereto zorge tenata en la mano, li petis aliajn ĉinajn turistojn aĉeti por li tiun saman bombonon. Neatendite, filmeto de tiu momento ekpopulariĝis en ĉina interreto. Homoj eĉ speciale iris al la hotelo, nur por donaci al li pli da dolĉaĵoj. Tiel, unu bombono fariĝis lia neforgesebla "ĉina gusto".

Ankaŭ Karem mem ne antaŭvidis tiom grandan atenton. Invitite de retumantoj kaj de la ĉina bombonmarko, li venis al Guangdong-provinco de Ĉinio kaj pasigis 5 tagojn tie, kie li mergis sin en la lokan metiarton kaj la bongustan lokan kuirarton.

"5 tagoj ne sufiĉas. Mi vere ŝatas la lokon. Mi devus komenci mian vojaĝon ĝuste de ĉi tie!" La 12-an de aprilo, Karem atingis la urbon Shenzhen kaj tion diris, kaj kontente kaj bedaŭre.

Lia unua halto en Shenzhen estis la butikoj de HUAWEI en la kerno de la komerca kvartalo Huaqiangbei. Tie Karem entuziasme ludadis per faldebla poŝtelefono, ĝuante la perfektajn interagojn inter preciza mekaniko kaj inteligenta sistemo, tiel li tuŝis, per propraj fingroj, la pinton de ĉina elektronika tekniko.

Sekvis la cifereca vendejo LEXU, kaj tie la scivolemo de Karem plene ekflamis. Li restis tie plej longe. Li provis magnetan pianon, elektronikan tamburon, kaj poste — sub gvido de dungito — mem ekflugigis flugroboton.



Flugroboto stirata per manaj gestoj



Kiam li svingis la manon dekstren kaj maldekstren, la flugroboto DJI Neo 2 tuj dancis en la aero laŭ liaj movoj. Karem estis ŝokita.

"Nekredeble impresa sento!" Li kriis, la okuloj brilantaj, kaj diris, ke li volas tuj venigi siajn du filojn al la urbo. "Ankaŭ ili amus," li aldonis kun rideto.

Se la roboto lin skuis, la sekva sperto eĉ igis lin ŝokita. Antaŭ la inteligenta san-butiko Yuexinyu, vigla robothundo etendis sian "manon" — kaj ili manpremis. "Mi vidis tion nur en filmetoj," Karem konfesis. "En realo ĝi moviĝas tute kiel vera hundo!" Sed la vera surprizo ankoraŭ atendis lin: AI-okulvitroj.

Kiam Karem surmetis la okulvitrojn ekipitajn per navigado, tradukado kaj muziko, okazis "magio" antaŭ liaj okuloj. Ĉinaj skribaĵoj fluis en italan lingvon, tuj kaj rekte. "La ĉina lingvo iĝis itala!" Li miris, turnante la okulvitrojn en la manoj. "Jen la plej interesa afero, kiun mi vidis. Eble ĉiu bezonus tiajn okulvitrojn!"



*Karem manpremas kun robothundo.*

Informiĝinte, ke ĉirkaŭ 7 000 eksterlandanoj aĉetumas en Huaqiangbei ĉiutage, Karem duonŝerce diris: "Ankaŭ mi povus veni ĉiutage!" Vortoj elkoraj — ne nur omaĝo al la teknikaj mirindaĵoj de Huaqiangbei, sed ankaŭ sincera aplaŭdo al la noviga pulso, kiu batas tra Shenzhen kaj la Granda Golf-areo Guangdong-Hongkongo-Makao.

Vojaĝo, kiu komenciĝis per dolĉa bombono, floris en teknikaj mirindaĵoj. De dolĉaj gustoj sur la lango ĝis avangardaj aparatoj, Karem mezuris la urbon per siaj paŝoj. Li spertis ne nur inventemon, sed ankaŭ homan varmecon. Simpla peto pri bombono fariĝis ponto inter li kaj Ĉinio.



*Karem provas AI-okulvitrojn kaj laŭdas.*

Tiu ĉi artikolo estas represita el *El Popola Ĉinio*, origine publikigita la 8-an de majo, 2026.

# AŬTUNA PENSO

*Laŭ la melodio «Pura Sablo»*

*Trad. el la Yuan-stila kvatro de Ma Zhiyuan*

*Trad.: Batalanto*



V elkaj lianoj, maljunaj arboj, vesperaj korvoj,  
Ponteto, murmura rivero, dometo kun fumo,  
Antikva vojo, aŭtunvento, magra ĉevalo.

La suno subiras okcidenten —  
Korŝirata migranto ĉe mondfino.



# La Ŝanhaja Kajo

Trad.: *Batalanto*

*El la samnoma televidserio*    *Kantoteksto de Wong Jim, muziko de Joseph Koo*

Ondoj impetas, ondoj fluas,  
Rivero senlima eterne fluas.  
Ĉion forlavas el la mondo,  
Ĉio kunfandiĝas en ondo.

Ĉu ĝojo, ĉu sufero?  
En ondoj ne distingiĝas rido kaj ploro.  
Ĉu sukceso, ĉu malsukceso?  
En ondoj ne videblas kiu venkas.

Mi amas, mi malamas vin —  
Ĉu vi scias?  
Kiel granda rivero neretenebla,  
Ĝi neniam povas returniĝi.  
Mil turniĝoj, mil torentoj,  
Ankoraŭ ne trankviliĝas tiu batalo.

Denove ĝojo, denove sufero,  
Eĉ ne distingiĝas rido kaj ploro.  
Mi volas trairi milojn da ondoj,  
Ke mia koro plene impetos.



# REMEMORA KANTO

*Trad.: Batalanto*

## Printempo

Printempa vent' dolĉe kisas, persikfloroj ekfloras,  
Unua rigardo, okulondoj fluas.  
Vi diris: «Nia tempo jam ekzistas,»  
En florpluvo la printempon mi trairas.

## Somero

Lotusfolioj dolĉe svingiĝas, somerakvo bruas,  
Tempo de pasio, flustroj senĉesaj.  
Amo kunfandiĝas al unu koro,  
Malfacile distingi: ĉu mi estas vi, ĉu vi estas mi?

## Aŭtuno

Oraj floroj kiel pluvo falas,  
Dolĉeta vino en viaj manplatoj.  
Vi diris: «Mi pli brilas ol lunlumo,»  
Florombroj sur papero — ni silente sidas.

## Vintro

Neĝokovritaj prunoj, nokto silenta,  
En viaj okuloj stelfajroj daŭre brulas.  
Eĉ se tempo dronas en abismon de forgeso,  
Amo ĉiam freŝa, eterne nova.



# Kanto pri la Amo

*Dolando — Verkisto kaj Komponisto*

*Trad.: Batalanto*

Amo estas ni du,  
Korojn ni kunplektas en vivo.

Amo estas vi kaj mi,  
Promeso firma en mizero.

Amo estas via mano,  
Kiu karesadas mian doloron.

Amo estas mia koro,  
Kiu aŭskultas viajn ĝojojn kaj malĝojojn.

Amo estas ni du,  
Korojn ni kunplektas en vivo.

Amo estas vi kaj mi,  
Promeso firma en mizero.

Mi venis al la tero,  
Spite al ŝtormoj kaj kirloj.

Via ama promeso brilas,  
Kiel sunradioj en nuba ĉielo.

Amo ĉirkaŭas min,  
Mi sentas ĝian kareson.

Eĉ se la vivo donas doloron,  
Senliman turmenton al mi.

Mi tamen trovas pli da feliĉo.

Amo estas ni du.

**爱是你我**  
刀郎 词曲

爱是你我，  
用心交织的生活

爱是你和我，  
在患难之中  
不变的承诺

爱是你的手，  
把我的伤痛抚摸

爱是用我的心，  
倾听你的忧伤欢乐

爱是你我，  
用心交织的生活

爱是你和我，  
在患难之中  
不变的承诺

这世界我来了，  
任凭风暴旋涡

正是你爱的承诺，  
让我看到那阳光闪烁

爱拥抱着我，  
我能感觉到它的抚摸

我还是觉得幸福更多

爱是你我

# Ĉe Ekzameno

de Ĉiamĝoja

Tra l' korto lerneja frapas sonorilo,  
Klasĉambren geknaboj sidas en trankvilo,  
Klininte la kapon ili pensas zorge,  
Kaj morgaŭ ekiros ili al sun-brilo.



## 考场即景

考试钟响校园间，  
学子静穆坐堂前。  
低头凝神思答卷，  
明朝昂首向晴天。



## 课罢悠然

欢欢喜喜上完课，  
安安静静坐桌旁。  
杯中热水泛微光，  
慢慢品尝心欢畅，  
此刻悠然享时光。



## Post Leciono

Mi ĝoje finis mian lecionon,  
Trankvile sidas ĉe tablo en domo.  
Jen varma akvo en ĉi glaso brilas,  
Ĝin lante trinkas mi kaj min inspiras.  
Nun pacan tempon mi ĝuas sen-zorge,  
Kaj mia koro jam feliĉas dolĉe.

## Belaj Kolzfloroj

*de Ĉiamĝoja*

Kolzfloroj ekfloras, papilioj flirtas,  
Ĉirkaŭe aromas, ĉie vento mildas.  
Mi starante antaŭ la ondoj de floroj,  
Ĝuas pitoreskon en flava koloro.  
Printempo en mia koro kante lirlas.

Kolz-semojn ni gajnos ĉe ties maturo.  
Poste kolz-oleon --- bono el naturo.  
Kiam freŝlegomon hejme ni kuiras,  
L' oleo glatigas manĝaĵon, utilas,  
Bongusto nin kaptas rave kun plezuro.



# Al mia filo

Gajo



Ne ploru tie!  
Iru for de mia tomb'!  
Mi vagas ĉie!

Jen, mi per manoj  
de la printempa vento  
palpas al kanoj.

Jen, en somero  
brilas sunlum' sur ĉio,  
min ravas belo.

Jen, foliaro  
ruĝas aŭtuna kun mi  
tra la montaro.

Kun neĝaj flokoj  
dancadas mi dum vintro  
super domblokoj!

Jen, mi per nuboj  
veturas aere kaj  
ludas en ruloj!

Kara, ne plie  
ploru ĉe mia tomo!  
Mi 'stas ne tie!

示儿

别在此哭泣  
快离开我的坟堆  
我四处游弋

你看那春风  
轻拂河边的芦苇  
是我的柔情


夏日临大地  
阳光照耀着万物  
美景我陶醉

秋风伴我行  
拂漫山红叶如花  
妆点万仞峰

冬来雪花飞  
我伴雪花当空舞  
叹万家晨炊

我腾云驾雾  
悠游四方好惬意  
随云卷云舒

儿啊别哭泣  
离开我的墓地吧  
我不在这里!



# La homa vivo

Gajo

*Sopir-al-sud'*

La tagoj  
iom post iom  
ronĝadas nin je l' vivo,  
kvazaŭ la vermoj, ĉiom,  
ĝis fin', neniom!

Sed tion  
timu neniam,  
vivu kun plena viglo,  
batalu ni por ĉiam!  
ne ĉesu iam!



## Hejmveo

*Gajo*

Songĝe hejmloko,  
kadukas la dometo,  
herboj sen koko.

Sonas silento,  
ĉirkaŭe staras montoj,  
arboj sen vento.

Montrozoj ĉie,  
ankoraŭ pompas ride,  
kaj salte-krie.

Ĉi praazilo,  
kie mi petolemis,  
nun en senilo!

-----

Klarigo

Hieraŭ nokte mi spertis songĝon, en kiu mi revenas al mia naskiĝloko kaj vidas tiel kadukan pejzaĝon, ke nebildigebla tristoseno ekondas en mia koro preter volo, do la poemo elfluis.

(Gajo modifis 2022-3-18)



# Kato · Lumo

Viktoria



Matena lumo rampas sur la balkono,

milde envolvante min.

Varma kaj dolĉa

Mi eklegas kaj gustumas teon.

Subite vidas la katon Abelon

Ĝi persekutas fluantan ondumon.

Kaj tio estas reflektita lumrivero,

El la ekrano inter miaj manoj.

Atente ĝi gardas la brilaĵon,

La ungegoj mildas kun ombrolud'.

Mi aliĝas al tiu ludo prefere

Skuante lumspegulojn en ondaj floroj.

La lumo saltetas sur la planko,

Abelo saltas en luma ombrolud'.

Maldekstren, dekstren, lerte kiel dancisto.

Mi fariĝas ĝia gaja kamarado.

Feliĉo ja estas tiel simpla,

Kiel etaj makuloj de matena lumo.

Abelo pelas la lumon,

Kaj mi rigardas ĝin —

En la matena kuro,

Du ridetoj brilas,

Helaj, ambaŭ simplaj.



# Memorkunveno okaze de la unua datreveno de la forpaso de Vejdo okazis en Chongqing



Fotoj/teksto: Zhao Dezhi  
Trad.: John Huang

La ĉina originalo estas represita el EPĈ.

**Ĝ**uste okaze de la unua datreveno de la forpaso de s-ro Vejdo, fama edukisto kaj tradukisto, posttagmeze de la 18-a de aprilo, liaj familianoj, amikoj dumvive kaj kunlernintoj kunvenis en malgranda kunvenejo de la Popola Halo de Chongqing por okazigi memorkunvenon.



Grupa foto de parto de parencoj kaj amikoj ĉeestantaj la memorkunvenon okaze de la unua datreveno de la forpaso de s-ro Vejdo

Unue Chen Changhai laŭtlegis kondolencajn mesaĝojn respektive de la Kyoto-filio de la Japana-Ĉina Amikeca Asocio, de s-ino Linko, konstanta komitatano de la Kiota Esperanto-Asocio de Japanio, kaj de s-ro Takemori, prezidanto de la Nara Esperanto-Asocio de Japanio.

En sia kondolencna mesaĝo s-ino Linko skribis: Estas malfacile kredi, ke jam baldaŭ pasis unu jaro post la forpaso de s-ro Vejdo. Mi ankoraŭ klare memoras la scenon dum nia vizito al Chongqing en 2024: ni sidis kune, trinkis teon kaj interparolis dum kelkaj horoj, uzante Esperanton kaj ankaŭ la ĉinan lingvon, ĉar s-ino Linko lernas la ĉinan. S-ro Vejdo lasis al mi impreson de tre milda kaj alirebla homo. Mi iam esperis revidi lin. Li havis tre profundan scion pri Esperanto, kaj lia foriro kaŭzis al mi grandan senton de perdo. Kun karaj memoroj pri s-ro Vejdo, mi esperas longe konservi amikecon kun la esperantistoj de Chongqing.

S-ro Takemori skribis en sia kondolencna mesaĝo: Kiel rapide pasas la tempo! Jam pasis unu jaro post la forpaso de s-ro Vejdo; la tempo vere flugas. Mia konatiĝo kun s-ro Vejdo ankoraŭ klare restas en mia memoro. Lia trankvila kaj digna voĉo ĝis nun resonas en mia menso. Kiu povus imagi, ke nia renkontiĝo fariĝos la lasta! Li estis tre fama esperantisto, kaj tio vere doloras. Mi esperas, ke ĉiuj amikoj en Chongqing zorge konservos la memoron pri s-ro Vejdo kaj kune plu disvolvos la longdaŭran amikecon inter Japanio kaj Ĉinio.

Wei Xing, filo de s-ro Vejdo, parolis nome de la familianoj. Li diris: Ekde mia infanaĝo mi sciis, ke mia patro profunde amis Esperanton. Li komencis lerni Esperanton jam dum sia mezlerneja periodo. Per dumviva kredo je Esperanto kaj diligenta studado li atingis riĉajn fruktojn kaj fariĝis grava membro de la Esperanto-movado en Chongqing, en Ĉinio kaj eksterlande.

En Sichuan-a Universitato de Fremdaj Lingvoj li plurfoje organizis kursojn pri Esperanto, fondis la Chongqing-an Esperanto-Asocion kaj la Sichuan-an Esperanto-Asocion, kaj starigis la redakcion de Esperanto-Lernado. Dum longa tempo mia patro forgesis dormon kaj manĝon, eĉ laboris tutnokte, por verki Esperanto-materialojn. Dum sia vivo li tradukis kaj kompilis multajn Esperanto-literaturaĵojn, kantojn kaj lernolibrojn.

La Universala Esperanto-Asocio nomis la Internacian Tradukan Konkurson de 2026 laŭ Vejdo, la Esperanta nomo de Vejdo, kio ankaŭ estas agnosko de la dumviva kontribuo de mia patro al la Esperanto-afero. Ni vizitis la specialan ekspozician ŝrankon de liaj postlasaĵoj en la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-a Universitato kaj ricevis varman akcepton de instruisto Sun Mingxiao kaj de la laborantoj tie. Hodiaŭ, vidante tiel multajn dumvivajn amikojn de mia patro ĉeesti ĉi tiun kunvenon, ni familianoj sentas grandan konsolon. Koran dankon al ĉiuj!



*Wei Xing, filo de s-ro Vejdo, parolas nome de la familianoj*

S-ino Yang Guifang, vidvino de s-ro Vejdo, diris: Hodiaŭ, vidante tiel multajn dumvivajn amikojn kaj kunlernintojn de profesoro Vejdo ĉi tie okazigi memorkunvenon, mi sentas grandegan konsolon en la koro. Mi esperas, ke ĉiuj daŭre persistos bone lerni Esperanton kaj vaste disvastigos ĝin.



*S-ino Yang Guifang, vidvino de s-ro Vejdo, meze*

S-ro Xiao Fujun, esperantista komercisto diplomita de Chongqing-a Universitato, speciale revenis de Kamboĝo al Chongqing por ĉeesti la memorkunvenon okaze de la unua datreveno de la forpaso de s-ro Vejdo. Dum la kunveno li rememoris la scenojn de antaŭ pli ol kvardek jaroj, kiam li lernis Esperanton kaj profesoro Vejdo entuziasme helpis kaj gvidis junajn lernantojn. La lastan fojon, kiam li vidis profesoron Vejdo, estis dum la festo de la 30-jariĝo de la Chongqing-a Esperanto-Asocio. Tiam la alirebla bildo de profesoro Vejdo profunde impresiĝis en lia koro.

S-ro Hu Fengsheng, prezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio, rememoris profesoron Vejdo dum la kunveno: Mi konatiĝis kun profesoro Vejdo dum la 7-a Tutlanda Kongreso okazinta en Guangzhou. Li estis afabla, alirebla kaj facile interparolebla. Poste mi plurfoje partoprenis en la Esperantista Somera Semajno organizita en Chongqing, kaj ĉiufoje dum la aranĝo mi havis profundajn interŝanĝojn kun profesoro Vejdo pri Esperanto. Antaŭe, pro mia laboro, mi ofte vojaĝis al Chongqing kaj renkontiĝis kun instruisto Vejdo. Li estis rara, altnivela kaj gvida majstro en nia Esperanto-mondo. Mi tre admiris lin.

Esperantistoj el Chongqing sinsekve parolis. Yan Jiali diris dum la kunveno: Profesoro Vejdo estas la homo, kiun mi plej respektas. Li estis kaj mia amiko kaj mia instruisto; precipe en gramatiko li donis al mi apartan gvidadon. Poste, kiam mi plentempe laboris en la redakcio de *Esperanto-Lernado*, mi helpis lin pri trakti kaj respondi leterojn de korespondaj lernantoj de Esperanto el la tuta lando. Mi eterne memoros profesoron Vejdo.

Li Xiuying diris dum la kunveno: Pasis jam dekoj da jaroj. Kiam ni estis junaj kaj lernis Esperanton, profesoro Vejdo ofte venis dum semajnfinoj al la lernoloko "Esperanto-Angulo" en Pipa-monta Parko por gvidi kaj instrui nin. Dum la Esperantista Somera Semajno ĉiujare organizata de la Chongqing-a Esperanto-Asocio, profesoro Vejdo okazigis parolajn trejnadojn. Ĉio ĉi por ĉiam restas en mia koro.

Zhao Dezhi kortuŝe rememoris kaj rakontis la 45-jaran historion de sia konatiĝo kaj kontaktoj kun instruisto Vejdo: Ekde la tago de la fondiĝo de la Chongqing-a Esperanto-Asocio, kiam mi ekkonis lin, ĝis la jaroj de mia plentempa laboro en la redakcio de *Esperanto-Lernado*, profesoro Vejdo verkis manuskriptojn kaj organizis materialojn, dum mi korektis, redaktis kaj kompostis ilin. Ĉiumonate tra niaj manoj pasis dekmiloj da korespondaj lernomaterialoj, legaĵoj, gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj. Ni ofte laboris kune ĝis profunda nokto aŭ frua mateno, kaj samtempe mi ricevis de instruisto Vejdo multajn konsilojn kaj gvidadon en la lernado de Esperanto. Dum la postaj jardekoj de kontaktoj, ni ĉiam ofte kune profunde diskutis, kiel bone fari la laboron de la asocio kaj kiel organizi diversajn Esperanto-agadojn kaj propagadon. En tiu longa interrilatado ni starigis profundan, fratecan instruisto-lernanto-amikecon.

Dum la grava malsano de instruisto Vejdo, unu el liaj plej bonaj internaciaj amikoj, s-ro Janos el Hungario, vizitis Chongqing. Instruisto Vejdo konfidis al Zhao Dezhi la tutan akceptadon de li kaj esperis, ke ni longtempe konservu kontakton.

Profesoro Vejdo estis honesta, principfida kaj serĉis la veron el la faktoj. Per sia tuta vivo li tradukis grandan nombron da literaturaj majstroverkoj, kiel *Familio*, *Fortikaĵo Sieĝata*, *Tricent Poemoj de Tang-dinastio*, *La Libro de Poezio*, *100 Esperanto-Kantoj* ktp. Li ankaŭ partoprenis en la tradukado de la kvina volumo de *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, kaj en la kompilado de Esperanto-gramatikoj kaj lernomaterialoj. Profesoro Vejdo dediĉis sian tutan vivon al la Esperanto-afero. Ni eterne memoros lin.



### Zhao Dezhi kortuŝe rememoras siajn interrilatojn kun instruisto Vejdo

Pli ol tridek parencoj, dumvivaj amikoj kaj kunlernintoj de profesoro Vejdo, inter ili Chen Changhai, Gong Yinbi, Yang Guifang, Wei Xing, Hu Fengsheng, Xiao Fujun, Liang Longlan, Wang Jianwen, Jiang Guoyin, Yan Jiali, Yang Wulong, Xie Lingxia, Tang Yan, Li Xiuying, Cui Biji, Zeng Shengquan, Li Demei, Zhu Qin, Zhao Dezhi kaj aliaj amikoj el diversaj rondoj, partoprenis en ĉi tiu kunveno. ◆

# Momenteto

Luo Shuigen / rememoro

*Daŭrigante la enhavon de numero 011*



En 1977, kiam Ĉinio reinstalis la altlernejan eniran ekzamenon, mi tre ekscitiĝis kaj pleniĝis je ambicioj. Mi penis trovi lernomaterialojn ĉiumaniere, laborante kiel lignaĵisto dumtage kaj preparante por la ekzameno plenkoncentre hejme nokte. Mi decidis partopreni la ekzamenon por liberalaj artoj kaj preskaŭ komplete regis ĉiujn lernogvidilojn por la ekzameno de 1977, povante preskaŭ parkere ripeti ilin. Mi planis reveni al la 30-a Regimento de la Heilongjiang Produkt-Konstrua Armeo en majo por registriĝi por la ekzameno. Tamen, homaj planoj ofte malsukcesas pro sorto. En aprilo de tiu jaro, okazis familia krizo: mia patro suferis cerban sangelverŝon pro alta sangopremo kaj estis sendita al la Ruĝa Gardista Hospitalo por savoperacio. Post du semajnoj en intensa flegado, li estis translokita al ordinara ĉambro. Lia vivo estis savita, sed li restis kun paralizo kiel postefiko. En la familio, tiuj, kiuj havis laboron, devis labori, kaj tiuj, kiuj ne laboris, devis lerni kaj estis tro junaj por prizorgi lin. Sendube, la tasko prizorgi mian patron falis sur min. Post du monatoj, lia stato stabiliĝis, kaj li povis reveni hejmen. Tiam la dato de la ekzameno estis jam tre proksima kaj la limdato por registriĝo jam pasis. Kvankam bedaŭrinde mi maltrafis tiun ŝancon, mi ne havis bedaŭron aŭ malĝojon, ĉar la vivo de mia patro estis pli grava ol io ajn. Se mi maltrafis tiun ekzamenon, estus aliaj ŝancoj en la estonteco. S-ro Bao, la edzo de Yang Limei, Hangzhou-edukita junulo de la 2-a Kompanio de Inĝenieroj kaj elstara studento de la tria jaro de la Hangzhou Unua Mezlernejo, partoprenis la altlernejan eniran ekzamenon en 1977 kaj estis akceptita ĉe la Jiamusi-filialo de la Harbina Pedagogia Instituto. Mi tre enviĝis.

Rapide venis 1978. La stato de mia patro stabiliĝis, kaj li povis parte prizorgi sin mem. Mi preparis miajn pakaĵojn kaj planis reveni al Heilongjiang por realigi mian revon pri la altlerneja ekzameno. Mi memoras, ke ankaŭ estis la 25-a de majo, la sama dato kiel mia unua vojaĝo al Heilongjiang. Mia patrino ne dormis la tutan nokton kaj ellitiĝis je la dua horo matene por prepari por mi dudek teajn ovojn. Post matenmanĝo, kiam estis ankoraŭ mallume, mia patrino akompanis min al la Nova Ponto, kaj mi sola iris al la Hangzhou Fervoja Stacio, aĉetis bileton al Ŝanhajo. Tiutempe la trajnoj estis tre malrapidaj, kaj al Ŝanhajo ni alvenis preskaŭ tagmeze. Mi prenis aŭtobuson rekte al la Ŝiphaveno de la 16-a Doko kaj aĉetis bileton al Dalian. La prezo por la malsupra ŝipkelo de Ŝanhajo al Dalian estis kvin juanoj. La ŝipo trairis la Orientan Maron, internaciajn akvojn kaj eniris la Bohajan Maron. Post du tagoj kaj tri noktoj, ni alvenis al Dalian. Dum la ŝipvojaĝo, mi manĝis nur la dudek teajn ovojn preparitajn de mia patrino. Post elŝipiĝo, mi aĉetis bileton de Dalian al Jiamusi. Vidante, ke restas kelkaj horoj antaŭ la foriro de la trajno, mi deponis miajn pakaĵojn ĉe la stacidomo kaj vizitis unu el la plej famaj vidindaĵoj de Dalian, la Tigromonton.

Tigromonto, origine nomata Granda Nigra Monto pro ĝiaj griznigraj rokoj, ekricevis sian nunan nomon post la Rus-Japana Milito en la tria jaro de la Hongzhi-epoko de la Ming-dinastio. La montaro, en formo de la ĉina ideogramo "山" (montaro), situas en la geografia centro de Jinzhou-distrikto, Dalian-urbo, Ljaŭning-provinco, 25 kilometrojn for de la urbocentro. Kun areo de 23,79 km<sup>2</sup> kaj averaĝa alteco de 400 m, ĝia ĉefa pinto atingas 663,1 m, estante la plej alta montopinto en la ĉirkaŭaĵo de Dalian. Norde ĝi apudiĝas al la Changbai-montaro, sude al la Flava Maro kaj la Bohaja Maro.

La geologia strukturo de Tigromonto estas rimarkinda: la supra parto konsistas el kvarcoŝtono formiĝinta antaŭ 800-600 milionoj da jaroj (Sinia periodo), kiu formas ĝian imponan ĉefpinton. En la meza parto troviĝas marmoro, kiu pro tektonaj influoj parte transformiĝis en "absorban ŝtonon" uzatan por bonsajoj. La suba parto konsistas el metamorfaj rokoj de antaŭ 2,5 miliardoj da jaroj (Arĥaiko), kiuj formis miloniton - la plej malnovan rokon en la Dalian-regiono, aspektantan kiel kaĉo.

Tage, la montaro estis tute sen turistoj. Subite du junuloj alproksimiĝis al mi, kun manoj en poŝoj kaj suspektindaj mienoj. "Ĉu vi havas monon?" ili demandis. Kvankam mi ektimis pri ebla rabado (malgraŭ ke la Kultura Revolucio jam finiĝis), mi restis trankvila. Mi donis al ili "Okcidenta Lago"-markajn cigaredojn kaj menciis, ke mi estas "frato Longjiang" revenanta al Jiamusi. Kiel iama ĉarpentisto sperta en popolaj esprimoj, mi sukcesis forigi ilian suspekton. Tuj poste mi rapidis al bushaltejo por reveni al la stacidomo.

En Jiamusi, mi malkovris ke la lasta buso al Jiangĉuan Bienkampoj jam foriris. Decidinte piediri la 30-lionjn (≈15 km), mi ekmarŝis laŭ la ŝoseo. Je la oka vespere, kun ventego kaj sablo blovanta, en la tuta mallumo kun strangaj bestkrioj, miaj fortoj elĉerpiĝis. Subite mi ekvidis lumeton el kotdomaĉo. Tie loĝis tri junaj urbanoj senditaj por kamplaboro. Ili akceptis min varme, donis al mi nudelojn kaj varman akvon por piedoj. "Ni ĉiuj estas urbaj junuloj senditaj al kamparo - ne gravas!" diris la plej aĝa. Post rapida manĝo mi tuj endormiĝis sur la varma kang-lito.


Dua mateno, apenaŭ tagiĝis, mi jam ellitiĝis, rekonsciiĝinte kaj sentante min eksterordinare vigla. Mi lasis pakajeton de "Okcidenta Lago"-cigaretoj, adiaŭis kaj dankis la Jiamusi-senditojn, invitis ilin viziti Jiangĉuan-farmon kaj daŭrigis mian vojon. La antaŭan nokton blovis forta vento, sed la matena aero estis freŝega kaj trankvila. Ne longe poste, bovtirita ĉaro alvenis malantaŭe. La maljuna veturigisto demandis min kien mi iras. Mi respondis ke mi estas de Jiangĉuan-farmo. "Enĉaru," li diris, "mi ankaŭ iras al Makuli, ne tro malproksime, ni baldaŭ alvenos." Verŝajne ne pli ol dek minutoj poste, la konata Makuli aperis antaŭ ni.

Estis tro frue por laborhoru, do mi unue vizitis la domon de Bao. Bao kaj Yang Limei geedziĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj ricevis brikdomon sur deklivo de Makuli. Kiam Bao ekvidis min, li miregadis kun larĝe malfermita buŝo kaj post longa silento diris: "Kial vi subite venis?" Mi mallonge rakontis pri mia vojaĝo. Bao demandis ĉu mi matenmanĝis. Respondinte ne, li tuj lerte preparis por mi tason de norda nudel-supu. Demandinte pri lia studado, Bao donis al mi neatenditan informon - li planas forlasi la lernejon kaj reveni al Hangzhou pro malsano.

Foririnte de Bao, mi rekte iris al la stabejo de la Dua Inĝeniera Kompanio. La estraro de la kompanio plurfoje ŝanĝiĝis; la nuna kompaniestro ankaŭ nomiĝas Wang. Por distingi lin de vic-kompaniestro Wang, oni nomas lin "Granda Wang". Li estas nordulo, altkreska kaj rektparola. Mi unue donis al li pakajeton de "Okcidenta Lago"-cigaretoj kaj mallonge prezentis mian situacion. Li tuj esprimis subtenon por mia aliĝo al altlerneja enir-ekzameno kaj helpis solvi kelkajn vivproblemojn, skribante permesilon kun oficiala sigelo por ricevi litkovrilojn kaj matracojn de la regimenta vestaĵ-fabriko. Por ke mi havu tempon por prepariĝi, li speciale asigis al mi laboron kiel ejo-gardisto.

En la mezlernejo de Jiangcuan-farmo laboris maljuna instruisto S-ro Ŝju. Vespere mi ofte vizitis lian domon por konsulti lin. Ni havis bonan rilaton. S-ro Ŝju, iama instruisto de Harbina Armea Universitato, estis honesta homo kaj pli ol dudek jarojn pli aĝa ol mi. Lia eksedzino ankaŭ instruis en la universitato kaj estis partia sekretario - talenta kaj bela. En 1958, S-ro Ŝju estis misklasifikita kiel dekstrulo kaj ekzilita al Jiangcuan-farmo, kie lia edzino divorcis de li. Kvardekjaraĝe, li edziĝis al loka 17-jara knabino sen edukado sed fekunda, naskinte kvar filojn. Post la Kultur-revolucio, eraraj historiaj kazoj estis revizitataj. Mi konsilis al S-ro Ŝju peti pri sia misklasifiko. Li sekvis mian konsilon kaj fine rehabilitiĝis, revenante al Harbino. Kiam ekzilita li estis sola; reveninte li kunportis preskaŭ klason da infanoj. Tiam li jam estis blankhara, preskaŭ emeritiĝonta maljunulo.

La tempo por la altlerneja enir-ekzameno (gaokao) pli kaj pli alproksimiĝis. La somero en Heilongjiang estis sufiĉe varmega, kaj la loka higiena medio estis malbona - muŝoj kaj moskitoj flugis ĉie, la necesejoj estis malpuraj kaj malbonodoraj, nur ĉirkaŭ 20 metrojn for de la laboristara manĝejo. Bedaŭrinde mi infektiĝis per disenterio, kaj eĉ sanga disenterio, kun konstanta sangado, tute sen apetito kaj eĉ sen forto por marŝi. Dum mi ricevis fiziologian solvaĵon en la gruphospitalo, mi samtempe partoprenis la ekzamenon. Tuj post la fino de gaokao, mi pro fizika elĉerpiĝo rekte iris al la hospitalo. Mi sentis ke ĉi tiu ekzameno ne iris bone kaj la espero pri eniro estis malgranda. Mia preferata universitato estis Hangzhou Universitato, pensante ke tio permesus al mi kaj studi en universitato kaj reveni al Hangzhou - du birdoj per unu ŝtono. Poste mi eksciis, ke kvankam mia poentaro superis la enironivelon de Hangzhou Universitato, tiu jaro la universitato akceptis nur du studentojn el Heilongjiang.



Dum mi atendis la enironotifikon, mia familio sciigis al mi ke mia patro prilaboras antaŭtempan emeritiĝon por postenotransdono, kaj diris al mi trankviliĝi. Mia patro suferis pro hipertensia apopleksio kaj ne povis plene prizorgi sin mem, do la procedo por postenotransdono estis relative facila kaj rapida - post nur iom pli ol du monatoj, mi ricevis la translokigan ordonon. Tiutempe mi jam ankaŭ ricevis la altlernejan enironotifikon, akceptita de la Jiamusi-filio de Harbina Pedagogia Universitato, hazarde la sama lernejo kie studis mia kamarado Bao. Sciante ke Bao jam prilaboras foriron el la lernejo kaj poste planas malsanemeritiĝon por reveni al Hangzhou, mi hezitis kaj fine decidis unue transpreni la postenon por reveni al Hangzhou, kaj denove partopreni gaokao en 1979 por klopodi eniri Hangzhou Universitaton.

La duan tagon post mia reveno al Hangzhou per postenotransdono, mi tuj iris al mia patra laborejo - "Hangzhou Unua Teksaĵa Fabriko" - por registriĝi. Mi estis asignita al la prepara laborejo kie mia patro antaŭe laboris, farante la saman taskon - "ŝanĝi la fadenojn", laŭvorta postenotransdono. "Ŝanĝi la fadenojn" estas antaŭa procezo en teksado: laŭ la larĝeco de la ŝtofo, unue kalkuli la bezonatan nombron da fadenoj, aranĝi ilin en fadenrubandojn, volvi ilin sur teksaĵan akson, kaj poste transporti la akson al la teksaĵa laborejo por teksado. Kiel novulo, multaj malnovaj kolegoj de mia patro en la laborejo iom zorgis pri mi. La laborestro estis la gvidanto de la ribeluloj en la fabriko dum la Kultura Revolucio, sed esence ne faris gravajn maljustaĵojn. Post la Kultura Revolucio li estis transigita al la laborejo kiel estro, kun nur kelkaj jaroj ĝis emeritiĝo. La sekretario estis virino - en la teksaĵa sistemo estas multaj virinaj laboristoj, do virina sekretario faciligis administradon kaj komunikadon, ankaŭ kun nur kelkaj jaroj ĝis emeritiĝo. Poste mi eksciis ke la nevo de la sekretario estis mia kolego en la dua inĝeniera kompanio de Jiangcuan-farmo en Heilongjiang. Ĉe mia unua alveno en Heilongjiang, mi eĉ bataletis kun ŝia nevo, ambaŭ suferante malgravajn vundojn.

Baldaŭ post kiam mi eklaboris en la fabriko, mi submetis al la fabrika administracio petskribon por rehonorigi mian patron, kiu suferis senbazajn maljustaĵojn dum la Kultura Revolucio. La fabrika administracio tre atentis mian peton, kaj post ĉirkaŭ du monatoj, la sekurecestro de la fabriko sciigis min, ke ĉiuj falsaj akuzoj kontraŭ mia patro estis nuligitaj, ĉiuj dokumentoj bruligitaj, kaj li estis tute rehonorigita.

Samtempe, mi ankaŭ rapide enskribiĝis al la Hangzhou Laborista Vespera Universitato por plibonigi mian eduknivelon. Post laboro ĉiutage, mi daŭre ripetadis hejme, aktive preparante por la altlerneja enir-ekzameno en 1979, persistante por realigi mian revon eniri Hangzhou-Universitaton. Tamen, sorto estas neantaŭvidebla. Kiam la enskriba dato alproksimiĝis, la ŝtato anoncis novan politikon: en 1979, la aĝo de kandidatoj por la altlerneja enir-ekzameno estis limigita al maksimume 28 jaroj, signifante ke kandidatoj devis esti malpli ol 28-jaraĝaj antaŭ la fino de septembro 1979. Mi estis ĝuste tri monatojn tro maljuna. Aŭdinte ĉi tiun novaĵon, mi sentis min tre senkuraĝigita kaj preskaŭ disfalis. La doloro de vidi sian multjaran revon ne realigebla estas nekomprenebla por ordinaraj homoj. ◆

*daŭrigota*

# AFRIKAJ VIRINOJ NE UZAS ESPERANTON EFIKE

*Honoré Sebuhero*



La manko de efika uzo de Esperanto fare de afrikaj virinoj povas esti atribuita al pluraj socikulturaj, ekonomiaj kaj edukaj faktoroj. Jen kelkaj ĉefaj klarigoj:

## 1. Sociedukaj kaj ekonomiaj baroj

### Malegalecoj en aliro al edukado:

En kelkaj partoj de Afriko, aliro al edukado estas neegala inter la seksoj, kaj virinoj povas esti malfavorataj laŭ lerneblecoj, precipe por fremdaj lingvoj. En tiu ĉi kunteksto, Esperanto, lingvo malofte instruata en lernejoj kaj universitatoj, ne estas prioritato.

### Prioritato al koloniaj lingvoj:

La angla, franca, araba kaj aliaj koloniaj lingvoj regas la edukajn kaj komunikajn sistemojn. Afrikaj virinoj, precipe en franclingvaj kaj anglalingvaj landoj, estas pli verŝajne instigitaj por regi ĉi tiujn lingvojn por sukcesi en la profesia kaj akademia mondo, anstataŭ turni sin al lingvo kiel Esperanto, kiu estas perceptita kiel malpli utila en ĉi tiu kunteksto.

## 2. Seksaj malegalecoj kaj tradiciaj roloj

**Tradiciaj roloj:** En multaj afrikaj kulturoj, tradiciaj roloj asignitaj al virinoj povas limigi ilian aliron al edukaj aŭ profesiaj ŝancoj kiuj inkluzivas lernadon de fremdaj lingvoj. Esperanto, kiel internacia lingvo, povus esti perceptata kiel malpli grava por virinoj vivantaj en kunteksto kie prioritatoj estas pli lokaj aŭ ligitaj al hejmaj kaj komunumaj agadoj.

**Manko de familia kaj komunuma subteno:** En iuj afrikaj socioj, la lernado de fremdaj lingvoj fare de virinoj ne estas ĉiam kuraĝigita, precipe se temas pri eksterlokaj lingvoj. Manko de familia aŭ komunuma subteno por lerni Esperanton povas esti grava obstaklo.

## 3. Manko de videbleco kaj reprezentado

### Inaj modeloj en la Esperanto-movado:

Estas relative malmultaj afrikaj virinoj kiuj estas publikaj figuroj aŭ proparolantoj de Esperanto. La manko de videblaj inaj rolmodeloj en la kampo de Esperanto reduktas la instigon kaj inspiron por virinoj lerni kaj uzi la lingvon.

Nesufiĉa reklamado: Esperanto ne estas vaste diskonigita en Afriko, kaj des malpli specife ĉe virinoj. Iniciatoj por instrui aŭ reklami Esperanton estas ĝenerale limigitaj, limigante la konon de la lingvo kaj ĝiajn eblajn avantaĝojn.



#### 4. Alirebleco kaj limigitaj rimedoj

**Limigitaj rimedoj:** Esperanto estas minoritata lingvo kaj, kvankam relative facile lernebla, al ĝi mankas edukaj rimedoj adaptitaj al afrikaj kunteksto, precipe en kamparaj regionoj. Virinoj loĝantaj en regionoj kun limigita aliro al teknologio aŭ specialigitaj lernejoj povas havi malfacilaĵojn por aliri esperantajn kursojn aŭ modernajn lernilojn.

**Manko de institucia subteno:** En multaj partoj de Afriko, Esperanto ne estas lingvo subtenata per edukaj aŭ registaraj institucioj. Sen oficiala rekono, ĝi restas marĝenigita, kaj ĝia lernado ne estas sisteme kuraĝigita.

#### 5. Prefero por lokaj kaj tutmondaj lingvoj

**Lingva pragmatismo:** Afriko estas kontinento karakterizata per granda lingva diverseco. Afrikaj virinoj ofte uzas lokajn lingvojn por ĉiutaga komunikado kaj tial preferas regi ĉi tiujn lingvojn por konservi sociajn kaj kulturajn ligojn. Esperanto, kvankam internacie agnoskita, povas ŝajni malpli grava en kunteksto kie lokaj lingvoj estas unuarangaj.

**Regado de koloniaj lingvoj:** la angla, franca kaj araba ofte estas perceptitaj kiel utilaj lingvoj por aliri tutmondajn profesiajn kaj ekonomiajn ŝancojn. Esperanto, kvankam ĝi estas planlingvo por internacia komunikado, ne estas perceptata same.

**Malpliigita videbleco de virinaj esperantoparolantaj komunumoj:** La komunumaj esperantistoj ofte estas malgrandaj, kaj la virina partopreno en ĉi tiuj komunumoj restas limigita. La virinoj eble ne estas eksponitaj al retoj aŭ interesgrupoj, kiuj uzas esperanton, kio malpliigas ilian motivon lerni kaj uzi la lingvon.

#### Konkludo

Mallonge, la manko de efika uzo de esperanto fare de afrikaj virinoj estas la rezulto de pluraj interligitaj faktoroj: sociedukaj baroj, manko de videbleco kaj promocio, tradiciaj seksaj roloj, kaj la domineco de koloniaj kaj lokaj lingvoj en sociaj kaj profesiaj sferoj. Por plibonigi la uzon de esperanto inter afrikaj virinoj, necesus efektiviĝi celitajn iniciatojn, promocii virinajn rolmodelojn, igi la instruadon de esperanto pli alirebla kaj aktuala, kaj krei subtenajn retojn por virinoj interesitaj pri la lingvo. ♦

# Hundo

*Morteza Mirbaghian*

Kiuj kun knabinoj  
surstrate promenas  
mi tre ŝatas  
Ofte mi haltas  
ĝin mi karesas  
kaj mi demandas  
pri ĝia nomo  
kaj ĝia aĝo  
ni plu parolas  
pri la vetero  
kaj lastatempa  
urba afero  
kaj la cetero  
pri politiko  
kaj politikistoj  
la grav-nuloj  
pri la milito,  
tute maljusta,  
tuta fiasko  
kaj prezidento  
la militema,  
malpopulara  
idioto...  
Telefonnumerojn  
ni interŝanĝas  
la rendevuon  
tuj ni aranĝas  
Hundojn  
kiuj kun knabinoj  
surstrate promenas  
mi tre ŝatas!





## Vidpunktoj de la mondo

Laŭ la mondparto  
 kie oni residas  
 la aferojn ofte  
 diference vidas  
 sekve okazas  
 severaj konfliktoj  
 dum saĝaj observantoj,  
 kun bedaŭro,  
 ridas!



# Poemoj de Musoro Benjamin Ciza



## MARTINE , MIA AMIKINO

**M**artine, Martine, mi estas kun vi,  
 En ĉi tiu momento malgaja kaj tiel peza.  
 Ne gardu vian doloron nur por vi,  
 Permesu al mia amikeco vin fortigi.  
 Via paĉjo foriris, sed restas ĉeesta,  
 En ĉiuj memoroj kaŝitaj en via koro.  
 Li donis al vi sian forton kaj sian tutan tempon,  
 Por ke vi kresku sen ia ajn timo.  
 Eĉ se hodiaŭ la ĉielo ŝajnas griza,  
 Sciu, ke mi marŝas ĝuste flanke de vi.  
 La tempo trankviligos ĉi tiun grandan fajregon,  
 Kaj la feliĉaj tagoj baldaŭ revenos.  
 Martine, Martine, kuraĝon mia amikino,  
 La ligilo de patro neniam rompiĝas.  
 Li gardas vin de supre, dum via tuta vivo,  
 Kaj restas via gvidanto, en plena paco.



## Por mia patrino Ĵaneta

*Benjamin Ciza Musoro*

Ĵaneta, mia kara kaj dolĉa patrino,  
En ĉi tiu tempo de laciĝo kaj doloro,  
Sciu, ke mi estas tie, sen ia fino,  
Por doni al vi mian tutan amon de koro.  
Via korpo hodiaŭ luktas kaj ripozas,  
Sed via spirito restas tiel forta.  
Miaj pensoj ĉirkaŭ vi milde sin metas,  
Kiel varma mantelo ĉe via pordo.  
La sano revenos, paŝo post paŝo, kara,  
La nubo forpasis, la suno rebrilos.  
Restu trankvila en ĉi tiu horo malfacila,  
Ĉar mia amikeco kaj amo vin akompanos.  
Kuraĝon, panjo, mi estas ĉe via flanko,  
Por vi mi spiras, por vi mi esperas.



# Erika Godó: Lumo en Literaturo

*Benjamin Ciza Musoro*

En la silento de la blanka paĝo,  
Vi skribas vivon per potenca spir',  
Ne nur virino laŭ la monda saĝo,  
Sed fonto klara por la mens-aspir'.

Ĉeesto estas forta herdo,  
Kie vortoj dancas en libera ludo,  
Vi gardas trezorojn de la homa perdo,  
Kaj semas saĝon en korprofundo.

En la spegulo de la literatura arto,  
Vi lumas kiel stelo en la nokto,  
Donante voĉon al la kora parto,  
Kun pura vero kontraŭ ĉiu frukto.

Ho, Erika, per plumo kaj per koro,  
Vi konstruas ponton al la nova tago,  
En la historio restos via honoro,  
Kiel eterna, brila monda imago.



# Vendisto kun du vizaĝoj

*Jerubbaal Banyanga*



En urbo plena je bruo kaj interkonsentoj vivis juna vendisto nomata Arko. Li ne havis multon, sed li havis ion maloftan: sinceran koron.

Komence, li helpis siajn klientojn honeste. Li klarigis ĉion, donis bonajn prezojn, kaj eĉ foje helpis sen profito. Homoj ŝatis lin... sed ne ĉiuj.

Iuj komercistoj ridis pri li.

“Vi tro mola estas,” ili diris. “Tiel vi restos malriĉa.”

Iun tagon venis viro, elegante vestita, kun rideto malvarma. Li proponis grandan interkonsenton al Arko—tre grandan. Sed estis kaptilo: la produkto ne estis tiel bona kiel oni dirus al la klientoj.

Arko hezitis.

Se li akceptus, li gajnus multe da mono.

Se li rifuzus, li restus en sia malfacila vivo.

La voĉoj de la urbo murmuris en lia kapo:

“Estu forta. Prenu la ŝancon. Neniu zorgas pri moraloj en komerco.”

Sed alia voĉo, pli trankvila, leviĝis el li mem:

“Kio restos de vi, se vi vendas vian veron?”

Li fermis la okulojn momenton... kaj diris:

“Mi rifuzas.”

La viro ridetis malestime kaj foriris.

Kaj vere, dum tempo, Arko perdis multajn

ŝancojn. Li luktis. Li dubis.

Sed iom post iom, io ŝanĝiĝis.

Homoj komencis reveni. Ili fidis lin. Ili sciis:

“Ĉe Arko, vi ne estos trompita.”

Jarojn poste, lia malgranda butikoj fariĝis granda komerco. Ne ĉar li estis la plej ruza... sed ĉar li estis fidinda.

Kaj en mondo kie multaj portis maskojn,


li sukcesis per sia vera vizaĝo. ♦



# Majo

*Jeroubaal Banyanga*

Majo alvenas sen bruo,  
sed ĉio subite ŝanĝiĝas.  
La aero fariĝas mola,  
kaj la mondo... spiras. Floroj ne demandas permeson —  
ili simple aperas.  
Kiel rideto post longa silento.  
Birdoj skribas muzikon  
sur nevidebla ĉielo,  
kaj la suno restas iom pli longe,  
kvazaŭ ĝi ne volas foriri.  
En majo,  
eĉ la koro fariĝas pli malpeza,  
pli kuraĝa,  
pli viva.  
Kaj sen klarigi kial,  
vi nur sentas:  
io nova komenciĝas.



# Al miaj legantoj

*Jeroubbaal Banyanga*

Vi, kiuj legas inter miaj silentoj,  
Kaj divenas miajn vortojn antaŭ ilia naskiĝo,  
Vi donas vivon al miaj vagantaj frazoj,  
Kaj sencon al ĉiu mia malforteco.  
Ĉiu verso iom tremas,  
Kiel koro kiu kuraĝas montri sin,  
Sed viaj rigardoj ĝin fortigas,  
Kaj milde helpas ĝin spiri.  
Vi estas la eĥo de miaj pensoj,  
La spiro malantaŭ ĉiu linio,  
Sen vi, miaj vortoj disiĝus,  
Kiel steloj sen ĉielo, sen direkto.  
Do mi skribas al vi kun sincero:  
Dankon pro loĝi en miaj poemoj,  
Ĉar en via homeco  
Miaj vortoj fariĝas ili mem.



# Omaĝo al la Malnovaj Esperantistoj

*Jeroubbaal Banyanga*

En la silento de pasintaj jaroj,  
Viaj voĉoj restas, sen forgeso aŭ baroj,  
Portantoj de revo sen limo kaj landlimo,  
De mondo unuigita per sama animo.  
Vi semis, vorton post vorto, kun fido,  
Lingvon naskitan el alta espero kaj gvido,  
Kie ĉiu voĉo trovas sian lokon,  
Sen timo, sen muro, sen malbona ŝoko.  
En viaj okuloj brilis espero,  
Pri estonteco sen ploro aŭ timo,  
Kie paroli fariĝas ponto,  
Ne armilo, nek akra alfronto.  
Eĉ se la tempo vin forportis iom,  
Via flamo ne estingiĝis, neniom,  
Ĉar en ĉiu "Saluton" dirita kun ĝojo,  
Via heredaĵo vivas kun novo.  
Do akceptu ĉi tiujn versojn simplajn,  
Omaĝon sinceran, klaran kaj mildan:  
Sen vi nenio estus komencita,  
Sen vi, nia revo restus perdita.



# La Pardon

*Jeroubbaal Banyanga*

**P**ardon ne estas malforto,  
 Ĝi estas koro, kiu releviĝas,  
 Dolĉa spiro, kiu trankviligas  
 La vundojn, kiujn oni portas.  
 Estas demeti la armilojn silente,  
 Eĉ kiam la animo ankoraŭ krias,  
 Estas elekti pacon kaj esperon,  
 Kiam kolero fariĝas tro forta.  
 Pardon ne signifas forgesi,  
 Nek forviŝi la cikatrojn,  
 Ĝi estas lerni spiri  
 Preter la doloro, kiu persistas.  
 Estas malfermi fermitan pardonon  
 Per timo kaj rankoro fermitan,  
 Kaj lasi la lumon eniri  
 Tien, kie regis amareco.  
 Pardon sekrete liberigas  
 Tiun, kiu kuraĝas ĝin doni,  
 Ĉar rompante siajn proprajn ĉenojn,  
 Li komencas sin retrovi.



# Ĝi ploras en mia koro

*Bibon Justin el Kongo*



**K**iel pluvas sur la urbo;  
Kio estas ĉi tiu malvigleco  
Kiu penetras mian koron?  
Ho dolĉa sono de la pluvo  
Sur la tero kaj sur la tegmentoj!  
Por laca koro,  
Ho la kanto de la pluvo!  
Ĝi ploras senkaŭze  
En ĉi tiu koro, kiu estas malsana.  
Kio! Neniu perfido?..  
Ĉi tiu malĝojo estas senkaŭza.  
Ĝi estas efektive la plej malbona doloro  
Ne scii kial  
Sen amo kaj sen malamo  
Mia koro estas en tia doloro.



# Ŝirita espero

*Nasandraatra Patrick*



Foje la espero estis ŝirita,  
Kaj la klopodoj – nur polv' en aero  
Jam larmas okuloj pro frapo subita,  
Kaj la morgaŭo, jen nur mizero.  
Mi malsukcesis, mi vane batalis,  
Aliaj mokis min kun ridetado.  
Mi malfortiĝis, eĉ tute mi falis,  
Sed en la koro restis spirado.  
Ĉar la falo ne estas la voja fino,  
Sed leciono kara por la menso.  
Ne estas baro la trista destino,  
Sed plua lukto kun profunda senco.  
Do denove leviĝu, forviŝu la polvon,  
Ne haltigos min eraroj de la pasinto.  
Eĉ se mil fojojn mi perdis la solvon,  
Mi klopodos ĉiam, ĝis la venka pinto!



# Taglibro de Pipi

Pipi



8a, novembro, 2025



La vetero estas tre bela. Mankas vento. Sur la lazura ĉielo dancetas blankaj nuboj. Iom korpulenta lindulino malhaste laŭiras la vojeton ĉe la lago. La vojeto estas ŝtonplate mozaikita kaj ambaŭflanke flore borderita. La lago estas blua kaj kvieta, kun iomaj sulketoj sur la akvosurfaco. Sur la transa bordo kreskas salikoj. La lindulino havas rendezuon kun Pipi. Ŝi difinis rendezuon al Pipi en arbareto. Jen ŝi iras al la rendezuo. Ŝi rigardas jen tien, jen ĉi tien, serĉante Pipi, sed ŝi ne vidas eĉ ties ombron. Kie estas Pipi? Li kaŝas sin ie kaj ŝtele glutas ŝin per la okuloj kaj lekas siajn lipojn ...

12a, decembro, 2025

Ŝi estas juna edziniĝinta virino, altstatura, kun longaj haroj, sveltaj brovoj, ovala vizaĝo, grandaj okuloj, rekta nazo, mincaj lipoj, plena brusto, pufa pugo, elasta talio kaj longaj brakoj kaj kruroj. Laŭ muziko ŝi kantas, lulante la koksojn.

En la lastaj tagoj s-ro Zhou Zhiqi estis ravita de ŝi kaj liaj pensoj estis okupitaj de ŝi. Mi deadmonis lin de ŝi plurajn fojojn: "For de l' okuloj, for de la koro." Sed li estis surda al mi. Hodiaŭ matene li diris al mi: "Ŝi radias de beleco. Mi trovas ŝin laŭ mia gusto!"

29a, novembro, 2025

Plena de memfido, la mezaĝa virino kun leporlipo kaj neregulaj tranĉodontoj diras: "S-ro Zhou Zhiqi diris ke mi estis bela. Ankaŭ mi sentas min bela. Mi plaĉis al liaj okuloj. Ĉe nia unuafoja renkontiĝo li donacis al mi tenajlon. Mi ege malĝojis pri tio. Mi ne sciis kion li celas. Sed ĉe la adiaŭo li promesis diamantan ringon al mi. Mi eksaltis de ĝojo, ĉirkaŭprenis per miaj brakoj lian kolon kaj donis al li ŝmacan kison. Li ne venis vidi min kaj mi ne ricevis informojn de li dum tri tagoj, sed mi kredas, ke li ne trompos mian esperon."



27a, novembro, 2025

La mezaĝa virino kun leporlipo kaj elstaraj incizivoj fiere diras al Pipi: "S-ro Zhou Zhiqi sendis al mi mesaĝon por sciigi min, ke li ŝatas min. Mi diris al li ke mi volas oran braceleton. Li mutiĝis kaj ne donis al mi respondon dum tri tagoj. Mi pensas ke li certe sin okupas je kolektado de mono."

Tion aŭdinte, Pipi rideksplodas, dirante: "Kiom ora braceleto valoras? Diamanta ringo multe pli valoras ol ora braceleto. Vi devus postuli diamantan ringon! Rigardu vin en la spegulo kaj konu vin mem!"



"Kiaj vortoj!" ŝi furioziĝis. "Ĉu oran braceleton mi ne havu? Ĉu mi estas tiel senespere malbela? Ĉu mi ne meritas s-ron Zhou?"

"Ho, ne!" Pipi diris pardonpeteme. "Mi petas vian pardonon. Vi aspektas mirinde ĉarme. Vi estas rimarkinde fascina. S-ro Zhou meritas vin, tamen lin kaj oran braceleton vi ne meritas!"

6a, novembro, 2025

La virino kuŝis kolera sur la lito, kun la dorso turnita al sia edzo. Videble ŝia koro mute kovis koleron. Ŝia edzo mane tuŝetis ŝin je la ŝultro, pardonpeteme pepis: "Kara edzino, tio estas mia kulpo! Mia" Antaŭ ol li finparolis, ŝi eksplodis de furiozo, forpuŝis lian manon kaj raŭkavoĉe tranĉis lian parolon: "Ne tuŝu min!" Li denove tuŝis ŝin kaj trudis sian pardonpeton al ŝi: "Mia koro, estas mia kulpo. Pardonon!". Ŝi refoje forpuŝis lian manon, senĉese draŝis lian manon per manplato kaj tigrine blekegante: "Ne tuŝu min! For! For! For!" Tio incitis lian galon. Li forte piedpuŝis ŝin teren.

Ŝi rapide stariĝis kaj rabie minacis lin per la fingro: "Vi batis min. Kiel vi aŭdacas! Vi jam distranĉis mian koron. Ankoraŭ unufoje, ĉu vi aŭdacos?" Tion aŭdinte, li donis al ŝi klakan survango. Ŝi ne ripostis kaj mutiĝis. Poste li kriegis al ŝi: "Enlitiĝu, tuj!" Ŝi ne agis. Li ree donis al ŝi vangofrapon kaj urĝis: "Tuj! Tujtuj!" Ŝi obeeme enlitiĝis kaj kate nestis en lia sino kaj tenere donis al li ŝmacan kison sur la vango, ameme dirante: "Kara edzo, vi ja estas vera viro!"

**3a, novembro, 2025**

Ĉu vi memoras la versojn: 'La buŝ' de Fansu ĉerize etas, Tali' de Xiaoman salike sveltas'?

En antikva Ĉinio al viroj plaĉegas belulinoj kun mallarĝaj ŝultroj, maldikaj talioj kaj malgrandaj buŝoj.

Tio ĉi estas ĉarma ronda buŝeto, kiu, roza, freŝa, brila kaj apetitiveka, ĝuste similas al maturiĝinta ĉerizo elgutigonta dolĉan sukon. Kia tantaliga buŝeto! Ĉe tiu vido, mi ne povas rezisti la tenton leki miajn lipojn kaj gluti salivon, kaj eĉ havas soifon premi kison sur ĝin.

Estas plezuro kisi ŝin.



**28a, oktobro, 2025**

Vesperiĝas. La suno subiras. La maro rulas ondojn. Sin lokante ĉe la marbordo, amanta paro reciproke brakumas kaj kisas. Kia feliĉa brakumo, kia dolĉa kiso, kia romantika amo! Al mi plaĉas vidi ĉi tiun scenon, kiu ravas min kaj pensigas min pri mia iama romantika amo en la juneco.

**27a, oktobro, 2025**

Kun fermitaj okuloj, li forte enbrakigas sian edzinon. Tiu karese nestas en lia sino. Ili ĝuas dolĉegan songon. Dormi kun la plej amata en la sino estas la plej feliĉa afero sur la tero. Estas plej agrabla ĝuo vivi kaj dormi kun karega homo. Kion vi opinias pri tio? Ĉu vi iam frandis tian vivon? Por diri al vi la veron, mi iam frandis. Mi estas la plej feliĉa viro en la mondo. Feliĉo konsistas en kontenteco! ♦

# Fotografia rubriko

*Fotado kaj klarigo: Shu Deping Tradukis: John Huang*



*Aparato: NIKON D3S Ĉefaj parametroj: aperturo f/11, eksponrapido 1/100, fokusa distanco 24 mm, ISO 200 Fotita je: 2020-05-15 Fotita en: Ĉinio*

## “Interspaco de Krepusko”

### Priskribo de la verko

Tiu ĉi fotografiaĵo kaptas la momenton ĉe sunsubiro, kiam la sunradioj trapenetas la montojn kaj nubojn.

### Lumo, ombro kaj koloroj:

La centro de la bildo estas la suno baldaŭ sinkonta malantaŭ la monto. Ĝi disradias brilan oran lumon, formante belajn “diajn radiojn” aŭ krepuskajn radiojn, kiuj kolorigas la ĉielon per varma oranĝflava tono. Tio forte kontrastas kun la malvarmkoloraj siluetoj de la malproksimaj montoj kaj kreas potencon vidan efikon.

### Kompono kaj tavoloj:

En la malfono troviĝas malebena tero kaj roka montflanko maldekstre, kiuj gvidas la rigardon de la spektanto al la profundo de la bildo. En la meza kaj fora partoj vidiĝas tavoloj da ondantaj karstaj montopintoj, jen aperantaj, jen malaperantaj en la maldensa nebulo, kio donas al la bildo tre bonan senton de profundo kaj spaca tavolo.

### Etoso kaj imagospaco:

La tuta bildo transdonas etoson trankvilan, vastan kaj iom melankolian. Ĝi ne nur montras la majestecon de la naturo, sed ankaŭ sugestas la fluon de tempo kaj la finiĝon de unu tago, vekante profundan meditadon. La inĝenieria veturilo apenaŭ videbla dekstre aldonas spuron de homa agado al tiu preskaŭ praa natura pejzaĝo, formante subtilan kontraston.



*Aparato: NIKON D3S Ĉefaj parametroj: aperturo f/8, eksponrapido 1/160, fokusa distanco 45 mm, ISO 200 Fotita je: 2020-10-25 Fotita en: Ĉinio*

### “Boatado sur Aŭtuna Lago”

#### Priskribo

Tiu ĉi verko kaptas la trankvilan belecon de aŭtuna lago kaj montara pejzaĝo. En la centro de la bildo, malgranda boato kun kelkaj turistoj malrapide glitas sur la spegulsimila lagsurfaco. La boatisto staras ĉe la posta parto kaj pelas la boaton per stango, dum la turistoj sidas aŭ staras, ĝuante la agrablecon de la aŭtuna tago. La lago estas klara kaj reflektas la buntkolorajn arbojn ĉe la bordo; aparte la fajroruĝa acero fariĝas la vida fokuso, forte kontrastante kun la ĉirkaŭaj verdaj arboj kaj flavaj folioj.


Malproksime etendiĝas ondantaj montaroj, kovritaj de densaj arbaroj. Ĉe la montpiedo disas kelkaj loĝdomoj kun blankaj muroj kaj grizaj tegmentoj, formante kamparan bildon de harmonia kunekzistado inter homo kaj naturo. La ĉielo estas kovrita de dikaj nuboj, kaj la milda lumo aldonas al la tuta bildo senton de kvieto kaj paco. Tiu ĉi verko ne nur montras la naturan belecon de aŭtuno, sed ankaŭ transdonas liberan kaj senĝenan vivĝojon.

#### Biografieto de Shu Deping

Sendependa fotisto

1. En januaro 1969 li aliĝis al la armeo kaj servis en la Dua Artileria Trupo.
2. En septembro 1989 li transiris al civila laboro en registara departemento de la urbo Huangshi.
3. En septembro 2012 li emeritiĝis. Post emeritiĝo li daŭre okupiĝas pri fotografado.
4. En majo 1971 li ekstudis en la Fotografia Teknika Lernejo Zhongyuan kaj diplomiĝis tie.
5. En februaro 1984 li estis dungita de la gazeto *Nacidefendaj Soldatoj* de la Milita Regiono Kunming kiel speciala korespondanto, respondeca ankaŭ pri bildaj raportoj. ◆

## La temo: “Proksime al la celo”



**L**a Interkultura Novelo-Konkurso estas jam en sia sesa eldono kaj invitas vin verki novelojn kun la temo “Proksime al la celo”.

Longa planado, longa penado, aventurplena vojaĝo, tiom da obstakloj venkitaj, malfacilaĵoj superitaj. Kaj via heroo estas tie, proksime al la celo. Nur unu paŝon for, nur unu plian klopodon. Ĉu la revo realiĝos, aŭ restos en fantazio? Ĉu la gloro estos atingita aŭ ĝi glitos for de la fingroj? Ĉu ludiĝos la lasta karto? Ĉu la celo alportos sukceson kaj bonesperon? Kio okazos al la protagonisto de via novelo en tiu ĉarnira momento, proksime al la celo?

### La detaloj de la konkurso

La konkurso atendas vian novelon kun la temo “Proksime al la celo” kaj invitas vin sendi ĝin per la reta formularo ĝis la 30-a de junio 2026. La noveloj povas havi maksimume 2000 vortojn. Ne estas minimuma longo de la verko, do mikrorakontoj bonvenas! Tekstoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. Pro la kreskanta partopreno en la konkurso, ekde la sesa eldono ĉiu aŭtoro povas sendi maksimume unu novelon. Sendu al ni vian plej bonan novelon!

La kontribuoj devas esti verkitaj en Esperanto aŭ en la franca, itala, japana, kataluna, persa, rusa aŭ ukraina, aŭ en iu ajn alia lingvo kondiĉe ke akompanu ilin altkvalita traduko en Esperanto aŭ en la franca, itala, japana, kataluna, persa, rusa aŭ ukraina. Ekzemple, novelo originale verkita en la korea kun akompananta traduko al Esperanto estas tute akceptebla.



La ĵurio kaj legokomitato konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. Ili taksos la novelojn kaj anoncos la gajnintojn dum la 112-a Universala Kongreso (UK) de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Melburno, Aŭstralio, en julio 2027.

En la konkurso estas du kategorioj: por komencantaj verkistoj kaj spertaj verkistoj. Kiel vi scias kiun elekti? Konsideru ke vi estas en la komencanta kategorio, krom se vi volas ke via verko estu taksata kun la verkoj de la plej profesiaj kaj spertaj verkistoj. En dubaj kazoj, decidus la organizantoj de la konkurso.

En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premion en la alteco de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premion en la alteco de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive. Ĉiu alia aŭtoro de finalista novelo ricevos premion de 50 eŭroj. La finalistaj noveloj estos publikitaj en novelaro, kiu aperos papere kaj bite.

Ĉu vi havas demandojn pri la konkurso? Kontakti nin!

Por kontakti la organizantojn: [ink.konkurso@gmail.com](mailto:ink.konkurso@gmail.com)

# Kie vojoj renkontiĝas

*Bobelarto*

La kvara eldono de la konkurso, per sia temo “Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj Homo sapiens” inspiris verkistojn el la tuta mondo. Ĉiuj esperoj kaj timoj de la homaro pri la estonto, estas bele prezentitaj en la novelaro Kie vojoj renkontiĝas. Aŭtoroj el diversaj landoj esploras la limojn de artefarita intelekto, kion ĝi povas proponi por helpi la homan socion, kaj kie estas la danĝeroj de troa dependeco al novaj teknologioj. Ĉu AI portos nin al brila nova erao aŭ formortigos nin ĉiujn? Mergiĝu en la 27 finalistajn novelojn de la kvara Interkultura Novelo-Konkurso, dum ankoraŭ eblas.

La novelaro prezentas la rezulton de la konkurso: 27 finalistajn novelojn elektitajn inter 805 konkursaĵoj. Ĉiuj rakontoj estas prezentataj en Esperanto, kaj ankaŭ en la originala lingvo kiam ili estis verkitaj per alia lingvo (itala, franca, persa, rusa kaj ukraina).

<https://bobelarto.ink/varo/kie-vojoj-renkontigas/>



# Bobelarto VerSe

La lastan semajnon de majo, inter la 25-a kaj 31-a, ni aktivos pri literaturo! Dum unu semajno, ni kuraĝigos unu la aliajn verki, sed ankaŭ legi, traduki, recenzi, desegni...

Partoprenu kaj subtenu la aliajn kuraĝulojn dum la ĉiutagaj renkontiĝoj je 14:00 UTC en nia Zoom-ĉambro. Ni ankaŭ elektis 7 vortojn por la tagoj de la evento, kiuj espereble inspiros vin verki.

Vi povas aliĝi ĉi tie: <https://bobelarto.ink/verse/>



## Deklaro pri aŭtorrajtoj por ĉiuj kontribuantoj

Ĉiu persono, kiu sendas al *Literatura Vivo* originalan verkon, tradukon, recenzon, eseon, bildon aŭ alian materialon por eventuala publikigo aŭ por partopreno en konkurso, estas konsiderata kiel konfirmanta, ke la sendita materialo estas lia aŭ ŝia propra verko, aŭ ke li aŭ ŝi laŭleĝe disponas pri ĉiuj necesaj rajtoj por ĝin sendi, traduki, publikigi kaj disvastigi; se temas pri traduko, la kontribuanto garantias, ke la originala verko jam apartenas al la publika havaĵo aŭ ke li aŭ ŝi ricevis la necesan permeson de la rajtoposedanto, kaj la redakcio rajtas peti pruvon pri tia permeso; se la kontribuo enhavas fotojn, ilustraĵojn, bildojn, teksterojn, tabelojn, kantotekstojn aŭ aliajn materialojn devenantajn de triaj personoj, la kontribuanto garantias, ke li aŭ ŝi akiris la necesajn permesojn por ilia uzo; la kontribuanto mem respondecas pri ĉiuj juraj sekvoj rezultantaj el malobservo de aŭtoraj rajtoj, tradukrajtoj, portretraĵoj, privatecaj aŭ aliaj rilataj rajtoj, kaj *Literatura Vivo* kaj ĝia redakcio ne respondecas pri malveraj aŭ nekompletaj deklaroj faritaj de la kontribuanto; la redakcio rezervas al si la rajton peti pliajn informojn, pruvmaterialojn aŭ permesojn, kaj laŭbezzone rifuzi, prokrasti, forigi aŭ retiri materialon, se aperas dubo aŭ disputo pri la rajta stato de la kontribuo; la samaj reguloj validas ankaŭ por kontribuoj senditaj al konkursoj organizataj aŭ kunorganizataj de *Literatura Vivo*, kaj se kontribuo montriĝas rajte problema, la organizantoj rajtas nuligi ĝian akcepton, forigi ĝin el la konkurso aŭ, se necese, nuligi premion; per sendo de materialo al *Literatura Vivo*, la kontribuanto estas konsiderata kiel plene leginta, kompreninta kaj akceptinta ĉi tiun deklaron. ♦





# INTERNACIA TRADUK- KONKURSO VEJDO (2026)

## Regularo de la Internacia Traduk-Konkurso “Vejdo” (2026)

*Sub aŭspicio de UEA kaj kunlabore kun la redakcio de Literatura Vivo*

- **Celo:** Honori la memoron de prof. Vejdo (Wei Yida) kaj stimuli altkvalitan tradukarton en Esperanto.
- **Organizo:** Oficiale rajtigita de UEA kaj kunorganizata de *Literatura Vivo*.
- **Partoprenantoj:** La konkurso estas malferma al ĉiuj esperantistoj tra la mondo.
- **Verkoj:** Akceptiĝas propraj tradukoj el **iu ajn nacia lingvo** en Esperanton. Ĝenroj inkluzivas poezion, mallongan prozon, rakontojn/mikro-novelojn, kantotekstojn, kaj artikolojn/eseojn.
- **Kondiĉoj:**
  - Maksimuma longo estas **1500 vortoj** po verko.
  - Nur **manfaritaj tradukoj** estas akceptataj; tradukoj faritaj de artefarita intelekto (AI) ne estas konsiderataj.
  - Ĉiu partoprenanto rajtas sendi maksimume **du verkojn**.
- **Sendado:** Verkoj devas esti senditaj al **info@literaturavivo.com** ĝis la limdato: **1-a de junio 2026**.
- **Ĵurio:** Konsistas el spertaj esperantistoj kun kompetento en literaturo kaj tradukarto, reprezentantaj diversajn naciajn lingvojn (angla, franca, hispana, rusa, ĉina, portugala, itala, hungara, pola).
- **Premioj:**
  - Unua premio (1 gajninto), Dua premio (3 gajnintoj), Tria premio (10 gajnintoj).
  - Konkretaj premioj estas provizitaj de UEA.
- **Rezultoj:** La fina rezulto estos publikigita dum la **111-a Universala Kongreso de Esperanto** en Graz, Aŭstrio, en julio 2026. Elektitaj verkoj aperos en la revuo *Literatura Vivo*.
- **Rajtoj:** La organizantoj rajtas publikigi la premiitajn aŭ elektitajn verkojn kun plena mencio de la aŭtoro kaj tradukinto.

*En nomo de la redakcio de Literatura Vivo kaj UEA, ni kore invitas ĉiujn esperantistojn partopreni!* contact: [info@literaturavivo.com](mailto:info@literaturavivo.com)